

OMAGĜE AL Kálmán Kalocsay

El Abaújszántó ĝis Esperanta Parnaso

OKA VOLUMO

(rekonstituita sen bildoj, enhavtabelo ne kontrolita)

ANTAŬPAROLO

Al la oka volumo

Jen la lasta volumo, kiu fermas la serion de OMAĜE. En ok kajeroj mi trarigardis 84 jarojn de la surtera vivo de Kálmán Kalocsay kaj plian kvaronjarcenton el lia "postmorta vivo".

De la lulilo ĝis la ĉerko longa estis lia vojo, kaj longa estis ene ankaŭ la aktiva, kreada tempo, kies fruktoj ĉe la listigo bezonis ses volumojn el la ok.

La personeco kaj la agado de Kalocsay estis tiel multifacetaj ke mi dediĉis al ĉiu faceto specifan sekcion. Tiu aranĝo ebligis, ke ĉiu parto taŭgas kiel memstara libro. Ili aperis laŭ la subaj aranĝoj:

EL ABAÚJSZÁNTÓ ĜIS LA ESPERANTA PARNASO. Parto de ampleksa biografia kompilaĵo. Kun fotoj, desegnaĵoj, reproduktaj. 1998. 143 p.

POETO DE LA INTERNACIA LINGVO. Prezento de Kalocsay kiel poeto kun alfabeto indekso de ĉiuj liaj poemoj kaj tradukoj al diversaj lingvoj kun aperfontoj kaj klarigaj piednotoj 1999. 110 p.

TRADUKINTO DE LA INTERNACIA LINGVO. Kalocsay la poemtradukanto. Ampleksa bibliografia kompilaĵo. 2000. 153 p.

LA PROZA VERKISTO KAJ TRADUKINTO. Ampleksa bibliografia kompilaĵo en alfabeto indekso. 2000. 75 p.

LA LINGVISTO KAJ GRAMATIKISTO. Historio de la diskutoj pri *neologismo*, ĝusta uzado de la *pasivaj participoj*, la *Esperanta vortfarado*, *ktp.* kun multaj indikoj kaj citaĵoj. 2001. 112 p.

LA REDAKTORO. LITERATURA MONDO — BUDAPEŝTA SKOLO. Kun portretoj de la stabo de fama revuo. Redaktitaj libroj fare de Kalocsay. 2001. 77 p.

SES JARDEKOJ EN LA ESPERANTA MOVADO. Laŭjare registrita la movada agado de Kalocsay. Kun fotoj, reproduktaĵoj, ktp. 2002. 113 p.

EL LA "VIVANTA KLASIKULO" FARIĜIS "SENMORTA KLASIKULO"; LA POSTMORTA VIVO DE KÁLMÁN KALOCSAY. Kun fotoj. 2002. 154 p.

Por gardi la kontinuecon la piednotoj (415) estas numeritaj sinsekve sen interrompo.

*

1976.02.27. Vendredo. Nokte je la 2-a horo Kalocsay translokiĝis al la Panteono de Zamenhof, kie por li estis rezervita loko apud Antonio Grabowski, Kazimier Bein kaj aliaj eminentuloj.

Li vivis **30 824** tagojn, sed "Poetoj ne mortas". La spirito de Kálmán Kalocsy daŭre lumos en la Esperanta kulturo.

Budapest, 2002

Ada CSISZÁR

Kálmán Kalocsay (1891-1976)
(Oficiala komunikaĵo de la Hungara Esperanto-Asocio)
(Kunmetis A. Csiszár)

La tuta esperantistaro suferis doloran perdon. Forlasis nin Kálmán Kalocsay, la elstara eminentulo de la Esperanta literaturo kaj lingvoscienco, membro de la Akademio de Esperanto, honora memebro de UEA, Honora prezidanto de la Hungara Esperanto-Asocio, ano de la redaktaro de Hungara Vivo.

Kálmán Kalocsay naskiĝis la 6-an de oktobro 1891, en Abaújszántó. La mezlernejon li vizitis en la urbo Miskolc. Post la universitataj studoj — en la medicina fakultato — li akiris diplomon en 1916, kaj kiel kuracisto, poste ĉefkuracisto li laboris en la hospitalo por infektaj malsanuloj en Budapeŝto. Kalocsay estis eminentulo en la medicino, de 1929 docento en la universitato. Li instruis, verkis valorajn faklibrojn. Post la liberiĝo (1945) li ricevis la altan titolon: "Doktoro de la medicinaj sciencoj".

Kun Esperanto li konatiĝis en 1911. Sur la literatura kampo li debutis en 1921, kiam aperis liaj originalaj poemoj sub titolo *Mondo kaj Koro*. En 1922 Baghy, Kalocsay kaj T. Schwartz fondis la faman revuon "Literatura Mondo", kiu baldaŭ evoluis al la plej konata literatura, arta organo de la Esperanta kulturo, kerno de la "Budapeŝta Skolo". La unuan verkon de Kalocsay rapidritme sekvis pluaj. *Kantanta Kampano* (popolkantoj), la traduko de *Johano la brava* (epopea fabelo de S. Petőfi), traduko de la *Tragedio de l' Homo* (drama poemo de I. Madách), *Eterna Bukedo* (poemoj tradukitaj el 22 lingvoj), reprezentis tiutempe la pinton de la tradukarto. Denove originalaj poemoj: *Streĉita Kordo*. Poste transplantigo de la verko de Goethe kaj Dante. En la eldono de LM aperis la *Hungara Antologio*, kiun Kalocsay ne nur redaktis, sed la plejparton li mem tradukis.

Post la dua mondmilito naskiĝis pliaj verkoj: *Ezopa Saĝo* (fabloj), traduko de Baudelaire kaj Heine, la brile transplantitaj Shakespeare-verkoj: *Reĝo Lear*, *Sommermeznokta Sonĝo*, La *Tempesto*. Eĉ unu el ili estus sufiĉa pruvi la talenton de Kalocsay, pruvi samtempe la esprimovon de la Internacia Lingvo.

Kaj kiam grandskala estis lia agado sur la tereno de la lingvistiko, gramatiko: *Lingvo, Stilo, Formo, Parnasa Gvidlibro, Plena Gramatiko de Esperanto* (verkita kun G. Waringhien), *Sistemo Esperanta Gramatiko*. Feliĉe kelkajn tagojn antaŭe, ke lin sternis la malsano, la kunverkisto Kalocsay povis preni en la manojn la ĵus aperintajn volumon: *Domfabriko — 6000 Frazologiaj esprimoj* — sian lastan verkon.

La verkado de Kalocsay en la Esperanto-literaturo kaj poezio atingis altaĵon Parnasan. Tion oni rekonis ne nur en Esperantujo, sed ankaŭ la Hungara PEN Klubo, kiu en 1970 distingis lin per honor-medalo.

Por Kálmán Kalocsay Esperanto estis arda pasio, por kio li laboris ĝis sia lasta spiro. Multe ni sentas kaj sentos la vakuon, kiun li postlasis. Iom por konsoli nin: li postlasis ankaŭ riĉan vivoverkon, tian spiritan valoron, kiun heredas la tutmonda esperantistaro.

Ni gardos lian memoron, kaj konservos lian vivoverkon por utiligi ĝin kiel bazon por nia plua laboro.

Budapest, februaro 1976.

Prezidantaro
de Hungara Esperanto-Asocio

La lastaj semajnoj de Kálmán Kalocsay

La 20-an de decembro 1975 posttagmeze mi parolis kun Kálmán Kalocsay en lia hejmo la lastan fojon. Tiam li estis bonhumora kaj aspektis relative sana.

Ĉe tiu memorinda vizito — kiun ĉeestis ankaŭ mia edzino kaj Lajos Tárkony Kálmán estis tre vigla kaj ankaŭ kantis al ni. Dufoje prezentis la enkondukan orelkaresan melodion de tiu filmserio, kiun ĉi-tempe prezentis la televido: Grafo Benyovszky.

La sekvan sabaton, la 28-an posttagmeze la amika rondo denove volis viziti Kolomanon, sed ni eksciis, ke matene oni devis lin enhospitaligi pro renohemoragio. La 7-an de januaro kune kun Ada Csiszár ni vizitis lin en la Hospitalo János, en la sekcio de la urinologia kirurgio. Tiam li aspektis vere malsana kaj li ege malgrasiĝis. Li parolis tre mallaŭte kaj malmulte.

La sekvan semajnon — la 12-an de januaro — ni denove vizitis lin. Tiun tagon li estis iom pli vigla. Li elvenis el la malsanula ĉambro, eksidis en la koridoro kaj ni povis konstati, ke lin iom gajigas la konversacio. Li kun ĝuo rigardis la kolorajn bildkartojn — scenojn el la epopeo de JOHANO LA BRAVA — kunportitan de Ada.¹

La sekva vizito okazis la 19-an de januaro. Li forlasis la liton, kvankam lace kaj singarde, eksidis ĉe la tablo. La temo de nia konversacio memkompreneble estis Esperanto kaj li kvazaŭ ekskuzis sin ĉe Ada pro la interrompiĝinta komuna laboro.² Kiam finiĝis la vizithoro Kolomano akompanis nin ĝis la ĉefa enirpordo de pavilono. Premis mian manon, kisis la manon kaj la vizaĝxon de Ada. Li kaj ankaŭ ni sentis, ke tio signifas la lastan adiaŭon.

Baldaŭ ni informiĝis de lia edzino, ke Kálmán depost la 4-a de februaro kuŝas jam en la Hospitalo László, kiu estis lia laborloko dum 46 jaroj. Nun li kuŝis en la pavilono 22-a, en la sama pavilono, kie antaŭ jaroj ankaŭ mi ricevis resaniĝon. Mi kuŝis dum semajno en la sama ĉambro kun Julio Baghy, kie post kelkaj jaroj nia Paĉjo fermis siajn okulojn por eterna dormo. Tiam Kalocsay estis vere nia ĉefkuracisto, tiu de Baghy, tiu de Tárkony kaj tiu de mia edzino, Merike.

En tiu ĉi pavilono mi vizitis Kolomanon la 8-an de februaro. Li estis jam treege malforta. Li ne parolis kun mi, kaj post kvin minutoj mi foriris. Nia amiko Tárkony la 15-an staris kelkminutojn antaŭ la pordo de la ĉambro de Kalocsay, sed li ne povis eniri al la ĉiam pli senforta malsanulo.

La 17-an de februaro Ada Csiszár kaj mi faris viziton en la hospitalo. En tiuj tagoj la edzino de Kalocsay tage-nokte sidis apud la lito de Kálmán. Kiam li sciiĝis pri nia alveno, vokis la flegistinon por forigi la drenilon, kaj ni atendadis longan tempon sur la koridoro. Fine tra la fenestro ni ekvidis lian kapon, kiam li provis elleviĝi. Sed vana estis lia fortostreĉo. "Jaj! nem bírok..." (Ve! mi ne povas...) aŭdiĝis trafenestre. Kaj lia kapo — unu el la plej geniaj kapoj de la Esperanta mondo — refalis al la kuseno.

Triste ni foriris el la hospitalo. Iom konsolis nin, ke ni povis almenaŭ aŭdi lian karan voĉon, ni povis vidi almenaŭ lian karan kapon.

Nia Kolomano luktadis kontraŭ la forpaso ankoraŭ dum dek tagoj. La 27-an de februaro tio estis vendrede — nokte je la dua horo finiĝis lia vivo.

Budapest, Marto 1976

Ludoviko Kökény

1. Tiu epopeo forte ligiĝi al la koro de Kalocsay, ĉar ĝiestis lia unua pli granda traduko. La kolorra bildoserio poste aperis en bildrakonta formo (2001-2002).
2. La komencitaj komunaj laboroj: Krestomatio sub titolo "Ne timu de Esperanto-ekzameno!" kaj listigo de la Kalocsay-verkaro. Ĉi-lastaj (pluraj miloj da indikoj) estas registritaj en la okvoluma OMAĜE ... (1998-2002).

1976.03.25. Adiaŭ al Kálmán Kalocsay³⁵²

La menso komprenas — tamen ribelas nia koro.

Pasis jam unu monato, ke Kálmán Kalocsay fermis la okulojn por eterna dormo. Tamen kiu ne staris ĉe lia mortolito, tiu nur nun, apud la katafalko komprenas la neŝanĝeblan realon.

Stranga hazardo: antaŭ naŭ jaroj ĝuste en la saman tagon okazis la entombigo de lia poetofrato Julio Baghy.

La entombiga ceremonio estis anoncita je la 2-a horo (ĵaŭdon) sed la funebrantoj multe pli frue kolektiĝis en la belloke situanta tombejo de Máriabesnyő. En tiu vilaĝo apud Budapeŝto, la familia kripto de lia edzino estis destinita enfermi la cindron de la forpasinto.

La vetero ne favoris nin. La dumnokta pluvego tramalsekigis la argilan grundon de la tombejo (situanta sur montodeklivo), kaj la funebrantoj devis balanciĝi en la glitaĵo. Fruprintempa, akra vento furioze kirlis la dikajn nubojn. En la apuda ĉerkofabriko akresonaj segiloj ŝrike tranĉis lignotabulojn, ofendante la sepultan etoson, subpremante la voĉojn de la oratoroj.

Kiam la proksima turhorloĝo batis la trikvaronojn antaŭ la dua, per aparta aŭtobuso alvenis la gvidantoj kaj funkciuloj de la *Hungara Esperanto Asocio*. El eksterlando alvenis unu persono: akademiano Ivo Rotkviĉ, sed estas certe, ke en tiuj horoj multaj funebriis en la kvin partoj de la terglobo.

En la malgranda katafalkejo trovis lokon nur la familianoj, la oratoroj kaj la plej intimaj amikoj. La granda parto de la funebrantoj (proksimume 200), eĉ la delegitoj alvenintaj el foraj urboj de la lando, ne povis stari ĉe la katafalko.

La brunan majolikan cindrounon ĉirkaŭis la florkrono (kunmetita en galantoj) de la edzino. Krom tiu florkrono kuŝis nur du florkronoj sur la katafalko: tiu de la duonfilino (kunmetita el hederaj kaj violoj) kaj tiu de Ada Csiszár enbukeditaj el pinioj, mahonioj kaj rozkoloraj diantoj. "Al nia nemortemulo" anoncis ĝia Esperanto-surskribo de la blanka silkorubando. Jes, geniaj spiritoj neniam mortas. Kvankam en tiu sezono ne abundas floroj, la katafalkon tamen ĉirkaŭbrakumis abundaj bukedo — inter ili la pompa florkrono de UEA kaj HEA — tristaj simboloj de honoro kaj amo.

La solenaĵo komenciĝis per funebra kanto, prezentita de la koruso, kiun fondis Kalocsay en la *Hospitalo Szent László*.

La unua oratoro estis d-ro János Lévai, hospitala ĉefkuracisto, disĉiplo de Kalocsay. Li resumis la vastan medicinistan agadon de la forpasinto kaj diris adiaŭon en la nomo de la iama laborloko, kie laboris Kalocsay tra 46 jaroj.

Sekvis la parolado de la prezidanto de *Hungara Esperanto-Asocio*, d-ro József Mátéffy. Li konigis la meritojn de Kalocsay en la Esperanta kulturo.

"La kordo abrupte rompiĝis kaj fale forglitis la svenaj fingroj de la magia harpisto Kolomano Kalocsay..." — komencis sian funebran parolon Ivo Rotkviĉ, kiu venis el Jugoslavio por plenumi tiun tristan komision de UEA.

Fine en la nomo de la fervojistoj kaj aliaj asocioj adiaŭis dro István Bácskai.³⁵³

La kanto de koruso ("Ave Maria" de Schubert), finis la sepultan ceremonion.

Sekvis la plej dolora akto de la entombigo. La lasta vojo de Kalocsay ne bezonis funebran veturilon, la tombokelo distancas nur ducent metrojn for de la katafalkejo. La krudaj padoj de la tombejo eĉ tion ne ebligis, ke funebra procesio akompanu lin al la ripozloko. Feliĉe dum tiuj minutoj la suno eklumis kaj akompanis lian cindron ĝis la finstacio.

La kriptoj de la familio Vangel — konstruita sub tombokapelo — malfermite atendis la novan loĝanton. La proksimuloj, kiuj trovis lokon en la kapelo, krom la anima turmento, devis elporti novan ŝokon: sur la kruta ferŝtupareto kondukanta al la tombokelo, la tombistoj perdis sian ekvilibron, kaj la urno renverŝigante kun laŭta bruado ruladis en la cindroportanta vitroŝranketo. Kia groteskaĵo: ĉu eĉ la cindro de la dinamika Kalocsay ribelis kontraŭ la kruela leĝo de la naturo?

Fine la urno alvenis al la fina ripozloko. La cindron englutis la obskura kavo. Fermiĝis ankaŭ la nigra ferpordego de la kriptokapelo.

Ankaŭ la suno malaperis malantaŭ la dikaj nuboj. Nigra "baldakeno" vaste sterniĝis super la tombejo.

*

Kaj ni, kiuj ankoraŭ staris ĉe la ekstera flanko de la timiga pordego, ekiris hejmen, vivi plu eĉ se orfe, sen Kálmán Kalocsay.

Eta SZIGETI-KARDOS

352 Antaŭe aperis en: Fonto (1996:185, p. 25-26), Bulteno de KAL-ĈI Dokumentaro (2001:1, p. 5-7), Debrecena Bulteno (2001:123, p. 26-28.).

353 Adiaŭantoj de Kalocsay unu post la alia forpasis: D-ro J. Lévai (1976), I. Rotkviĉ (1983), D-ro J. Mátéffy (1986), D-ro I. Bácskai (1996).

En la nomo de Hungara Esperanto-Asocio adiaŭas d-ro József Mátéffy

Kunpremita koro ni venis ĉi tien al la familia kripto, ke en la nomo de Prezidantaro kaj ĉiuj membroj de la Hungara Esperanto-Asocio ni esprimu lastan omaĝon al la honora prezidanto de nia societo, al la elstara figuro de la hungara kaj internacia Esperanta movado, al amiko ĝismorte fidela al nia ideo, al Kolomano Kalocsay.

Neniu restas senemocie, se iu maljuna, alta, de malproksime videbla arbego, ĝisvivinte sian aĝon, kun granda bruo terenfalas. Eĉ tia evento vekas tristajn pensojn, la ekvido de la forpaso elvokas preman animstaton. Sed kiom pli ekskue estas sciigi pri la nehaltigebla forpaso, se ni perdas ne iu sensentan parton de la naturo, sed tian homon, humaniston kaj kamaradon, kiu impone alte superis siajn samtempulojn enlande same kiel eksterlande en la multnombra familio de esperantistoj. Kiom da doloriga estas percepti, ke jam ne estas korpe inter ni la homo, kies spirito brilas super ni kiel lumo, kaj ke ni definitive perdis tiun majstron, al kies riĉa scio, afabla helpemo tiom ofte ni povis nin apogi. Ni perdis homon, kies talenton oni povas rajte meti en la saman vicon, kie troviĝas mem la iniciatinto de la lingvo. Se Ludoviko Zamenhof kreis per Esperanto tian genian verkon, kiu fariĝis eterna parto de la la spirita trezorejo de la mondo, tiam Kálmán Kalocsay estis genia aplikanto kaj evoluiganto de tiu mondlingvo, en kiu li sciis ludi kun nesuperebla arto kvazaŭ sur mirinda muzikinstrumento.

Lian elstaran erudicion akompanis ankaŭ multflankeco. Dum lia longa vivo Kalocsay kreis serion da valoraj verkoj. La nombro de liaj volumoj superas pli ol tridek. Li verkis en hungara kaj Esperanta lingvoj, ambaŭlingve li kreis originalaĵojn kaj tradukojn, li estis hejme en poezio kaj prozo, okupiĝis profunde pri gramatikaj problemoj de Esperanto, verkis komune kun Gaston Waringhien la plej ampleksan kaj detalan gramatikon en la plej alta nivelo. Al ni hungaroj li havigis hungarlingve la verkon SISTEMA ESPERANTO-GRAMATIKO, kiu estas plej ampleksa Esperanta gramatiko aperintaj ĝis nun nacilingve en Esperantujo. Li estis mirinda riĉiganto de la vortrezoro de Esperanto.

Kolomano Kalocsay estis jam veterano de la movado. Li kultivis la internacian lingvon jam de ses kaj duono de jardekoj, li apartenis al tiu generacio, kies membroj aliĝis al la tendaro de esperantistoj ankoraŭ antaŭ la unua mondmilito. Lia junaĝo troviĝas en tiu epoko de la lingvo kaj movado, kiam elformiĝis ne nur la tutmondaj lokaj esperantaj organizaĵoj, sed evoluis plenaĝe ankaŭ ĝia literaturo. En tio havis gravan rolon la literatura tendenco, kiu manifestiĝis en la beletra revuo, *Literatura Mondo*, sub spirita gvido de Kolomano Kalocsay kaj tiu tendenco estis poste nomata *Budapeŝta Skolo*.

Jes! La nomo de Kolomano Kalocsay, jam eniris la literaturhistorion de Esperanto. Lia nomo estas jam nocio, kaj kiam la novaj adeptoj ĉiam pli profunde ekkonas la verkojn de Kalocsay, ili mem konvinkiĝos, ke nia foriranta amiko levis por si monumenton pli daŭran ol erco per artaj tradukoj de ĉefverkoj kiel LA TRAGEDIO DE L' HOMO de Imre Madách, la INFERO de Dante, la REĜO LEAR de Shakespeare.

Okaze de la fondiĝo de HEA en 1960 li ricevis ŝtatan distingon "Pro la Socialisma Kulturo". Li estis la unua kaj ĝis nun la sola Hungaro, kiu ricevis distingon ormedalon de PEN-Klubo por la literatura agado en Esperanto. Li estis la unua kaj sola, kiu ricevis altan ŝtatan distingon, la oran gradon de "Laborordeno" por la tutviva agado sur kampo de Esperanto.

Lia reputacio baziĝis sur lia eksterordinara erudicio. La esperantistoj kun fido povis sin turni al li en kia ajn gramatika problemo, li helpis volonte al ĉiuj. Li ne izolis sin de la diskutoj, cedis al la ĝustaj argumentoj. Li klopodis, ke la materialo aperigota, kaj de li kontrolita estu gramatike kaj el vidpunkto de stilo kiel eble perfekte polurita. Nerezisteble instigis lin la deziro, ke per la evoluigo de Esperanto li egalrangigu ĝin al la literatura lingvo de la evoluintaj grandaj nacioj.

Ni ŝuldas al Kolomano Kalocsay eternan dankon pro la lingva revizora laboro, kion li plenumis ĉe nia revuo *Hungara Vivo* fondita antaŭ 15 jaroj. Tiu agado estis jam sole taŭga alten levi la reputacion de la revuo antaŭ la pretendema en- kaj eksterlanda legantaro. La signifon de lia kunlaboro brile atestas, ke antaŭ nelonge la japanaj esperantistoj trovis inda kaj merita la novan eldonon de ĉiuj numeroj de *Literatura Mondo*, kiun Kalocsay redaktis ekde 1922 en tri periodoj. La celo de la reeldono estis, ke ankaŭ la postaj legantoj povu ekkoni tiun fonton, el kiu la spirito de la lingvo freŝe kaj kuraĝe renoviĝis, ĝia vortrezoro abunde riĉiĝis, ĝia esprimovo kaj kapablo disvolviĝis. Liaj verkoj servos kiel modeloj al ĉiuj, kiuj volas ekkoni kaj alproprigi la Internacian Lingvon en la plej alta nivelo.

Neniam arkaĝos tiuj meritoj, kiujn akiris nia poreterne foririnta amiko por intereso de la disvastigo de la Internacia Lingvo. Li batalis por tiu ideo, kiu strikte interrilatas la grandan ideon de niaj tagoj, la penson de la interpopola kompreniĝo, kaj la ideon de la paca apudvivado.

Kálmán Kalocsay en sia vivo jam faris paŝon al la senmorteco. Lia nomo neforviŝeble brilas jam sur la paĝoj de la historio de Esperanto.

*

Ni dankas al vi, kara amiko ĉion, kion vi faris por Esperanto kaj por ties hungara movado, kaj se nun kun amara sento de la perdo mi adiaŭas al via cindro alveninta al la lasta ripozloko, ni faras tion kun la promeso, ke ni ne forgesos vin, kaj via spirito ĉiam vivos inter ni pere de viaj verkoj.

Budapest, 1977.

Elhungarigis Ferenc BARTÓK

Adiaŭas Ivo Rotkviĉ
En la nomo de la Universala Esperanto-Asocio

Li apartenis al la "titana gento"³⁵⁴

La KORDO abrupte rompiĝis kaj fale forglitis la svenaj fingroj de la magia harpisto Kolomano Kalocsay...

Nun li ripozas en sia lasta haveno antaŭ ol transpasi, senrevene, la limponton inter la efemereco, kiun li forlasas, kaj la senmorteco, al kiu lin gvidas la stelbrila vojo de lia genio.

Kolomano Kalocsay ĉesis vivi, sed la Morto ne triumfos supervenke. Postrestis el li multo nedetruibla!

La grandiozecon de la staturo de Kalocsay, pro la troa proksimeco, ankoraŭ ne estas eble elmezuri, kvankam ni jam nun povas, birdvide konstati, ke li apartenis al la "titana gento" en nia movado. Ankaŭ liajn verkojn ni ne sukcesus, laŭvalore difini eĉ per plej larĝa formulo, ĉar ili formas unu tutan literaturan kosmon kun la propraj leĝoj de gravito kaj apartaj astraj konstelacioj.

Kalocsay estis fenomeno, kia disbrilas nur unufoje en ĉiu jarcento.

Forpasis pli ol ses jardekoj, de kiam Kalocsay aperis sur la Esperanta mondscenejo. Sub la arĉotiro de la nova, originala poeto la lingvo eksonorilis vortabunde, kolorriĉe, kvazaŭ polifonia orkestro. Vere, grava kontribuo de Kalocsay al la stiloturno de la originala Esperanta poezio.

Tiun sian epokfaran paŝon li poste priremoros en simpla konfeso.

***Kaj se en mia koro estis ardo,
ĝi estis por la lingvo: mi ĝin volis
prepari, perfektigi por genio
post mi venonta...***³⁵⁵

Eble ĝuste tiu korardo por lingva perfektigo forturnis la originalan poeton de la ekpaŝita vojo. Liaj originalaj poemoj estas pli kaj pli malmultaj, plej ofte nur introspekta rifuĝo el la tedo de ĉiutago en la senvelkan boskon de poezio. Nun li dediĉas sian neelĉerpeblan genion, laŭ la zamenhofa ekzemplo, al la tradukarto. Kaj pri ĝi neniu en la Esperanta literaturo estas inda rivalo al li.

Luktante en la senĉesa drameca batalo por venkotrude enkapiti spitan, elfuĝeman esprimon de originalo en la traduke adekvatan impreson kaj koncizon, Kalocsay fine triumfas kiel nesuperebla majstro eĉ pri la plej subtila lingva nuanco. Tial la tradukoj de Kalocsay atingis zenitan altecon. Ili ne estas nura traduka anekso de mondaj ĉefverkoj en Esperanton, ili estas geniaj reverkoj, maturaj por pruvi, ke la literaturaj belecoj estas senmortaj, ke ili tra jarcentoj kaj jarcentoj, eĉ tra apokalipsaj plagoj, travojas en sia senmakula brilo. Tra generacioj tiuj ĉi tradukoj fajreretos en nia literaturo kiel juveloj, inkrustiaj en reĝaj kronoj.

Ni ne povas forgesi ankaŭ unu el la plej mirindaj trajtoj de Kalocsay, ke li neniam estis memcentra kaj memsufiĉa verkisto. En lia alnaskita kunlaboremo ekfloris la neforgesebla parcelo de belo: "Literatura Mondo". Leonparte ĝi estis lia iniciato kaj dank' al ĝi Budapeŝto

ekrolis kiel "Verda Ateno" de esperantistoj, en kiu, ĉirkaŭ la genuoj de du grandaj majstroj, Baghy kaj Kalocsay, ariĝis disĉiploj de la fama "Budapeŝta Skolo".

Tiel la agado de Kalocsay seninterrompe disvolviĝas inter poetaj vizioj, tradukaj cizeladoj kaj atentaj priobservoj de la lingvoevoluo. Por fidele protekti la lingvan tradicion, li batalprete tenas kiel ŝildon la *Fundamenton*. Al la poetaj vizioj kaj tradukistaj spertoj ni dankas liajn verkojn pri la stila majstreco kaj la bazaj leĝoj de poetiko. El liaj observoj pri la lingvoevoluo rezultas pluraj lingvistikaj traktatoj.

Lia deira starpunkto: Esperanto ne estas ia lingva projekto aŭ "artefarita lingvo", ĝi jam delonge elriveris en "la plej junan membron de la hindoeŭropa familio." Tial liaj lingvistikaj versercoj, liberiĝinte el la rutinaj pensosulkoj, enhavas tre originalajn analizojn kaj lia sorĉista "retorto" elŝutiĝas kristale klaraj rezultoj.

Se Kalocsay ne havus aliajn meritojn, se postrestus nur liaj lingvaj plukonstruoj sur la granita zamenhofa Fundamento, kaj la argumentoj, elkribritaj, en ora ŝuto, el la verkoj de Zamenhof kaj de la plej elstaraj esperantistaj verkistoj, Kalocsay levus por sia gloro piramide superstaran monumenton.

Resume kaj kernvorte:

Kalocsay dum sia tuta vivo estis unu el tiuj superaj animoj, dotitaj per genio kaj majesta homeco, li estis homo plena de interna lumo, la homo profunda kaj neforviŝebla el la ora paĝo de la Esperanta historio.

En la nomo de la Universala Esperanto-Asocio mi kondolencas al la familio de Kalocsay kaj samtempe esprimas profundan dankon de la tutmonda esperantistaro pro ĉio, kion la familio oferis por faciligi al nia neforgesebla grandulo la poresperantan laboron;

En la nomo de la Universala Esperanto-Asocio mi kondolencas al la tuta hungara esperantistaro pro la perdo de la plej eminenta avangardulo;

En la nomo de la Universala Esperanto-Asocio mi kondolencas al la tuta hungara popolo pro la perdo de unu el ĝiaj grandaj filoj.

Estis iam Kolomano Kalocsay — diras nun la ŝtona ĉizo.

Li pasis, ve li pasis, sed restis lia Ago!

354 Laŭ la afabla permeso de s-ro Rotkviĉ represita el: Esperanto 1976/64-65.

355 K. Kalocsay: *Letero al Julio Baghy*. En: ARGENTA DUOPO p. 11-15.

Funebra parolo de d-ro István Bácskai

Tre estimataj familianoj, estimataj funebrantoj!

Mi havas la dolorplenan, tristan taskon adiaŭi de profesoro doktoro Kolomano Kalocsay, de nia karega oĉjo Kálmán je la nomo de *Universala Medicina Esperanto-Asocio*, kies honora prezidanto li estis; en la nomo de la plej granda Esperanto-faka organizaĵo: *Internacia Fervojiŝta Esperanto-Federacio*; kaj je la nomo de *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj*.

La reprezentanto de la *Hospitalo Szent László* — kie la mortinto dum 46 jaroj en diversaj gravaj eĉ gvidpostenaj terenoj laboris — jam parolis detale pri la meritoj de Kalocsay. La reprezentanto de *Universala Esperanto-Asocio* kaj la *Akademio de Esperanto — same kiel la prezidanto de la Hungara Esperanto-Asocio* — antaŭ mi jam reliefigis liajn multflankajn por- kaj peresperantajn meritojn.

Mi nur povas substreki ununuran fakton ankoraŭ, nome: ke la bonega kuracisto, posedanto de multaj altaj distingoj, kaj unu el la plej elstaraj figuroj de la Esperanto-literaturo, restis ĉiam afabla, modesta homo, kiu amike helpis ĉiujn, kiuj turnis sin kiam ajn al li.

Altestimata nia amiko, adiaŭante de vi, ni povas nur danki al vi kaj al viaj estimataj familianoj vian noblan vivon, vian mirindan vivoverkon, per kiu vi donis neforgeseblajn ekzemplojn al ni kaj al niaj posteuloj!

Estimata, karmemora Kolomano, nia ŝatata oĉjo Kálmán, via ripozo estu paca!

*

ÊE LA KATAFALKO

Adiaŭas D-ro J. Lévai
De maldekstre: Parenco de Kalocsay, A. Csiszár, L. Kökény, ?

Adiaŭas D-ro Mátéffy: Parolas akademiano I. Rotkviĉ:
"Se terenfalas alta arbego" "Li apartenis al la titana gento"

Adiaŭas D-ro I. Bácskai:
"Via ripozo estu paca!"

La lasta vojo de Kalocsay

La vidvino kaj stiftilino

***"Finĝis unu grava epoko de la historio de Esperanto, tiu glora tempo,
kiam vivis Kolomano la Unua"***

ADIAŬAS POETO-FRATOJ

Gaston WARINGHIEN:

Adiaŭ al Kalocsay

Estis en malvasta ĉambro de la Budapeŝta kongresejo, kie la poeziamantoj dense kolektiĝis, por omaĝi al J. Baghy kaj al K. Kalocsay per la prezento de la jubilea libro "Ora Duopo". Kiam venis al Kalocsay la vico respondi, anstataŭ formalaj paroloj, li simple laŭtleĝis unu el el siaj lastaj tradukoj, pecon en la plej malnova epopeo "Gilgameŝ", la lamenton de la heroo pri la morto de Enkidu. El tiu malproksimega tempo lia arto de poeto kaj aktoro sciis revivigi tiun antikvan esprimon de ĉiuhoma doloro kaj doni al ĝi korfrapan aktualecon. Ankoraŭ post unu jardeko, eĥas en miaj oreloj la muĝo de lia sonora voĉo: kaj ni ĉiuj, la ĉeestantoj, restis kelksekunde mutaj, tuŝite de la potenco de tiu funebra kanto, en kiu oni subaŭdis ian profetan tonon. Kaj en ĉi tiu malgoja tago, mi ne povas forpeli de mia penso tiujn versojn:

La amiko ligita al mi firme,
Enkidu, amiko juna, ĉiopovulo,
ĉar ja kune ni iris al la monto dia. . .
Enkidu, amiko mia, Enkidu,
ĵus trafita estis de l' ĉiuhoma sorto.
Mi ses tagojn kaj ses noktojn ploris,
je la sepa mi igis meti lin en tombon.
Ve, la sorto de l' amiko premas min,
sur mi la sorto de l' amiko pezas. . .
La amiko plejamata iĝis polvo,
la amiko plejamata iĝis ter',
kiel la argilo iĝis Enkidu,
kiel la argilo, kiel flava kot'.
Ĉu mi same do devos sterna min,
ĉu mi devos same kuŝiĝi por ripozo,
kaj neniam plu releviĝi,
ve, neniam, dum eterno de l' eterno?

Jes, neniam plu parolos al ni tiu granda homo, kiu meritis okupi la unuan rangon tuj post Zamenhof, ĉar post la kreinto de Esperanto, estas li, kiu plej plene posedis la lingvon, plej profunde konis ĝiajn eblaĵojn kaj plej lerte utiligis ilin. Li postlasis al ni imitindan ekzemplon kaj senkomparan verkaron, el kiu granda parto restas, ho ve, neeldonita: ekzemple la tria parto de Vortfarado — de la Plena Gramamtiko, ame perfektigita jam en 1964 por la tria eldono, kiun interrompis la morto de St. La Colla; aŭ la 40 hungaraj noveloj, kies tradukon li anoncis al mi en 1972; aŭ la multaj poemoj tradukitaj por li longe karesata revo, la "Tutmonda Sonoro". Certe, ne estus pli bela omaĝo al lia memoro, ol se la esperantistaro trovus rimedon meti je ĉies dispono tiujn trezorojn: kaj tiu estus ia mildigo al la doloro de liaj amikoj.

(Laŭ la afabla permeso de G.Waringhien
represo el Esperanto 1976:marto, p. 41.)

*

William AULD:

La torĉportinto
(K. Kalocsay: memore)

Fine eĉ vin la morto nepra
forfalĉis, olda trobaduro
subite volvas min obskuro
funebra

kaj tra la mond' susurus certe,
pro ĉi sciigo, ĝemsuspiro
ke vi forpasis, kies liro
faklerte

nin sorĉis, kaj orfee sorĉos
nin plu. Fajrigis vi la flamon,
kaj daŭre nian panoramon
vo torĉos

dum en dezerto ni nomados —
starantaj nun epokoferme:
tiun epokon poreterne
nomados

la homoj "kaloĉaja", en la
kulturo, kiun vi verŝajne
ne agnoskemis ielajne
samĝenra

kun la kulturoj de l' nacioj;
amuzis vin — ĝi ŝajnis ja tro! —
ke ia Väinämöinen-patro
legioj

de l' juna disĉiplar' vin faris —
sed jes, sed jes! heroa bardo
vi estis: kvankam vi kun ardo
hungaris,

samtempe vin enretis fere
logo de l' "orfa idiomo" —
vi inter homoj estis homo
senpere,

kaj viajn talentegojn donis
al plenumado de mirakloj,
kaj ne rezignis se obstakloj
oponis.

Ah, Kolomano, fi kaj damne! —
ke vin mutigis mortbuŝumo,
kaj via facilflua plumo
nun jam ne

riĉigos nin per gloroj novaj!
Ĉu foje via Muz' aŭguris,
kiam poemojn vi poluris
belstrofaj,

ke kiam vi trans Stikson pramos,
silenta sur °arona benko,
ankoraŭ nia Fina Venko
iamos?

Negrave, ĉu? Popolo via —
ni, orfiĝintoj ĉe oazo —
ni, la neagnoskata bazo
socia

de l' lingvo monda — ni plu ardas! —
Ni estas firmaj! — kaj ni ŝuldas
la kulturbazon, kiu muldas
kaj hardas

nian Aferon tiel arte,
fortik-fieran kiel kverko,
al via verva vivoverko
grandparte.

Konsolo seka, ĉimamente.
Hodiaŭ sento de malpleno
pezas en mia tuta eno
lamente:

dum tridek jaroj vi inspiris,
lumante antaŭ mi sur pado;
subite ĉesis ĉi gvidado:
vi iris,

kaj "kio estis antaŭ tio,
post ĝi ne estas plu la sama" —
la verso, iam epigrama
nocio,

estiĝis tro realo. Homo,
vi estis unikulo brava,
kiun girlandas nun la prava
renomo,

kaj kiu neniam forgesiĝos
dum homoj sin al bela temo
de l' interhoma komprenemo
dediĉos —

eterna vivo siaspeca...
Al ni postrestas testamento
de l' poezia monumento
dieca:

tio sufiĉu. Triste, mute,
sentante ombra la parnason,
mi adiaŭe levas glason
salute.

*

Julius BALBIN:

Estas neeble*

Forpasis Kálmán Kalocsay.
Forpasis poet' sen popolo.

Estas neeble, tamen vere:
la korojn vringas preme — ve!
Forpasis verda orakolo —
vortmagiisto font' de l' formo,
de l' versostil', fondint' de l' skolo.

Estas neeble, tamen vere:
ni ĉiuj iĝis orfoj kaj
batali devos plu tra l' ŝtormo
sen la gvidinto, kies rolo
aŭtoritatis tiel klare.

Forpasis Kálmán Kalocsay
en februar' kaj jen jam maj'.

Estas neeble, tamen vere:
pro la giganta perdonormo —
el kiom da brustoj surtere
leviĝas ĝemoj de plend' kaj ve'
korrompe, lamente, senpove...

Forpasis Kálmán Kalocsay.
Forpasispasis poet' sen popolo.
Sonas la kant' de funebra ĥor'
tra l' mond' restinta sen konsolo,
tra l' intergenta diaspor'.

Tra la tuta kontinentkvinteto
ploras popolo sen poeto.

*La poemon voĉlegis W. Auld dum speciala memorkunveno de la 61-a UK en Athina.

Aldo DE' GIORGI:

Rondeltribute

Surfalis ŝoke la fatalo!
Gazetoj la novaĵojn ŝutis:
pro fin' homsorta iĝe mutis
l' arĝenta tril' de l' najtingalo.

Kaj ŝajnas kvazŭ ke l' regalo
beletra, kiun li atutis,
forfalis ŝoke, pro fatalo.
Gazetoj la novaĵojn ŝutis!

Ĉu iam, eble, l' madrigalo,
kiu en lia buŝ' liutis
tintados ree? (Ni servutis
rente de tia kapitalo

ĝis ŝoka frapo de l' fatalo!)

*

Asen GRIGOROV:

Forpasis Kalocsay

Ho, kia malfeliĉo granda!
Malĝojo nigra kaj malgaj!
forpasis la poet' giganta —
forpasis nia Kalocsay!

La poezion kun persisto
li muldis majstre kaj kun am'.
Li estis lingvokonstruisto,
El lia koro ŝprucis flam'.

Ruladas najtingaloj, merloj
en lia rava poezi!
Per siaj kantoj — brilaj perloj —
kun ni surtere vivos li.

Kreinto, kiu verkis febre,
fondint' de l' Budapeŝta Skol',
li lasis nin pri li funebri,
nin lasis orfoj, sen konsol'.

Sed ne! Per siaj versoj-flamoj
eterne vivos la poet':
per "Lenin", per la "Partizanoj",
per "La mesaĝo de Hikmet".

*

Ludmila JEVSEJEVA:

In memoriam
(Kálmán Kalocsay)

Amare venenigas la animon.
Forrabas tristo fortojn de l' kor'.
La tuta vivo — iluzi' kaj sonĝo,
Brulige senkompata rememor'.

De nun, por ni, fariĝas Vi legendo.
Ne mortos stelo, en eterna bril',
Ĉar via plumo skulptis monumenton,
El la marmoro, sed ne argil'.³⁵⁶

*

Jirí KORÍNEK:

Krevis la kordo

Krevis la kordo, kiu sonis
jardekojn majstre noblatone
instruis nin ekzemplodone,
al artoceloj altaj spronis.

Laŭ voj' de fajna lingvobelo
en lia verk' ni lernis paŝi,
trezorojn trovi kaj malkaŝi
sub la gvida torĉohelo.

Al pleja alto li ascendis,
al pint' Parnasa, kie ventis
kaj ofte ŝtormis ĉirkaŭ li.

Nun krevis la streĉita kordo.
Haltis la kor', plu vivos vorto
al funebrantoj post geni'.

*

356 Poste alvenis peto de Ludmila por ŝanĝi la lastan verson jene:
El ŝton' granita, sed ne argil'.

Aleksandr LOGVIN:

Rekviemo

"Ars longa, vita brevis est".
Poet' forpasis sur la glora krest' . . .

Poet' silentas. Kaj silentas tuto.
Filino³⁵⁷ ploras. Brilas larmoguto.

Silentas libroj. Vakas la penatoj.
Funebras Muzoj, kaj poeto-fratoj.

Finbrilis la vespera sunradio.
Orfiĝis ni kaj nia poezio. . .

Foriris bona hom' el nia rondo.
Malĝoje sonas kanto super mondo.

Reeñas Budapeŝta kampanilo
Per olda, granda, plenda sonorilo. . .

Ne venos Vi al hejmo familia.
Ne lumos plu por vi la suno dia.

Sed arto Via longe en lontano
Plu ravas koron de l' samideano.

Ne laŭro kaj ne bronzo por memoro,
Nur via poezio — via gloro!

Poeto bela, brila virtuozo,
Nesuperebla majstro en la prozo.

Kiel sorĉisto kun magi-efikoj
Vi helpis al kolegoj, al amikoj.

Laboris Vi talente kaj titane,
Miraklojn revivigis ellontante.

Kreitaj de Ŝekspiro kaj Gete, Dante
Vin laste akompanis, admirante.

Ho, Kolomano! Kara Kolomano!
Vi ĉiam estis paca civitano.

Ni kredu! Realiĝos revo Via
Pri nova mond' feliĉa, harmonia!

*

357 Logvin poste petis ŝanĝi la vorton: *filino* al *edzino*.

Johano Ph. PUNT:

Non moritur...

Non moritur, cuius fama vivit.
(Ne mortos tiu, kies famo vivas).

Sonon de via voĉo mi ne konis,
nek premis iam vian manon mi:
sed kiom ofte mi ekstaze dronis
en via senkompara poezi'.

Hefesto forĝis sceptron kaj egidon
por Zeŭso kaj armaĵon por Aĥil'.
Vi Esperanton armis per fido
kontraŭ malico, moko kaj paskvil'.

Jam dum la vivo estis vi legendo,
Kunigis nin sub poezia tendo,
rikoltis jam la dankon de l' popol'.

Pri stulta anatem' rikane ridu
Al amikar' fidele vin konfidu
sub via orabrila aŭreol'.

*

Reto ROSSETTI:

Je la morto de kara amiko

Mi staras sur altaĵo kaj kun okul' medita
Rigardas tra l' pejzaĝo, sur kiu nuboj velas,
trenante siajn ombrojn en naĝo onde glita.

La ŝanĝa panoramo jen brilas kaj malhelas
kun rido kaj minaco sub freŝa venta pel'.
Jen unu folieto en kirlo karuselas

kaj falas sur la teron — ridinda bagatel',
sed ŝajnas ke pro tio la tuta mond' ŝanĝiĝas,
ĉar mankas unu ero kaj falis unu stel'.

Nun vortoj jam ne helpas,

kaj larmoj ne sufiĉas.

*

Lajos TÁRKONY:

Kalocsay mortis!

La plej bona amiko, la plej bona poeto de Esperanto, la plej simpatia kaj bonkora homo mortis!

Apenaŭ dudekjara mi estis, kiam en la esperantaj kunvenoj ni ekkonis unu la alian kaj ni interamikiĝis, kaj kiam komencis aperi *Literatura Mondo*, li komencis doni al mi taskojn por la revuo. Kaj tiel mi fariĝis poeto, verkisto en Esperanto. Sed ankaŭ en la neesperantista literaturo li vekis mian atenton pri interesaj libroj kaj tiel evoluigis miajn literaturajn konojn.

Sed li estis ankaŭ bonega kuracisto kaj dum nia interamikiĝo li konstante flegis mian sanon, plurfoje mi kuŝis en lia hospitalo kaj ĉiam li sendis min hejmen resaniĝinta.

Kaj nun mi estas malsana kaj mi jam ne povas al li plendi...

Kalocsay mortis! Homo de belo, de amo, de bono — mortis!

Mi ploras.

*

Kondolencoj

Pro la forpaso de sia honora membro kaj giganta kontribuinto al Esperanto Kolomano Kalocsay Universala Esperanto-Asocio esprimas siajn profundajn kondolencojn. Lia spirito daŭre vivos en la tuta esperanta kulturo.

H. Tonkin prezidanto de UEA.

*

La membroj de Literatura Esperanto-Rondo en Sofio sendas al la estimata familio de la karmemora K. Kalocsay kaj al ĉiuj hungaraj esperantistoj siajn plej sincerajn kondolencojn lige kun la morto de nia granda poeto, verkisto, lingvisto kaj Esperanto-pioniro.

Kalocsay estis la plej granda figuro en la Esperanta literaturo. Ni bulgaraj esperantistoj studos liajn verkojn, lernos de li, legos kaj amos lin.

Asen Grigorov.

*

Estimataj Hungaraj Amikoj.

Profunde tuŝis min la sciigo pri la forpaso de la eminenta esperantisto kaj verkisto, neforgesebla Kolomano Kalocsay.

La morto de Li estas nemezurebla perdo ne nur por vi, hungaraj esperantistoj, sed por la tutmonda esperantistaro. Kun lia nomo restos por ĉiam la konscio pri Lia granda majstreco super nia lingvo kaj la memoro pri bona kaj amika homo.

Akceptu miajn plej sincerajn kondolenc-esprimojn kaj kunsenton en via doloro.

Lech Kosieniak, komitatano de UEA,
estro de Pola MEM-sekcio.

*

Pere de Universala Esperanto-Asocio mi ricevis la dolorigan informon rilate la morton de s-ro Kolomano Kalocsay.

En la nomo de estraro kaj de la membraro de la Nederlanda Esperanto-Asocio mi tutkore volas kondolenci vin pro tiu grava perdo. La morto de s-ro Kalocsay estas grava bato por la tuta Esperanto-Movado; kiom pli por la Hungara Asocio. Estu certe, ke ni suferas kun vin ĉi tiu malĝoja tempo.

Mi petas, ke vi transdonu niajn kondolencojn ankaŭ al la parencoj de nia kara mortinto.

Kun sinceraj salutoj, Kooij Waal
sekretariino L. E. E. N.*

*

Elkorajn kondolencojn okaze de la forpaso de granda homo kaj esperantisto Kalocsay.

Esperanto-Centro Paderborn.

*

* "La Estonto Estas Nia".

Profunde kondolencas pro la forpaso de la plej granda Esperanto-verkisto Kolomano Kalocsay.

Heroldo de Esperanto

*

Eksciinte pri la forpaso de nia eminenta vianacia d-ro Kálmán Kalocsay, ni esprimas al Vian varman kondolencon. Ni esperu, ke aliaj laboristoj de Esperanto elĝermos el via prosperanta Esperanta movado kaj atingos lian altan nivelon.

Plejestime viaj

Sokratis Sakellaropoulos, prezidanto.
Katerina Diamanti ĝenerala sekretario.
Supera Helena Esperanta Instituto

*

Kara Sinjorino Kalocsay.

Kunpremita koro mi esprimas al la funebranta familio mian kunsenton pro la forpaso de via kara edzo, mia amiko, kun kiu — en nia jun- kaj mezaĝo — tiel ofte "kunludis" antaŭ E-publiko. Jes, nia Kálmán estis brilanta stelo, kies lumo plu brilos sur la Esperanta ĉielo.

Kun alta estimo kaj mankiso
Mihály Sárosi.

*

Ni sciigis kun granda doloro pri la forpaso de eminenta esperantisto D-ro K. Kalocsay. Tio estas granda perdo ne nur por la hungara, sed por la tuta Esperanto-movado.

La multflanka agado de D-ro K. Kalocsay — precipe sur la lingva kaj literatura kampo — estis kolosa kaj meritas nian tutan admiron kaj dankemon.

Ni neniam forgesos, ke li — kun sia nesuperebla majstreco — tradukis, interalie, ankaŭ el la rumana poezio. La nomo de D-ro Kalocsay restos ĉiam por ni respektinda kaj karmemora.

En la nomo de Kunordiga Rumana Esperanto-Komitato kaj de la rumana esperantistaro, bonvolu akcepti nian sinceran kondolencon kaj transdoni ĝin ankaŭ al la familio.

Prof. d-ro Aurel Boia, vicprezidanto.

*

Kun li malaperis brilanta stelo sur la firmamento esperantista. Li antaŭenpuŝis nian movadon kune kun aliaj pioniroj. Ne eblas per vortoj esprimi liajn meritojn. Nur malmultaj suprenlevis la torĉon de nia ideo tiel obstine, tiel forte kiel li. Ni kondolencas al la Hungara Esperanto-Asocio, kies fervora akcelanto li estis.

Franz Schick,
en nomo de Redakcio de l' Internaciisto,

Kolektivo esperantista komunista.

*

Altestimata Sinjorino Kalocsay. En via granda funebro akceptu nian sinceran kunsenton kaj kondolencon.

Sekretario de la Societo de Hungaraj Verkistoj.

Kara S-rino Kalocsay.

Korbatis min la sciigo, ke mia plejamata amiko Kálmán forlasis la teran mondon. Tamen ni estu dankaj, ke li dum longa tempo vivis inter ni, multajn valorajn verkojn, multajn saĝajn konsilojn kaj sinceran amikecon donis al ni ĉiuj. Doloriga estas por mi la penso, ke — eĉ se tion mia sanstato ebligus — mi ne povas lin viziti en via agrabla hejmo, en la artista metiejo de la mirinda kreinto de Belo.

Bonvolu akcepti mian plej sinceran kunsenton kaj kore mi deziras al vi sufiĉan forton por elteni ĉi tiun dolorigan perdon.

Kun mankisoj kaj salutoj Paŭlo Balkányi.

*

La Helena Esperanto-Movado priploras la forpason de la granda aŭtoro de la Esperanta beletristiko kaj kompara filologio d-ro Kolomano Kalocsay. Tiu elstara personeco sekure eniras en la panteonon de la lumo eterna.

Eliopulos prezidanto de M.E.R.K.S.E.

*

NEKROLOGOJ

- Prezidantaro de Hungara Esperanto-Asocio: *Kálmán Kalocsay (1891-1976)*. Oficiala komunikaĵo. (Kunmetis A. Csiszár).
- Cirkulero de HEA 1976: 2, p. 2; repr. HV 1976: 2, p. 21. Vd p. 1.
- Varga-Haszonits, Zs.: *Kalocsay Kálmán (1891. október 6.-1976. február 27.)*
EM 1976: 2, p. 11.
- Major, J.: *Omaĝo al Kolomano Kalocsay*.
NZE 1976: Marto, p. 1-2; repr. NZE 1991: Novembro, p. 1-2.
- T(arján), I.: *Kalocsay Kálmán emlékére*. (Memore al Kálmán Kalocsay).
Déli Hirlap (Tagmeza Gazeto) 1976.03.24.
- Waringhien, G.: *Adiaŭ al Kalocsay*.
Esperanto 1976: Marto, p. 41. Vd p. 14.
- Tonkin, H. R.: *Ni estu dankaj, ke Kalocsay vivis*. (Fragmento de omaĝo parolado en la Londona E-klubo la 5-an de Marto).
Esperanto 1976: Marto. p. 42-43. Vd p. 69.
- Rossetti, R.: *La fino de klasika epoko*.
Esperanto 1976: Marto, p. 45-46.
- Benczik, V.: *La vivoverko de Kalocsay estas nia riĉa vivanta lingvo*.
Esperanto 1976: Marto, p. 47-50; repr. derE 1976: 4, p. 4-9.
- Kalocsay ne plu inter ni*. (Bio- kaj bibliografiaj indikoj).
HdE 1976: 4-5 (1593-94), p. 1, 6.
- Bácskai, I.: *Ni adiaŭas de Kálmán Kalocsay*.
HFM 1976: 1, p. 1.
- Kökény, L.: *Prof. Kálmán Kalocsay (1891-1976)*.
HFM 1976: 1, p. 14-15.
- Kökény, L.: *Forpasis nia Kálmán Kalocsay*.
BI 1976: 4, p. 1-2.
- Rotkvič, I.: *Li apartenis al la "titana gento"*. (Enteriga parolo).
Esperanto 1976: Aprilo, p. 64-65. Vd p. 8-9, 12.
- Kolomano Kalocsay*.
TWE 17-03-76; repr. W. P : KEG 1976: 5, p. 58.
- Mátyás, I.: *Kalocsay Kálmán*.
Élet és Irodalom (Vivo kaj Literaturo) 1976.03.06. p. 7.
- Anonime: *1891 — Kálmán Kalocsay — 1976*.
Agu kaj Fidu 1976: Marto, p. 1-2.
- Anonime: *Kolomano Kalocsay (1891-1976)*.
BrE 1976: Marto-Aprilo (810), p. 108.
- Tófalvi, É.: *Pri la E-literaturo kaj pri Kálmán Kalocsay*.
En dissendo de Hungara Radio 1976.03.16.
- Hauptenthal, R.: *Senlaca titano de nia parnaso. Okaze de la morto de Kálmán Kalocsay*.
(Represo el: GER 1966: 10, p. 97-98, 106).
Horizonto 1976: 2, p. 25-28; Dialogo 1976: 2 (13), p. 19-22;
Eŭropa Esperanto-Revuo 1976: 2, p. 4-6.
- Waringhien, G.: *Kelkaj memoraĵoj pri li...*
Horizonto 1976: 3, p. 54-55.
- Hauptenthal, R.: *La dua morto de Peter Peneter*.
Horizonto 1976: 3, p. 55-56.
- H. J.: *Kalocsay Kálmán hamvaira*. (Al la cindro de Kálmán Kalocsay).
Új Ember (Nova Homo) 1976.04.18.

"PA" *Forpasis granda homo granda esperantisto.*
Pacaktivulo 1976: 105, p. 4.
Goodheir, A.: *Kálmán Kalocsay 6 okt. 1891 – 27 febr. 1976.*
ESk 1976: 102, p. 7-8.
Silfer, G.: *K. Kalocsay.*
LF 1976: 36, p. 9.
Anonime: *La lasta vojo de Kálmán Kalocsay.* (Kun bildoj)
HdE 1976: 7 (1596), p. 1.
Kökény, L.: *Kálmán Kalocsay 1891-1976. Adiaŭ de nia Kalocsay. La lastaj tagoj. La funebra ceremonio.*
BI 1976: 5, p. 1-2.
Boulton, M.: *Ave atque vale!*
LE 1976: 4, p. 34-35.
Morariu, T.: *Nia plej modela stilisto.*
LE 1976: 4, p. 35.
Levsen, P. (Detlev Blanke): *Poet und Linguist des Esperanto.* (Poeto kaj lingvisto de Esperanto).
Der Morgen 1976.05.28. p. 7.
Ferenczy, I.: *Dr. Kalocsay Kálmán (1891-1976).*
Orvosi Hetilap (Medicina Semajna Gazeto) 1976.05.16.
Tarján, I.: *A nevét 84 országban ismerik. Miskolc emlékszik-e rá?* (Lian nomon oni konas en 84 landoj. Ĉu oni rememoras lin en Miskolc?)
Déli Hírlap (Tagmeza Gazeto) 1976.05.17.
Grigorov, A.: *Kolomano Kalocsay.*
BE 1976: 6, p. 8-9.
Anonime: *Kolomano Kalocsay.*
Bona Espero 1976: Junio (2), p. 6.
Balkányi, P.: *Pri Kalocsay en Hungara Katolika Revuo.*
Espero Katolika 1976: 6, p. 93-95.
Kurucz, G.: *K. Kalocsay (1891-1976).*
Juna Amiko 1976: 2-3, p. 3.
Eminenta Esperanta Verkisto mortis.
Internacia Gazetara Servo 1976: Majo (202), p. 2.
Anonime: *"La poeto de poetoj".*
Franca Esperantisto 1976: Aprilo-Majo (105), p. 4.
Adiaŭo de K. Kalocsay.
Pilo-Press 1976: Aprilo (14), p. 1.

RENKONTIĜOJ, KONTAKTOJ KUN KÁLMÁN KALOCSAY

El Budapeŝta Kajero

Rememoroj pri du neforgeseblaj renkontiĝoj kun la karmemora Kolomano Kalocsay

Fino de septembro 1969. Por mia, jam la tria eksterlanda Esperanto-vojaĝo, mi denove elektis mian plej ŝatatan jarsezonon — la oran, buntkoloran aŭtonon.

La rapidvagonaro "Moskva-Budapest" sen iuj aventuroj komforte veturigis min de la ĉefurbo de Ukraino Kievo ĝis la belega ĉefurbo de Hungario. Sur la perono de la impona stacidomo, kun aliaj samideanoj, min jam atendis tre afabla hungara samideano János Szilágyi, kun kiu mi konatiĝis en septembro 1968 dum la IV-a Internacia Esperanta Feriado, "Ora Pola Aŭtuno", en Miedzygórze, kaj kiu tre bone kaj zorgeme aranĝis mian Esperantan programon en Budapeŝto.

Samvespere — agrabla promenado tra la bele lumigita urbo, kiu admiris kaj enamiĝis min je si de la unuaj minutoj. Dum postaj tagoj pli profunda konatiĝo kun la vidindaĵoj de la belega hungara ĉefurbo kaj ĝiaj pitoreskaj cirkaŭaĵoj. Riĉegaj muzeoj, koncertsalonoj, bonega zooĝardeno, Fiŝbastiono, la preĝejo Matiaso, monumento Gerharo, la rivero Danubo (prikantita verŝajne en ne malpli nombraj kantoj kaj poemoj ol nia glora rivero Dnipro), la insulo Margareta kun ĉarma parko ombroplena, fabela akvofalo, kaj abundaj, multkoloraj floroj, eĉ speciala restoracio "Esperanto", kien mi estis invitita fare de la tre afabla prezidantino de "Egressy-klubo", s-anino Mici Khek Jurák, ĝuste en mia nomtago, la 30-an de septembro... Ĉion ĉi certe ne eblas forgesi. Jes, multon neforgeseblan vidis kaj admiris mi tie, dum mia pli ol kvarsemajna vojaĝo tra la bela Hungario.

Kompreneble mi strebis pli profunde konatiĝi kun la tre vigla agado de Esperanto-kluboj en Budapeŝto por transpreni ilian sperton, starigi senperajn kontaktojn kun famaj Esperanto-kulturagantoj, miaj kolegoj, literaturistoj. Kaj, kompreneble plej varmega deziro: persone konatiĝi, respektoplene premi la manon de la "viva legendo", klasikulo de la Esperanto-literaturo, d-ro Kolomano Kalocsay, pri kiu mi jam multe aŭdis kaj iom legis.

Fortuno mia favoris min, kaj preskaŭ ĉiuj miaj tiutempaj revoj kaj aspiroj plenumiĝis. Starigi kontaktojn kun kelkaj Esperanto-kluboj afable helpis min mia akompananto kaj libervola "persona sekretario", kiel li mem sin ŝerce nomis, k-do Szilágyi. (Parenteze mi mencias, ke li helpis al mi plenumi ankaŭ "sanktan devon" de ĉiu esperantisto: surmeti florbukedon sur la tombon de la karmemora Esperanto-paĉjo, Julio Baghy). Kaj pri mia unua renkontiĝo kun Kalocsay interkonsentis pertelefone same s-ano Szilágyi, pro kio mi estas profunde dankema al li.

Mi scias rakonti pri la vizito ĉe kalocsay iom pli detale, ĉar feliĉe mi retrovis antaŭnelonge en mia neordigita arkivo la rapidmane faritajn freŝimpresajn notojn en la "Budapeŝta Kajero" (siaspeca konciza vojaĝa taglibro), kaj tio bone helpis al mi revivigi, restarigi la detalojn, etoson, atmosferon de tiuj neforgeseblaj renkontiĝoj, por ĉiam gardantaj en la fundo de mia animo.

La unua renkontiĝo estis fiksita de la Profesoro je merkredo, la 24-an de septembro, vespere. Je la 19 horo, kiel konsentite, mi kun mia kara mastrino, s-ino Éva Báthory jam estis ĉe la strato Nyúl (kuniklo), n-ro 4. Malnova domo. Interne de la portalo spuroj de la kugloj sur la oldaj muroj, ĝis nun videblaj postsignoj de la lasta mondmilito...

Atinginte la enirpordon, mi sonorigis, malfermis al ni afabla virino, la edzino. Ŝi alkondukis min en la laborĉambron de Kalocsay.

Altega plafono, ĉe la muroj ĉie libroŝrankoj kaj librobretaro plen-plena. Portreto de iu bela juna virino sur la muro kontraŭe de la skribotablo. Kiel poste mi eksciis, ĝi estas portreto de la patrino de Kalocsay, kiu mortis tre junaĝe. Malnovaj apogseĝoj, kanapo. Floroj sur la tablo. Nenio superflua. Apartamento de inteligenta homo, pensulo, estetikulo.

Kaj la mastro mem — altkreska, malgrasa, bonkore ridetanta olda viro kun tute senhara brila kranio kaj altega frunto (li havis tiam 78 jarojn). Sed tiu oldulo elradiis energion, internan flamon, kaj liaj okuloj brilis june... Tia estis la unua impresio.

Ni konatiĝis, kaj tuj komenciĝis vigla interparolado, kvazaŭ ni estus jam delonge konataj. Ni konversaciis iom ĥaose, transsaltante de unu temo al la alia, ĉar estis tiom multe por rakonti, komuniki unu al la alia. Mia nova amikino-mastrino Éva, modeste sidis iom flanke kaj silenteme observis nin: evidente, ŝi ne povis sekvi nian tro rapidan konversacion.

De la unuaj minutoj tiu eksterordinara homo ĉarmis min per sia modesteco, vera inteligenteco, per mirinda multflankeco, anima juneco kaj entuziasmo. Antaŭ tiaj homoj oni ne povas ne klini respektplene la kapon. Kaj mi sentis min feliĉa kaj dankema al mia sorto, alkondukinta min ĉi tien.

Kontaktiĝante kun Kalocsay, oni tuj povis konkludi, ke tiu homo ne imagas por si eĉ unu tagon sen krea laboro. Kaj fakte li unusola faris, kontribuis por la Esperanto-movado, por ĝia kulturo multe pli da spiritaj valoraj ol centoj da ordinaraj samideanoj. Ne ofte ja alvenas en la mondon geniuloj, tiel riĉege naturdotitaj kiel Kalocsay, kaj feliĉe ke li sindone dediĉis sian intelekton kaj neordinarajn kapablojn al nia lingvo Esperanto. Vera homotitano — titano de la penso kaj laboro estis Kálmán Kalocsay.

Li montris al mi presprovaĵajn foliojn de liaj tradukoj el la poemoj de Sándor Petőfi, jam pretan manuskripton de "La Tempesto" de Shakespeare kaj ĉ. 4000 esperantigitajn hungarajn-Esperantajn proverbojn kaj parolturnojn, jam preskaŭ pretajn por presado. Mi trafolumadis tiun trezoron, dume Kalocsay entuziasme rakontis: la inicianto de la ideo estas sufiĉe juna ĵurnalistino kaj tre fervora esperantisto. Ŝi planas — krom ĉi tiu hungara-Esperanta kolektaĵo preperi kaj eldonigi en Kanariaj Insuloj Esperantan frazeologian vortaron, kiu enhavos ĉ. 6000-8000 da diversaj internaciaj proverboj, idiomoj esperantigitaj. Li mem verve apogas tiun ideon, helpas, redaktas, elektas, kribras, ktp. Kaj tuj, sen ia paŭzo, li proponis al mi ankaŭ kunlabori en tiu t.n. "Domfabriko", kunmetota kvazaŭ kiel el brikoj el diversnaciaj idiomoj. Li promesis — poste, kiam mi revenos Kievon — sendi al mi la jam retajpitajn parton de la manuskripto por trarigardo, eventuala korekto kaj aldono el niaj naciaj, ukrainaj proverboj kaj idiomoj, ĉar mi "fanfaronis", ke nia proverbaro ankaŭ estas tre varia kaj abunda.

Kompreneble mi kun granda ĝojo kaj sama entuziasmo kunsentis kunlabori, dankinte pro la honoro kaj konfido. (Kurante antaŭen: mi komencis studi Esperanton nur en la fino de la jaro 1965, do ne konsideris min tro sperta esperantisto. Tial, kaj ankaŭ pro diversaj malfavoraj cirkonstancoj, troa okupiteco, mi transdonis tiun honoran, sed ege temporaban mision al la pli sperta, samlandano mia, s-ano Andreo Rogov, kiu sendis la materialon al Ludmila Jevsejeva. Tamen, kiam aperis tiu valora frazaro en 1975, mi ricevis ĝin donace de s-ino Ada Csiszár, je mia granda ĝojo).

Ĉe tiu vizito Kalocsay donacis al mi la volumon "Ora Duopo" kun kelkvorta aŭtografo, subskribita sub lia tutaĝa portreto: "Al Nadia Andrianova — tre kore K. Kalocsay". Tiu libro kun propramane aŭtografo de d-ro Kalocsay estas unu el la karaj valorajoj de mia Esperanto-biblioteko. Mi ĝojas, ke mi tiutempe "pekis", dirante, ke mi tiun libron ne havas, kvankam antaŭ unu jaro, vizitante Varsovian Esperanto-klubon, mi aĉetis ĝin en tiea butikio.

Nia vigla interparolo daŭris ĉirkaŭ du horojn, kaj se mia amikino Éva ne komencus de tempo al tempo rigardi je horloĝo, ni povus, ŝajne konversacii senfine. Sed krom ĉio ne decidis trouzi la afablecon de nia mastro kaj forrabi lian valoregan tempon.

Dum tiu unua vizito mi preferis pli multe aŭskulti ol mem paroli, kaj avide mi ensorbis ĉiun vorton de tiu eminentulo de Esperanto. Tamen mi sukcesis respondi al liaj demandoj, rakonti pri mia laboro super la traduko de la verkoj de Vasiliĵ Eroŝenko en ukrainan lingvon. Kalocsay atente aŭskultis min, demandis pri diversaj detaloj, la temo, evidente interesis lin. Li rakontis pri la Universala Kongreso en Helsinko (1922), kiun partoprenis ankaŭ Eroŝenko. Evidentiĝis, ke Kalocsay ne estis intime konata kun Eroŝenko, nur vidis lin kaj interŝanĝis kelkajn frazojn.

Antaŭ ol foriri mi donacis al Kalocsay du numerojn el la modestaj bultenoj "Tra Soveta Ukrainio" kompilita kaj redaktita de mi en 1968-1969. Do komencis ni finfine adiaŭi kaj... ankoraŭ babilis jam starante, pli ol kvaronhoron, neniel ni povis paroli ĝissate. Kalocsay volis al mi ankoraŭ montri ian libron, foriris, pardonpetinte, alian ĉambron, sed post kelkaj minutoj revenis, ne trovinte la serĉatan volumon. Li diris: "Oni ne devas kredi, kiam mia edzino asertas, ke ŝi faris ĉie ordon, ĉar nun mi nenion povas trovi sur la kutima loko." Kaj mi ridetis kompreneble: la samo ja estas ĉe mi.

Finfine, adiaŭinte de Kalocsay, mi forlasis tiun gastaman domon, al kiu revenas kaj strebas pilgrimadi multaj esperantistoj. Mi estis tre feliĉa kaj ĝojis kiel knabino-lernantino, malgraŭ mia jam sufiĉa solida aĝo. Jes, vere, tute ravis min tiu elstara homo per sia ĉarmo, potenca intelekto, kolosa erudicio kaj tiel enviinda laborkapablo. Kaj kiam li, jam je la sojlo, demandis ankoraŭ pri nia ukraine poeto-profeto Taras Ŝevĉenko — ĉu oni povas trovi ion el liaj poemoj en Esperantaj tradukoj — mia koro estis jam plene konkerita...

Al mia provizora komforta azilo (en la strato Kacsá) mi revenis forte emociigita, plene plenigita per freŝaj impresoj de tiu renkontiĝo kaj longe mi ne povis ekdormi. Kaj subite en tiu sendorma nokto ekregis min la ideo: peti lin, ke li konsentu esti titola redaktoro de la jam preskaŭ kompilita de mi poemkolekto de Ŝevĉenko en Esperanto, kaj li proponu tian eldonon ĉe "Stafeto", kun kiu, laŭ liaj propraj vortoj, havas intimaj kontaktojn. Mi jam pripensis antaŭe, kiel mi aranĝos la retajpadon de la tradukoj, korektos la manuskripton kaj sendos al Kalocsay kune kun la originalo "Kobzaro". Kalocsay modeste diris dum mia interparolo, ke inter aliaj Eŭropaj lingvoj li pli-malpli posedas ankaŭ la rusan, ĉar studis ĝin iam, kaj li demandis, ĉu tre similas ĝi al la Ukraina? Jes, jes. Eĉ se mia nomo kiel kompilinto tute ne estus menciita en tiu Ŝevĉenko-libro — nur ke la poemkolekto aperu altnivele por la Esperanta legantaro — mi estus feliĉega...

Mi decidis denove telefoni al Kalocsay, peti lin pri ankoraŭ unu nelonga aŭdienco. Dum kelkaj tagoj ĉiuj miaj provoj fiaskis, mi ne sukcesis kapti pertelefone d-ron Kalocsay, kaj sen anticipa interkonsento mi ne kuraĝis viziti lin.

Finfine — kiel oni diras: la rado de l' Fortuno sin turnis — mi kaptis la Profesoron (evidentiĝis, ke mi erare enskribis la telefonnumeron) kaj li difinis la daton kaj tempon de nia nova rendezuo: 01.10.1969. — merkrede je la 14-15 horo. Bonege.

Do la sorto vere favoris al mi des pli, ĉar intertempa parolado kun s-ano Lajos Kökény, mi eksciis, ke antaŭnelonge li parolis kun Kalocsay pri eventuala aperigo de la interesa rakonto: "Danuba etudo" de la fama ukraina verkisto O. Hanĉar, tradukita de mi. S-ano menciis, ke Kalocsay deziras pli viglajn kontaktojn kun mi, kaj tiu informo tre ĝojigis min.

Do, kiel interkonsentis, duonhoron antaŭ la tria per la aŭtobuso 39 mi veturis al la strato Nyúl. Oni jam atendis kaj tre varme akceptis min la gemastroj, regalis per bongustaj kukoj, per aroma kafo kaj per bonega vino nomata "Griza monaĥo el Badacsony". Tiu vino estas produktata laŭ malnova recepto de la iama monaĥejo — kiel klarigis al mi Kalocsay.

Kaj dum tiu regalado mi konversaciis kun Kalocsay, same kiel unuafojon, preskaŭ senpaŭze. La diversaj temoj, interesaj por ni ambaŭ ne elĉerpiĝis. Mi prezentis mian ideon pri la esperantigita poemkolekto de Ŝevĉenko. Kalocsay promesis skribi al Prof. Régulo Pérez kaj konsentis korekti, poluri la poemkolekton kiel redaktoro. Mia koro ekjubilis de ĝojo, ĉar aperis la eta fajreto de l' espero, ke eble iam mi tamen ekvidos mian revon efektivigitan. Kaj mi anticipe korege dankis Kolomanon Kalocsay, pro liaj klopodoj kaj helpoj estontaj.

Tuj post tio konsento mi konfesis, ke mi revas eldoni iam kaj ie ankaŭ mian estontan libron pri Eroŝenko. Sed tiu mia ideo ne elvokis lian grandan intereson — ĉu ne pro tio, ke ĝis la finverko de tiu laboro estas ankoraŭ longa distanco?

Kalocsay diris, ke lin mem ankaŭ interesas tiu neordinara naturdotita blindulo, kaj li komencis skribi eseon pri Eroŝenko³⁵⁸ kaj intencas iomete redakti liajn Esperantajn versaĵojn, ĉar siatempe la blinda poeto-aŭtodidakto ne havis bonajn redaktorojn, pro tio iufoje liaj rimoj estas sufiĉe primitivaj kaj postulas ian poluradon. Almenaŭ nun ili estu polurataj, do li, laŭ sia kutimo, volas neniom ŝanĝante la enhavon, iom korekti la versaĵon, malgraŭ tio, ke iuj kolegoj-kontraŭuloj siatempe sufiĉe akre riproĉis lin pro tio. Kaj post tiu "konfeso", alportinta kelkajn tajpitajn foliojn, li laŭtleĝis la unuajn skizojn de la "Antaŭdiro de la ciganino" kaj la "Lulkanto" de Eroŝenko kun siaj korektoj. Mi devis konstati, ke la poemo multe gajnis, kvankam la korekto ne estis tro abundaj.

Ni tuŝis ankoraŭ multajn temojn dum tiu konversacio, denove iom ĥaose kaj senorde. Inter aliaj mi demandis pri la sorto de mia Esperanto-traduko de "Danuba etudo", sendita por *Hungara Vivo*, Kalocsay faris ian noton en la notlibro kaj promesis nepre zorgi, ke ĝi aperu en la revuo (kaj vere ĝi poste aperis tie). Samtempe Kalocsay petis min aranĝi la Esperantan tradukon de la versaĵo dediĉita al Sándor Petőfi, fare de nia kieva poeto L. Pervomajskij, sed mi proponis fari alimaniere: post la hejmenreveno mi sendos al li laŭvortan Esperanto-tekston de la poemo kun ĉiuj necesaj klarigoj kaj komentoj, kaj li mem traduku ĝin; neniu ja povas fari tion pli bone. Kaj tiel ni interkonsentis, kaj mi plenumis mian promeson kun la helpo de la aŭtoro, kiu sendis al mi la tekston de la originalo.

Esperanto tradukojn de la poemoj de Taras Sevĉenko kun la teksto de la originalo mi ankaŭ promesis sendi al Kalocsay. Sed bedaŭrinde, tiu mia ideo fiaskis pro "objektivaj kaŭzoj" kiel sufiĉe ofte okazas ĉe multaj Esperanto-eldonoj, pri kio mi ne povas pensi sen granda afliktiĝo.

Dum ĉi tiu dua mia vizito ĉe Kalocsay, mi ricevis de li ankoraŭ unu valoran librodonacon, poemkolekton de la estona Esperanto-poeto Hendrik Adamson: "Vesperkanto", eldonitan en la serio de "Beletraj Kajeroj". Tiu poemaro tre plezurigis min kaj pliriĉigis mian tiutempe ankoraŭ sufiĉe malriĉan Esperanto-bibliotekon.

Laŭ mia peto Kalocsay enskribis kelkajn vortojn en mian Esperanto-memorlibron. Jen:

Kun granda ĝojo mi ek-
konis la karan samideaninon Nadija, kaj
tiom pli ĝojas, ke mi
esperas trovi en ŝi kun-
laboranton por nia
Domfabriko, kaj jen,
ankaŭ Eroŝenko!
Kiom da komunaj in-
teresoj ni havas. La
mondo estas malgranda —
oni diras. Sed ne — ĝi
estas granda, tamen
grandaj koroj ĝin
povas plenigi!
Kun tre koraj bondeziroj
IX/969, Budapest K. Kalocsay

*

Preskaŭ tri plenajn horojn daŭris tiu renkontiĝo kaj mi tute ne rimarkis, kiel rapide forflugis la tempo. La horloĝo montris jam la sesan horon kaj min atendis samvespere alia por mi tre interesa rendezuo kun la ĵurnalistino Ada Csiszár, pri kiu tiel varme kaj estime parolis Kalocsay, kaj kun kiu mi tre deziris konatiĝi persone. Mi kun bedaŭro adiaŭis de la admirinda mastro kaj lia afabla edzino, dankante sincere pro ilia gastamo.

Poste mi de tempo al tempo korespondis kun Kalocsay, tamen tiuj kelkaj leteroj kaj gratulkartetoj, novjaraj bondeziroj de la Profesoro, bedaŭrinde, senspure perdiĝis en mia neordigita "paperĝangalo" kiel mi nomis mian Esperanto-arkivon, kaj ĝis nun mi vane provis trovi ilin.

Sed tiu du neforgeseblaj renkontiĝoj profunde engravuriĝis en mia memoro kaj koro, gardata tie ĝis la fino de mia vivo.

Nadija ANDRIANOVA
Januaro 1981 — "Peredelkino"

"Domo de Kreado" apud Moskvo.

358 Kalocsay en 1963 prelegis pri Eroŝenko en la Grupo Konkordo. Lia prelego aperis en: DPr p. 71-77.

Renkonto ĉe Kalocsay

Invitite al interlingvistika seminario en 1971 ĉe la Universitato de Budapeŝto mi apartenis al la feliĉuloj, kiuj havis la eblecon viziti profesoron Kálmán Kalocsay.

Estis la vespero de 28. 4. 1971.

D-ro Szerdahelyi gvidis la malgrandan grupon al lia hejmo.

Kalocsay, altstatura kaj iel memoranta pri simpatia mefistofelo, nin afable salutis. "Ah vi estas tiu", li surprizis min, "kiu korektis la difinon pro 'materialismo' en PIV." Mi konfuzridete jesis. Kia bona memoro! Ni komforte kunsidis kaj iom babilis. La italo, Valerio Ari, el Milano (Giorgio Silfer) faris intervjuon por la revueto "Literatura Foiro". "der esperantist" en n-ro 50 (novembro-decembro 1971, p. 15-16) reprenis ĝin.

Kalocsay parolis pri siaj planoj. Ĝus aperis lia traduko "La tempesto" de Shakespeare.

Lia tajpilo sur la skribotablo kuŝis laborpreta. Evidente, alveninta ni estis interrompintaj lian skribadon.

Al "der esperantist" Kalocsay iam skribis, laŭdante ties enhavon kaj speciale menciis "Deutsche Redensarten und Redewendungen in Esperanto" de Curt Kessler. Li utiligis tiun materialon por sia lasta verko "Domfabriko", 6000 (sesmil!!) frazeologiaj esprimoj hungaraj-Esperantaj (Csiszár Ada — Kalocsay Kálmán), kiu aperis 1975 ĉe Hungara Esperanto-Asocio en Budapeŝto (188 p.).

Kalocsay, laŭ mia impresoj, estis tute trankvila kaj senbrua homo (kontraste al Julio Baghy, kiu ofte patose parolis, li ja estis aktoro). Lia voĉo ne estis eksterordinara. Li ne estis granda oratoro. Sed li estas kaj restas titano de la Esperanto-poezio kaj esperantologio.

Detlev BLANKE

(Laŭ afabla permeso de s-ro Blanke

repr. el: "der esperantist" 1976:4, p. 10.)

Minora poeto memoras pri mondvoĉa bardo

lasence mia rilato kun Kalocsay estas inter la plej gravaj en mia vivo; sed en tiu tre grava rilato mankis vera persona intimeco. Kalocsay retenis min por Esperanto kaj ordonis la esencan direkton de mia esperantista vivo. Sed tion li ne faris konscie.

Ekstudinte Esperanton, mi rapide konstatis ĝian relativan facilecon, ĝian logikon kaj simetrian, ĝian praktikan utilon; sed literaturo rolas en mia vivo tiel proksime al la karno, ke lingvo sen literatura valoro ne povus vekti en mi ian vere konvinkitan lojalecon, certe ne postuli ian sinoferon. Aĉetinte por ekzerci min kelkajn librojn, sen konsiloj, mi legis Ŝekspiran tradukon dubige seninspiran, kaj kelkajn versaĵojn naive amatorecajn.

Tiutempe mi estis preta resti eterna postkomencanto: ja kun kelkaj akuzativoj kaj eĉ korelativoj, sed kredante, ke mi sufiĉe lernis Esperanton por interŝanĝi bildkartojn aŭ eĉ bonintencajn sopirojn pri mondopaco. (Lingvo, kiu ne kapablas por literaturo, ankaŭ ne kapablas por pli profundaj diskutoj pri paco, politiko kaj la veraj problemoj pri homa interfratiĝo).

Tia esperantismo ne multe pli ol forlaso valorus; sed tiutempe mia korespondkursa instruisto — se mi bone memoras, estis John Hartley — pruntis al mi ***Streĉita Kordo***. Estis por mi, tiutempe iom nefacila legado; sed ĝi tuj plene pruvis al mi, ke Esperanto taŭgas por altnivela poezio; la lingvo enhavas ĉion necesan; la sola alia bezonata ingredienco estas genio.

Al Rossetti kaj Auld mi ŝuldas multajn, korektojn, ekzemplojn; sed estas unue al Kalocsay ke mi ŝuldas la unuan komprenon pri la valoro de Esperanto, la unuan inspiron al la verkado en tiu lingvo. Sed ni ĉiam lanĉas libron sur maro malluma, nesciante kiu ĝin vidos, kiel aliaj reagos; kaj Kalocsay tute ne konsciis, kion li faris por mi.

Jen stranga malintima intimeco dum eble jam dudekkvin jaroj, nun daŭranta kredebla ĝis mia propra morto. La tradukoj de Kalocsay konstante prezentis al mi preskaŭ netolereble rigorajn kriteriojn por propraj traduklaboroj; liaj originalaj poemoj konstante riproĉis mian propran artistan konsciencon. Ankaŭ miaj vastaj ŝuldoj al Auld kaj Rossetti estas iasence ŝuldoj al Kalocsay, pro iliaj disĉiplaj rilataj kun li.

Mia unua persona kontakto kun Kalocsay okazis en 1955; kiam aperis mia unua poemaro, ***Kontralte***. Mi timhezite sendis ĝin al li, kaj li reagis per tre afabla letero, kaj poemo, en kiu li ne nur bele komplimentis min, sed montris multan komprenon pri mia psiko. Mi nun suspektas, ke li komprenis miajn neŭrozojn pli bone, ol mi mem komprenis ilin.

Li ne havis tempon por multa korespondado; kaj mi sufiĉe spertis okupitecon, por almenaŭ kompreni, ke oni nepre ne rajtas ĝeni renomajn personojn egoisme; ili havas pli gravajn laborojn. Ĉiu nedezirata letero al verkisto, se li pro ĝentileco sentas devon respondi, povas esti perdita poemo, almenaŭ perdita krea energio. Sed foje li skribis al mi; pri medikamento bezonata, por saluti festsezono, por mallonga sed valore kuraĝigi min; eĉ unufoje por tre dolĉe kondolenci pri la morto de mia amata kato, Montevideo. Tre varme li skribis, kiam varman puloveron trikis por li du el miaj tiamaj studentinoj post la Hungarlanda tragedio de 1956, kiam lia apartamento grave difektiĝis. "... al kiu kompari ilin? Al Arachne? Ne, ĉar ties nomo signifas araneon. Al Penelope? Ne, ĉar ili ne malteksis la tekstaĵon kaj estas multe pli junaj. Nu, ili estas nekompareblaj!"

Tamen, liaj leteroj ne estis tiu surpapera babilado, kiu estas ofte la longaj leteroj de Julio Baghy. Iasence li estis intelekto tro altnivela, tro dediĉita al altkulturo, por amike naiviĝi en sankta infaneco. Li foje spritis, sed almenaŭ kun mi li malofte pritraktis amuzajn bagatelojn aŭ personajn travivaĵojn. Li skribis al mi ĉefe pri kulturaj laboroj: frue menciis al mi planon de *Tutmonda Sonoro*, invitis min tiucele traduki el la greka kaj longe konsilis min pri la plej bona metrika formo (bedaŭrinde vane, ĉar mi ne scipovas la grekan); detale komentis diversajn poemojn; menciis, en 1957, ke li mem ne estas nun plene kontenta pri kelkaj siaj tradukoj en libro, por ni ceteraj, mirakle genia, *Eterna Bukedo*, ŝercis pri la *Plena Gramatiko*. "Vi ne povas imagi, kia Moloĥo estas tiu libromonstro." Li penis instigi min traduki la *"Portugalajn Sonetojn"* de Elizabeth Barrett Browning; multe skribis al mi, kiel al aliaj, pri lia kolosa traduklaboro de Ŝekspiro. En 1968 li skribis: "Se mi estus iom pli juna, mi revus pri kompleta Shakespeare en E."

Plurfoje mi trovis en liaj leteroj ĝuste tiun *noblan pedantecon*, kiun mi trovis en alia amiko, ĉi-jare mortinta, klerulo en Oxford: la grandan, kvazaŭ obsedan, belan deziron, vere diri tute korekte kaj ne nur tolereble korekteco. Li longe skribis al mi pri etaj punktoj en la teksto de Ŝekspiro, petante detalajn konsilojn pri la derivado de vortoj kaj frazoj, la semantika historio, la ĝusta teksto inter pluraj eldonoj, ktp. Ekzemple, pri la ĝusta signifo de la vorto *cockney* en *Lear*, li esploris variantojn en kritika aparato, konsiliĝis kun Rossetti kaj aliaj, studis pli fruan tradukon, ankaŭ konsultis min. Tia laboro ne multe helpas, sen genio; sed al genio oni devas aldoni tiajn laborojn.

Kaj kiam li volis laŭ la bela hungara stilo komplimenti, li skribis: "Mi kisas viajn du fingrojn, kiuj tenas vian fontoplumon."

Mi rekontis lin persone nur en 1959. Mi faris prelegvojaĝon en Hungarlando, kiel Julio Baghy, kaj la hungaraj esperantistoj ĝenerale, mirinde prizorgis min. Renkontante Kalocsay, kiu afabla invitis min vespermanĝi ĉe li, mi vere sentis, ke mi nun renkontas iun, kiu apartenas preskaŭ al la alia homa speco, mirakle mutacia. Li estas unu el tiuj, pri kiuj mi ofte demandas al mi, ĉu mi pli kapablas koncepti, kiel funkcias tiaj mensoj kaj animoj, ol ekzemple mia kato povas koncepti pri mia interna vivo? Mi do estis tiel timema, ke Baghy, ĉirkaŭbrakante min sur la sojlo de Kalocsay, devis flustri kun longa nazo en mia orelo: "Ne svenu, ne svenu."

Kiam mi eniris tiun agloneston aŭ templon de la Muzoj, kaj vidis la aglan rigardon de la geniulo, mi povis nur — iom pruntante de Rossetti en *Kvaropo*, sed ne konscie — krei, el la Kaloĉaja traduko de Dante: "Ho, mia Majstro kaj modelo glora!" kaj genui antaŭ li. Sed li deprenis min de la planko, premis min al la granda koro, kaj nomis min "Nia Marjorie".

En lia hejmo mi vidis lin kiel afablan, indulgeman, kompatoplenan patron; ameman edzon; tre afablan gastiganton; kaj estis tre bele, vidi kiel amikis li kaj Baghy. Pri manĝaĵoj kaj trinkaĵoj li montris sin ega gastama; kiam mi volis fari kelkajn fotoĵojn, li kunlaboris tre inteligente kaj afable. Li rakontis diversajn ŝercojn hungarajn, kun brile bildiga aktorado; bele laŭtlegis el *Tutmonda Sonoro*, kuraĝigis min diversmaniere. Lia voĉo estis mirinda mikso de oro, ŝtalo, mielo kaj fulmo... Li deklamis, kiel iu, al kiu kulturo kaj belo vere gravas; ne por li estis la nuntempe eble pli laŭmoda stilo iom pardonpeteca, pene maltroiga. Samtempe li neniam sentigis al mi, ke por li gravas Kolomano Kalocsay. Tio, kio gravis, kiu gravis kiel iu demando pri vivo aŭ morto, estis la kultura tasko. Forta personeco, li ĉiam montris tiun plej altan kaj malfacilan malegoismon, kiu nevidebligas la personecon, ne en la humida nebulo de propra nesignifo, sed en la blinduma lumo de la laboro pli grava.

Mi mem preskaŭ ĉiam spertis en mia vivo, ke vere grandaj homoj estas kutime afablaj al malgrandaj, kaj posedas la humilon, de tiuj, kies kriterioj estas tiel rigoraj, ke ili neniam povos tute kontentigi siajn proprajn postulojn; mi rimarkis etmensecon, obsedan ofendiĝemon, fanfaremon kaj vantecon, ĉiujn simptomojn de tiu singravigemo, kies rimedo estas malgravigi aliajn, ĉefe inter tiuj, kiuj atingis nenion interesan. Mi memores vesperon en Budapeŝto, kiam mi prelegis. Pro fuŝo de alia persono, mi ne povis uzi mian tre zorge preperitan prelegon kun lumbildoj, sed devis de la komenco ĝis la fino improvizi. Mi iel finis la prezentadon sen fiasko, sed tre laca, nervoza, kaj ankaŭ pro la horo, tre malsata. Grupo de literaturamantoj forkondukis min al restoracio, kie ni ĉiuj vespermanĝu. Kaj mi memoras, ke dum multaj insiste volis paroli kun mi, estis la plej elstara geniulo en la grupo, Kalocsay, kiu insistis, ke Marjorie estas laca kaj malsata; kiu tuj mendis fromaĝan patkukon, por ke mi havu ion sen atendado; kiu prizorgis mian vespermanĝon kaj ĉiurilate mian komforton; kiu patre protektis min, tiel, ke mi povu uzi la buŝon ne nur por respondi al demandoj, sed ankaŭ por manĝi.

Nur unufoje poste mi vidis Kalocsay: ĉe la Universala Kongreso en Budapeŝto, en 1966. Mi denove vespermanĝis ĉe li, kune kun Waringhien kaj kelkaj aliaj. Brila vespero, kvankam mi kredeble estis tie la malplej brila koversacianto; mi volus nun reaŭdi tiuj interparoladojn! Estis tre bele, vidi la amikecon kaj reciprokan estimon, inter la du kolosoj, Kalocsay kaj Waringhien, kaj ilian ĝentilecon al ni satelitoj.

Marjorie inter la "du kolosoj"
En la hejmo de Kalocsay.
Aŭgusto 1966.

Tiutempe Kalocsay estis jam malsana, suferanta. Eminentia kuracisto, li iam skribis al mi, ke li "multe praktikis la profesion pasive". Mem ofte suferante, ĝis la fino tre frate prizorgis Baghy, ofte en la hospitalo, kie li longe estris. En 1966 li jam sentis sin mortanta. Kredeble neniu, kiu ĉeestis, povus forgesi tiun kunvenon, kiam tiuj du, eble la plej grandaj esperantistoj post Zamenhof, kvazaŭ profetis la proprajn mortojn al la geamikoj. Baghy legis pri la Morto kaj la Grandveziro — tiu, kiu rifuĝis al Smirno, kie tamen Morto jam havas rendevuon kun li; preskaŭ netolereble kortuŝa estis tiu poemo, kun la brila aktorado de Baghy, sed ankaŭ kun la aŭdeble malfacila kaj dolora spirado. Kalocsay legis el sia traduko de la epopeo de *Gilgameŝ*, parton, kie Gilgameŝ lamentas pri la morto de Enkidu. Malsanado ankoraŭ ne difektis la oron, la mielon aŭ eĉ la fulmon de la voĉo de Kalocsay; lia deklamado estis tiel majesta, ke mi sentis min en templo de ne nur la intelekto, sed ankaŭ la universala emocio. Jen estis tiu pensanta fragmito de Pascal; la mortanto estas pli granda ol la tuta kosmo, kiu lin mortigas, ĉar la homo konscias, ke li mortas. Jen Baghy, jam vivanta skeleto, nur okuloj kaj arĝentaj haroj kaj suferplena voĉo ironie gaja, Homo pli granda ol siaj suferoj; jen Kalocsay, imperiestro de la poezio, memoriganta nin samtempe pri la mallongo de la vivo kaj la longdaŭro de la arto... jen revenas miaj larmoj de antaŭ dek jaroj...

Do, miaj personaj mamoroj pri Kalocsay estas malmultaj; nur orlitere gravaj en la libreto de mia vivo. Mi deziras, ke iam mia esperantista vivo estu iom inda de iu, kiu iam genuis antaŭ Kolomano Kalocsay, gastigis ĉe lia tablo, kaj aŭdis lin deklami sian propran funebran poemon.

Marjorie BOULTON

Laŭ la afabla permeso de d-rino M. Boulton

repr. el Esperanto en Skotlando 1976:103-104, p. 12-19.

En somera mateno

Mia unua kaj unika persona renkontiĝo kun Kolomano Kalocsay okazis en Budapeŝto, en bela matena somero de la jaro 1975. Mi ne bone memoras la akcesoran parton de mia vizito, t.e. la situon de la kvartalo, la aspekton de la strato, la staton de lia domo, ĉu mi ascendis al lia etaĝo piede aŭ lifte... La profunda impresoj, ke mi baldaŭ staros antaŭ la granda homo, nuligis mian observ-kapablon kaj, efektive, mi sentis tute apartan nervozecon, ĉar mi admiradis liajn verkojn jam de miaj knabaj jaroj, nun prezentiĝas al mi la okazo povi premi la manon kreitan tiom da belo en lingvo, kiun li nemezureble riĉigis kaj maturigis.

Mia bona amiko Lajos Kapitány anticipis la renkontiĝon, gvidis min, en mia duonsomnabula stato, ĝis lia hejmo, kaj apenaŭ oni min enkondukis en lian laborĉambron, jen aperis Kalocsay persone. Mi jam konis lian aspekton per fotoj de diversaj epokoj, sed tuj min impresis la energio kaj vigleco de liaj movoj kaj gestoj kaj la speciala esprimo de lia rigardo, plena de intelekta forto kaj de mi ne scias kia duonironia lumeto.

Mi ne havis la intencon intervjui lin aŭ prezenti al li serion da demandoj antaŭe preparitaj. Mi volis nur esprimi al li la admiron de humila disĉiplo al la nediskutebla majstro, same kiel mi faris tion iam en alia grandulo de nia lingvo, prof. Gaston Waringhien. Nu, Kolomano Kalocsay, post kelkaj demandoj por sin orientado rilate al mia Esperanta laboro, eĉ pli vigligis, kiam li aŭdis, ke mi estas la tradukinto de "Cigana Romancaro". Ne valoras ripeti ĉi tie lian opinion pri mia traduko; mi komprenis, ke li jam legis ĝin tre atente kaj kun vera intereso, ĉar li aludis al diversaj partoj kaj versoj kaj komparis ilin kun la versioj hungaraj faritaj de eminentaj tradukistoj. Tial ĉar same en la originalo kiel en la Esperanta versio "Cigana Romancaro" estas verkita en asonancitaj versoj, Kalocsay neevitebla tuŝis la temon de la asonanco. Li defendis kun verveco sian konatan sintenon kontraŭ la uzo de la asonanco en la poezia tekniko, kaj mi ne povis ne admiri la fervoron de tiu 84-jara junulo, kiu, mi estas certa, fine verkus geniajn romanojn, se li estus serioze esplorinta la frapajn efektojn atingeblajn (kaj facile redoneblajn en Esperanto) per la tradicia verso-skemo asonancita hispana.

Sed mi sentis, ke mi ne rajtas preni de nia genia poeto tro da tempo. Kiel memoraĵon de mia vizito mi donacis al li ekzempleron de mia tiam juŝa traduko de "Doña Barbara", kaj li reciprokis per bela libreto entenante faskon el kelkaj liaj tradukitaj poemoj kaj eldonita de la *Klubo de la Miniaturaj Libro Kolektantoj*. Ĝi estas ekzemplero numero 242, kaj ĝia palindromeco konformis sian specialan karakteron (en Hispanio, la palindromaj numeroj laŭdire signifas bonan sorton aŭ feliĉon), ĉar mi eliris el la hejmo de Kalocsay kun intima kontento, ke fine mi povis plenumi unu el la iluzioj de mia vivo: persone interparoli kun nia genia poeto.

Kelkajn monatojn poste, la sciigo pri lia morto trafis min de diversaj flankoj: Kapitány el Hungario, Waringhien el Francio, Haupenthal el la Germana Federacia Respubliko, Régulo Pérez el Kanariaj Insuloj informis min telefone, telegrame aŭ letere pri lia forpaso. Kapitány aldonis, ke je mia nomo li metos floron sur lian tombon, kion li faris siatempe ĉe la tombo de Baghy, kaj kio profunde tuŝis al mi en la koron.

Sed mi ĉiam vidas nian karan Kolomanon vigla, sprita kaj juneca en la bela mateno somera de 1975 kaj, kvankam niaj povraj floroj jam delonge velkis sur lia lasta ripozejo, liaj laŭroj restos eterna verdaj.

Fernando de DIEGO

Hispanio.

Kelkaj rememoroj pri Kalocsay

Kun Baghy kaj Kalocsay mi persone konatiĝis en 1923 dum la XV-a Universala kongreso en Nürnberg. Poste Baghy kiel kursgvidando kelkan tempon restadis en Tallin, kaj tiam mi havis eblon ofte renkontiĝi kun li. Ni restis ĝis lia morto en amikaj interrilatoj. Kun Kalocsay mi estis nur hazardan personan kontakton.

La poezio de ambaŭ poetoj estis al mi kara, tamen ĉiam mi preferis pri la poezio de Kalocsay, kiu estis por mi aŭtoritato, kaj mi ĉiam penis observi decan distancsenton. Tamen, en 1932, kiam okazis konflikto ĉe *Literatura Mondo*, mi skribis al li longan leteron. Li tre afable respondis kaj detale klarigis la kaŭzojn de la konflikto. Li kompreneble aludis ankaŭ la neologismo-demandon:

"... Fari literaturon per lingvo, kiu glorigas malriĉon, estas naiva ludo de diletantoj, nenio pli..."

Kalocsay ne laboris nur por sia plezuro. Li aspiris progreson por la E-literaturo, tial ankaŭ lia troa emo al polurado, kiu ofte povis iĝi danĝera en la poezio. Al mi eĉ ŝajnas, ke — en la nuna stato de nia literaturo oni unuavice poluru la E-prozon, se oni atente legas la aperintajn librojn, oni konvinkiĝas pri tio. Rossetti pravas, ke Kalocsay ĉe reviziado ankaŭ ne indulgis sin mem. Antaŭ dek jaroj Kalocsay interalie skribis al mi, ke li siatempe poluris siajn poemojn en "Mondo kaj Koro" antaŭ ol enmeti ilin en "Streĉitan Kordon", kaj nun li ne kuraĝas legi tiun libron, timante, ke li trovos tie tro multe da polurendaĵoj. Tamen li aldonis, ke kelkfoje povas okazi tiel, ke poste oni komprenas, ke la polurado ne plibonigis la tekston. Mi opinias, ke ne ekzistas E-poeto, en kies poemoj li ne estus trovinta ion por poluri. Tamen al novaj talentoj, al komencantoj li kondutis kuraĝige, nur poste fariĝis pli postulema, kio eĉ elvokis ofendiĝojn. Sed kial bonvolema kritiko ofendu iun, ĝi estas ja utila.

Oni tamen eviti blindan konsenton ne manku konvinkiĝo. Al mi li povas ĉiam rekte diri, se io en miaj tradukoj ne plaĉis al li, ekz. mia "rigida rilato al la ritmo-demando." En 1938, kiam li redaktis miajn poemtradukojn por "Svisa Antologio", mi kuraĝis skribi al li, ke mi miras, ke li, batalanta por libereco en la poezio, volas tiel severe limigi la vortordon en E-poezio. Mi komprenas, ke de la vortordo dependas la klareco kaj natureco de la teksto, sed ĉu en la poezio tia neregula vortordo kelkfoje — mi ripetas kelkfoje — ne kapablas doni eĉ ian apartan nuancon al la poezio? Kial starigi severajn leĝojn, tute senbezone limigi la ĝis nun ekzistantan liberecon? Kelkaj poetoj ankaŭ en la originalo uzas nenaturan vortordon, kiam oni eĉ devus same traduki.

Certe la troa uzo de tiu libereco povas fariĝi minuso por ies traduko, kaj mi penos estontece atenti tion, sed tamen ne plene.

Ĉu vere mi sola pekas kontraŭ la vortordaj reguloj? Por pruvi, ke la kelkfoje libere uzata vortordo en miaj poezi-tradukoj ne estas mia monopolo, mi citis plurajn lokojn el la poezio de Tárkony, Waringhien kaj ĉefe de li mem. Mi postulis, ke certaj lokoj restu senŝanĝaj, kaj mi petis lin ne koleri, ĉar mi ne agas tiel pri obstino, sed simple pro tio, ke ĝis mi ne estas konvertita, mi ne povas agi kontraŭ mia konvinkiteco.

Kalocsay ĉiam bone rilatis al mi, kaj nun mi kun honto komprenas, ke mi en la postmilita tempo plurfoje estis malĝentila, kaj arogante demandis lin, ĉu iu gramatika formo uzita en liaj tradukoj, estas modela? Li ne koleris, tamen foje li menciis, ke iu vere kolerigis lin, sed li aldonis "mia kolero ne daŭras pli ol tri tagojn".

Eble mi ne konis lin kiel homon tiom, kiom necesus, almenaŭ Tárkony asertis tion, li sendube plej bone konis lin. Ekde 1932 mi estis kun Tárkony en bonaj amikaj interrilatoj. Antaŭ la milito ni multe korespondis, ne nur pri literaturo, sed senĝene pridiskutis diversajn demandojn. Post la milito li iĝis kvazaŭ ligilo inter mi kaj Kalocsay. Kutime mi de ili ricevis komune skribitajn leterojn, kiujn mi gardas ne nur en la skribotablo, sed ankaŭ en mia memoro.

Hilda DRESEN

Tallin, 1978.

Mia konatiĝo kun Kálmán Kalocsay

Mi aŭdis unuafoje pri Esperato kiel dekjarulo. La ideo de la neŭtrala mondlingvo tuj ekkaptis mian atenton. Poste, jam kiel universitata studento, mi aĉetis vortaron, gramatikon kaj komencis entuziasme lerni Esperanton, admirante la genian verkon de Zamenhof. Nur kontraŭ la "mal"-vortoj mi sentis antipation, ĉar tiu ofte donas al la lingvo ian primitivan formon.

Mia lernado daŭris nur dum kelkaj monatoj, ĉar mi devis lerni aliajn lingvojn, venis aliaj postuloj de la vivo kaj dum pluraj jardekoj Esperanto restis por mi nur agrabla memoro.

La 9-an de majo 1968 matene mi hazarde ekvidis en la strata librobutiko numeron de *Hungara Vivo* kun la longatempe nevidita kvinpinta verda stelo. Mi aĉetis ĝin kaj tuj — surstrate — eksciis ke Esperanto havas asocian centron en Budapeŝto. El la apuda telefonbudo mi vokis ĝin, ĉu eblas frekventi Esperantan kurson? Oni informis min, ke en majo la kursoj finiĝas, aliaj ne komenciĝos, tamen mi skribu al Paŭlo Balkányi, eble li povas doni al mi ian ideon. Mi ne skribis, sed prezentis min ĉe li jam la saman matenon en la urboparto Pesthidegkut. Oĉjo Paŭlo kun helpema bonvolo donis al mi konsilojn, kiajn lingvolibrojn kaj vortarojn mi aĉetu. Posttagmeze mi akiris tiujn librojn, kaj komencis tre diligente lerni, traduki, poste konceptadi Esperantlingve.

Post unu jaro vizitante Oĉjon Paŭlo, mi montris al li, kion mi faris dum unu jaro, kaj mi parolis pri miaj ideoj koncerne Esperanton. "Vi havas similajn vidpunktojn al tiuj de Kalocsay — diris oĉjo Paŭlo — vi devas ekkoni lin persone. Mi aranĝos la renkonton."

Dank' al lia interveno, post unu semajno, la 8-an de julio 1969 mi vizitis unuafoje profesoron Kalocsay. Li akceptis min tre afable, atente aŭskultis mian historion rilate al Esperanto. Foliumante la verkojn, kiujn mi faris ĝis tiam, li petis du verkojn lasi ĉe li por tralegi: "La du revenoj de eksreĝo Karlo la IV-a en 1921", kaj "La katastrofo de Titanic". Mi pensis, ke mi tute ne rekonos miajn tekstojn post la revizio de Kalocsay, despli granda estis do mia fiero, kiam post kelkaj semajnoj Kalocsay redonis ilin kun kelkaj korektoj esprimante sian kontenton pri la rezultoj de la unujara lernado.

Per tio mia junaĝa amo por Esperanto reviviĝis. Dum la sekvontaj jaroj mi tradukis kaj ekstraktis grandan materialon el la franca, angla, germana kaj hungara diplomacia kaj internacijura literaturo kaj dokumentaro por konstati, ĉu Esperanto kapablas esprimi la fajnaĵojn kaj nuancojn de la diplomacia kaj jura esprimoj. Kiam kolektiĝis problemoj: manko de terminoj aŭ esprimmanieroj, mi turnis min al Kalocsay, kiu estis ĉiam preta doni konsilojn kaj solvi la problemojn. Lia helpemo donis al mi novan kaj novan impulson por plu labori.

Kalocsay la poeto kaj literaturisto interesiĝis pri ĉio, eĉ pri tiuj diplomaciaj kaj juraj problemoj. Li zorge ekzamenis ilin, prenis amason de Esperanto-vortaroj de sur la librobretoj (eĉ japana troviĝis tie) kaj pasie serĉis solvon por rebusoj, kiujn mi foje prezentis. La plej bona fonto ŝajnis lia propra mirinda memoro. Li rememoris pri ĉiu vorto: kiu kaj kiam lanĉis ĝin unue, kaj kia estis ĝia plua sorto. Se nek en sia memoro, nek en la vortaroj li trovis adekvatan vorton, nur tiam li akceptis la novan, kiun mi proponis, aŭ pli bonan vorton kreis li mem.

Neforgeseblaj estis la horoj, kiujn mi pasigis ĉe li (ĝenerale de la 16.30 ĝis la 20-a). Lia scio, memoro, lucida pensmaniero, multflankeco kaj komprenemo fakte ravis min. Ĉe mia foriro lia ĉambro ŝajnis kvazaŭ batalkampoj, dise sur tabloj, seĝoj, divano kuŝis vortaroj kaj lingvolibro.

Lastfoje mi vizitis lin la 13-an de decembro 1975. Mi montris al li interesajn leterojn de eksterlandaj esperantistaj korifeoj. Li atentoplene tralegis la leterojn — inter ili tiun de Ivo Lapenna — ni detale pridiskutis ilin, kaj fine li emfazis, ke ankaŭ li konsideras la tempon alveninta por fari iun iniciativan paŝon sur tereno de la Esperanta lingvouzo. Neniam mi vidis Kalocsay en tia bonhumora, serena kaj kvazaŭ junuleska animagordo. Ĝojmiene li montris la ĵus aperintan libron "Domfabriko", la rezulton de kvinjara formika laboro kune kun Ada Csiszár. Mi adiaŭis feliĉe, atendente baldaŭajn interesajn renkontojn.

Sed post du semajnoj, la 28-an de decembro lin devis enhospitaligi, kaj li mortis la 27-an de februaro 1976. Multaj mortis ĉirkaŭ mi dum la lastaj 20 jaroj: parencoj, amikoj, konatuloj, sed nenies foriro tuŝis min tiel profunde, kiel la morto de Kalocsay, kvankam nia interrilato limiĝis ekskluzive al la lingvo-sfero de Esperanto. Mi sentas, ke mi restis iel sola.

D-ro Ladislao DUBRAVSZKY

Budapest, 1978.

Mia nomo ne estas sufiĉe poezia

Gaston Waringhien en 1990 donis intervjuon al István Ertl por Budapeŝta Informilo. Dum la interparolo estis tuŝita ankaŭ Kalocsay. Jen la koncerna parto de la konversacio.

Bl: *Multaj esprimis rezervojn pri la troa franceco de PIV...*

G:W: Mi ne tro zorgas pri kritikoj. Se ĝi estas utila, ĝi estos uzata; se ne, ĉiukaze estas tro malfrue por relabori pri ĝi. Laŭ la kvanto de venditaj ekzempleroj ĝi ŝajnas populara...

Bl: *... ĉar ne ekzistas simile granda vortaro...*

GW: Nu, la afero restas kiel ĝi estas. La estonteco juĝos. Mi mem tre ĝojus, se la kritikantoj kreus pli taŭgan vortaron.

Bl: *Pli ĝenerala kritiko estas tiu de Claude Piron en "La bona lingvo", laŭ kiu Kalocsay kaj Waringhien rekte malutilis al Esperanto, ĉar ili ne komprenis ĝiajn latentajn, tion, ke ĝi ne estas nur latinida lingvo.*

GW: Tion Kalocsay tre bone konsciis, ja lia propra lingvo eĉ ne estis hindeŭropa. Laŭ mia opinio, ankaŭ mi ne malbone disvolvis la latentajn de Esperanto en PIV: sufiĉas rigardi, kiom da kunmetoj ĝi enhavas. Mi trafosis la tutan verkaron de Zamenhof, kiu certe plene konsciis pri la eblaĵoj de sia lingvo, eĉ se li elektis, kiel prudenta homo, ian ekvilibrantan kaj mezanan vojon por prezenti sian projekton. Sed por teknikaj vortoj, kiajn ankaŭ li mem uzis, la greklatina bazo estas nemalhavebla.

Bl: *Jam Kalocsay parolis pri "popolo"; pli ĝuste pri "poeto sen popolo". Kiel Vi prijuĝas lian rolon?*

GW: Li estis giganto! La plej eltrovema persono, kiun mi konis, vera fonto de bildoj kaj dirmanieroj. Se oni montris al li poemon, li povis preskaŭ tuj traduki, kun nebridebla impeto kaj granda perfekteco.

Bl: *Ĉu vi ofte renkontis lin persone?*

GW: Relative; dufoje mi eĉ pasiĝis plurajn semajnojn ĉe li. Sed ankaŭ kiam mankis persona kontakto, ni konstante interŝanĝadis ideojn en tre vigla korespondado. Tiun materialon mi deponis en la arĥivoj de UEA.

Bl: *Por Kalocsay Esperanto estis "nobla hobia." Kian gravecon havis Esperanto en Via vivo?*

GW: Ĝi ne estis la ĉefa afero en mia vivo. Tamen, inter miaj lingvoj, post la franca ĝi estas tiu, kiun mi plej ŝatas kaj plej bone uzas. Ĝi donis al mi vivocelon. Sed ĝi reprezentis por mi ankaŭ socialan celaron; la penso de Lanti forte influis min. Mi estas dekomence kaj por ĉiam sennaciisto — nacioj estas la pesto de la nuna mondo. Naciismo estas plej danĝera ideo. Mi aldonu, ke Lanti influis min ankaŭ lingve. Antaŭ ol konatiĝi kun li, mi parolis kun la francaj esperantistoj france, eĉ kun Grosjean-Maupin, kun kiu ni celis realigi la Plenan Vortaron.

Tiucele mi kontaktis Lanti-n: mi trovis surpriza, ke li uzas Esperanton ĉiam kaj ĉiucele. Eĉ lia kunvivantino estis esperantisto, cetere la kuzino de George Orwell... Cetere, ankaŭ por Kalocsay, Esperanto estis ĉefa vivmotivo, sed li ĉiam restis tre profunde hungara. Ĝuste lia hungareco bone gardis la lingvon de troa latinemo...

Bl: *Dankon pro la intervjuo.*

Laŭ la afabla permeso de s-ro ERTL

repr. el Budapeŝta Informilo 1990:11-12, p. 1-3.

Vilhelmo la konkeranto...

Vizito ĉe lingvo-scienculo en Budapest

Mi jam aŭdis multe pri la lingvo Esperanto, sed paroli ĝin neniam. Ke ekzistas ankaŭ Esperanto-poezio, tion mi tute ne sciis. Nu, jes tiel incitis min la scivolemo, ke en Budapeŝto mi vizitis D-ron Kálmán Kalocsay.

Mi ne povis fari alie, mi devas priskribi la sablonajn vortojn, ke Kalocsay refutis sian aĝon, kiam kun granda freŝeco li venis salutí min.

Ni sidĝis en la laborĉambro de la malnova domo en la strato Nyúl n-ro 4. La laborĉambro de Kalocsay estas pleniĝtopita je libroj kaj garniturita per skulptitaj mebloj.

— *Mi konfesigas la dommastron, de kiam li okupiĝas pri la lingvo Esperanto?*

De kiam mi sciigis pri tio, ke ĝi ekzistas. Ne ĉiu homo lernas facile fremdajn lingvojn. Por multaj lingvolernantoj precipe mankas, ke ili ne vojaĝadas kaj ili ne povas praktiki la lingvojn en la koncernaj landoj. Tiun malavantaĝojn absolvas Esperanto. La soldatoj de la angla reĝo Vilhelmo la Konkeranto (komence de la XI-a jarcento) militvagadante en fremdaj landoj alproprigi ion el ĉiuspecaj lingvoj kaj ili paroladis en miksita lingvo, kiu estas rigardebla kvazaŭ la pratempa Esperanto. Ĉu ne? Sed tiu lingvo ne havis regulojn.

— *Kiaj reguloj konstruas la zamenhofan lingvon?*

Originale li havas 16 regulojn, kiuj estis fiksitaj en la libro: FUNDAMENTO DE ESPERANTO. Kun kolego Gaston Waringhien mi kompilis la metotan gramatikon, kies titolo estas: PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO. La unua volumo aperis en 1935, la tria kompletigita eldono en 1958/1964 kun multaj ekzercaroj.

— *Sinjoro Profesoro, de kiam vi verkas poemojn?*

Pri tio mi povas paroli en pasinta tempo, ĉar komence vere mi verkis originalaĵon, sed baldaŭ mi decidis min al la poemtradukaĵo, ĉar mi opinias, ke tiu agado plenumas multe pli gravan taskon. Ne sole la hungaran literaturon mi interpretas de Balassi ĝis Kassák, sed multnombrajn klasikulojn de la literatura mondo de Shakespeare ĝis Baudelaire, estus multe denombri ilin.

Kálmán Kalocsay ankaŭ nuntempe laboras aktive. Liaj verkoj estas en densaj vicoj sur la librobretoj, inter ili traduko de la INFERO de Dante kaj la LA TEMPESTO de Shakespeare, kiu aperis en 1970. Krome li estas lingva revizianto ĉe la revuo Hungara Vivo. Estas interese, ke li kontrolis laŭ lingva vidpunkto tiun antologion en Esperanta traduko, kiu prezentas ĉeĥoslovakajn verkistojn kaj poetojn. La libro aperis en 1935 en Budapeŝto.

Kun granda miro mi aŭskultas Kolomanon Kalocsay, kiu unu post la alia metas antaŭ min librojn, rezultojn de sia krea-laboro: Jen la ĉarma epopeeto de Sándor Petőfi: JOHANO LA BRAVA, KANTOJ KAJ ROMANCOJ de Heine, La TAGLIBRO de Goethe, LA TRAGEDIO DE L' HOMO de Imre Madách, poemantologio ETERNA BUKEDO (tradukita el 22 lingvoj), la impona HUNGARA ANTOLOGIO ktp, ktp.

Dume malfermiĝas la pordo de la laborĉambro kaj enpaŝas la afabla edzino kunportanta glasojn kaj vinbotelon kaj apud ŝi 4-5-jara etulino portas kringojn. Rapide ni interkonatiĝas, eĉ interamikiĝas kun Enikő-Ildiko-Julia. Kiam mi miras, ke ŝi havas tiom da nomoj, la knabineto informas min, ke la praavo "la <Papanĉ> nomas min nur Enci-Benci aŭ nur Benci."

Mi petas pardonon de sinjoro Profesoro, ke mi ĝuste sabate posttagmeze ĝenas lin, kiam li certe kutimas dediĉi sian tempon al la familio.

Kalocsay kun malica rideto respondas.

Faras nenion, mia kara, mi ĝuste tiel kvereletas kun ili dum la labortagoj, kiel dum ripoztagoj.

Ĉi tio kuraĝigis min por meti la lastan demandon al la scienca kulturisto de la lingvo Esperanto.

— Kion vi pensas, sinjoro Profesoro, ĉu Esperanto iĝos mondlingvo? — Kalocsay ridetas pro la demando, kiu certe nur por mi estas nova.

Tiun antaŭdiri estas same malfacila — *li respondas*— kiel tion: ĉu la homaro pereigos sin aŭ ne. Ĉiaokaze ĉiam pli granda estas la internacia tendaro de la esperantistoj, kies anojn kunigas la homaj interrilatoj kaj la sopiro pri la mondpaco. Do tio estas certe: se Esperanto iĝos mondlingvo — tiam ĝi estos la lingvo de demokratio.

Olga GÁLY
Bratislava, 1972.

(Elhungarigis F. Bartók)

Ĉu vin ne incitas tiu tasko?

En la Esperanta mondo ekzistas fenomeno, kiun plej bone karakterizas jena anekdoto, libere redonita laŭ la memoro: La profesoro: Kiel longe vi studas Esperanton? La lernanto: Du semajnojn, Sinjoro. La profesoro: Do, bonvolu montri al mi vian poeziaĵon.

Kun sufiĉaj modifoj mi estas unu tia lernanto, kiam mi, relative freŝbakita esperantisto, konfuzita de la poezieco de tiu mirinda lingvo kaj samtempe ne tro modesta en la elekto de konvenaj taskoj, sendis al la revuo *Literatura Mondo* tradukon de Ibsen-poemo: "Terje Vigen", iom longa, cetere ne el la plej facilaj.

Post neentenebla atendado fine venis la letero el Budapeŝto. Mia koro saltetis, kiam mi ekvidis la subskribon: K. Kalocsay. Ne temis pri tiu Ibsen-poemo. La fino de la letero kaptis mian atenton: "Sed se vi nepre volas labori por «Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj», mi faros al vi proponon iom aŭdacan: PEER GYNT. Ĉu vin ne incitas tiu tasko?" (12.03.1935).

Nu, mi iomete jam plifaris ankaŭ tiun verkon de Ibsen; eble, mi provizore trovis ĝin iom riske. Sed jen, Kalocsay kredas min kapabla! De tiam mi estis neeviteble katenita al tiu laboro.

"Ĉu vin ne incitas tiu tasko?" Tiujn ĉi vortojn de Kalocsay mi ofte rememoras. Kiom da esperplenaj aspirantoj al la Esperanta Parnaso li kuraĝigis per simila instigo? Eble tiuj vortoj parte klarigas la ekfloradon de talentoj ĉirkaŭ *Literatura Mondo* en la 1930-aj jaroj?

La traduko de PEER GYNT estis finita en 1939. Kalocsay tuj deklaris sin preta kontroli ĝin. Li zorge instruis min konservi kopion, ĉar jam kolektiĝis nigraj nuboj super Eŭropo. Dum mi estis laboranta pri kopio, venis la fatala april-tago, kiam la milito ruliĝis en nian landon kaj metis efektivan baron al plua komunikado. Post la fino de la milito mi plurfoje provis kontaktiĝi kun Kalocsay. Sed vane. PEER GYNT aperis en 1951 sen lia kunago.

Dum la UK en Budapeŝto en 1966 profesoro G. Waringhien kunportis manuskripton pri alia Ibsen-tradukaĵo: BRAND. Ĝi venis el la manoj de Kalocsay, kaj jam post kelkaj tagoj li skribis al mi interalie: "... tamen, fremda okulo ekvidas lokojn, kiujn la tradukanto mem ne rimarkis kiel ne tute klarajn. Tiel mi kuraĝis esplori..."

Per tio komenciĝis korespondado, por mi treege interesa, kiun mi kun plezuro ofte relegas. Antaŭ ĉio mi konatiĝis kun homo. Mi ekkonis artiston kun temperamento kaj mola koro, al kiu la ŝtona dureco de la Brand-figuro ne povis ne efiki draste. Fojfoje li eksplodis, precipe en kunsento kun Agnes en ties suferoj. Liaj vortoj fine de unu el la leteroj sendube esprimis realecon: "Ĝi (BRAND) apartenas al tiuj pecoj, kun kiu oni konstante diskutas, ofte kolere kaj indigne, sed ne povas sin liberigi el sub ĝia sugestiva povo."

Tre impresis min la giganta laborforto de Kalocsay kaj lia sindediĉo pri tasko, kiun li jam prenis sur sin. Lia scivolemo kaj enprofundiĝemo estis senlima. Ĉiu Ibsen-konanto scias, ke tiu aŭtoro ne estas inter la plej facilaj, kaj tio koncernas, mi riskas diri, precipe la dramon BRAND. Kalocsay iom post iom havigis al si norvegan originalon, vortaron norvega/Esperanta, germanan tradukon kun komentario. Li antaŭe havis hungaran tradukon, (kiun evidente, li ne fidis). Neniu detalo evitis lian atenton. Li havis apartan povon atingi ĝis la kerno de la enigmaj lokoj, kiuj en BRAND vere ne mankas.

Mi devas konfesi, ke mi ĉiam estas skeptika, kiam mi vidas poemojn kiel ekzemple ETERNA BUKEDO, tradukita de Kalocsay. Poemoj el 22 lingvoj, 111 aŭtoroj. Ĉu tio estas ebla? Ĉu la rezulto fidinda? Kiu povas kontroli la valoron de la tuto? En 1966, kiam mi konatiĝis kun la labormetodoj de Kalocsay, mia skeptiko tre moderigis, almenaŭ rilate al Kalocsay.

Dum nia korespondado pri BRAND foje li silentadis iom pli longe ol kutime. "Mi estis — poste li klarigis — refreŝiginta tiujn travivaĵojn, kiujn siatempe, junaĝe, antaŭ 50-55 jaroj, mi havis el la legado de ses verkoj de Ibsen: LA POPOLMALAMIKO, HEDDA GABLER, ROSMERSHOLM ktp."

Kaj jen li daŭrigis la korespondadon, certe kun riĉa rikolto de freŝaj spertoj. Lia brila klarpenso "Postparolo" pri BRAND, kiu estas verkita en 1974, montras, ke li ne estis sur fremda tereno. Mi tre dubas, ke eĉ unu leganto divenos, ke tiun postparolon Kalocsay verkis en sia 83a jaro.

Erling Anker HAUGEN

Trondheim, Junio 1978.

Mesaĝo de Kalocsay
Kálmán Kalocsay en Oktobro 1971 donis intervulon al János Ingusz

J. I.: *En 1970 fondiĝis Esperanto-grupo en la Scienca Universitato Eötvös Lóránd en Budapeŝto. La anoj de la grupo estas pedagogoj, kiuj en la universitato studas la lingvon, kaj Esperanto-fakaj universitatanoj, kiuj nomis sian grupon pri la granda Esperanto-poeto Kálmán Kalocsay. Kiel sekretario de la grupo, okaze de ĝia unua datreveno, mi petas vin, bonvolu mesaĝi kelkajn frazojn al la grupanoj.*

K. K.: Karaj grupanoj!

Tio estas granda honoro por mi, ke vi nomis tian grupon per mia nomo, kaj estas granda feliĉo nun — ĉe la unua datreveno de la fondiĝo de la grupo saluti vin plej kore kaj sincere. Vi petis, ke mi mesaĝu al vi ion. Nu bone, sed kion mi diru?

Kompreneble mi deziras al la grupo viglan vivon, belajn rezultojn. Mi scias, ke via ĉefa tasko estas eduki junan generacion de esperantistoj, kiuj — dank' al via lerta edukado — povas fariĝi kvazaŭ elita stabo, akironta por la hungara esperantistaro

tian

saman renomon, kian inter la du mondmilitoj la tiel nomata Budapeŝta Skolo.

Kion mi mesaĝu nun konkrete?

Mi opinias, ke en Esperanto — pli ol en alia fremda lingvo — estas grave, ke la lernantoj sciu flue paroli la lingvon kaj bone komprenu la Esperanto-parolon, ĉar

tiam

ili povas ĝui Esperant-lingvajn teatrajn prezentadojn, deklamadojn kaj tiel plu. Krokodili oni nomas en Esperanto tion, ke esperantistoj parolas inter si nacilingve. Ekstermu la krokodilojn!

Pri la literatura laboro mi diras, ke ĝi estas ne tiel facila, kiel oni ĝenerale imaĝas. Esperanto estas facila lingvo, sed nur tiel facila, kiel lingvo povas esti facila. Sed traduki literaturan tekston kaj eĉ poemon — por tio oni bezonas krom lerto ankaŭ sperton kaj longan praktikadon. Do oni ne domaĝu re- kaj repoluri sian laboron. "Pacienco kreskigas rozojn" — oni diras. Nu, ankaŭ bonajn tradukojn kreskigas nur granda pacienco.

Karaj grupanoj! Post ĉi tiuj admonoj, kvazaŭ familiopatraj, akceptu miajn plej korajn salutojn kaj plej bonajn dezirojn.

J. I.: *Ni dankas al vi la mesaĝon kaj deziras al vi bonan sanon kaj verkemon.*

Dum la konversacio
J. Ingusz kaj K. Kalocsay.

Miaj renkontiĝoj kaj la lasta intervjuo kun Kalocsay

Dum daŭro de la vivo ĉiu homo renkontas memorindajn eventojn, portantajn ĝojon aŭ triston. Por mi estis neĉiutagaj travivaĵoj ĉefe tiuj du renkontiĝoj kun nia neforgesebla Kalocsay, pri kio mi deziras memori ĉi-sube.

La unua renkontiĝo okazis antaŭlonge, en la jaro 1947. Tiam — la unuan fojon post la pereiga mondmilito — Svislando disponigis lokon por la 32-a Universala Kongreso de Esperanto. Kiel ano de la hungara fervojista esperantista delegacio, ankaŭ mi havis bonŝancon partopreni la menciitan kongreson en Bern.

Svislando kaj la kongresurbo per ĝiaj mirindaj naturvidindaĵoj, la interkonatiĝo de diversnaciaj esperantistoj, la tuta atmosfero de la kongreso — kiujn pri antaŭe neniam mi povis sperti — faris al mi profundajn impresojn. Tamen la plej elstara travivaĵo por mi estis la unua persona interparolo kun mia samlandano d-ro Kalocsay. La tuta kongresanaro admiris tiun geniulon, kiu tiom alte tenis la torĉon de Esperanto. Rajte diris poste Reto Rossetti en sia sonbendigita mesaĝo: "... Oni ne povas vidi en la futuron, neniu scias kion portos la Tempo, tamen unu estas certe, ke vi, kara Kolomano estas kaj estos ĉiam unu plej hele brilanta stelo sur la firmamento de la Esperanto-literaturo. Vivu longe, kaj restu nia lumturo, montrante al ni la vojon sekvindan."

Ni, hungaraj esperantistoj — partoprenantoj de la kongreso — rajte estis fieraj, ke nia malgranda nacio havas geniulon, kiu signifas apenaŭ nemezureblan valoron en la Esperanto-movado, kaj je kiu povas esti fiera ĉiu esperantisto en la mondo.

Poste pasis la jaroj kaj mi havis okazon plurfoje viziti samideanon Kalocsay. Li akceptis min ĉiam kun sincera afableco, kaj tiuj renkontiĝoj haviĝis por mi ĝojon, neforgeseblajn horojn.

La lasta intervjuo

La 4-an de oktobro en 1975 mi vizitis lin por fari intervjuon. La interparoladon konservas sonbendo.³⁵⁹ Jen:

— *Tre estimata samideano Kalocsay, mi dankas, ke vi donis al mi eblecon viziti vin kaj sincere mi ĝojas trovi vin en bona sano. Se vi permesas al mi fari kelkajn demandojn, kun ĝojo mi aŭskultos viajn respondojn.*

— *Kiel vi vivas, kion vi agadas nuntempe?*

Kiel mi vivas? Mi vivas kiel maljunulo. La maljunulo havas siajn ĝojojn kaj siajn ĉagrenojn — ĉu ne? Estas specialaj maljunulaj aferoj, kiuj eble ne tro interesas eksterulojn. Eble mi parolos pri tio, kion mi faras.

Mia ĉefa okupiĝo estas la zorgado pri "Hungara Vivo", kiu — kiel mi ĝoje vidas — elluktis por si tute aŭtoritatan pozicion inter Esperantaj revuoj. La alia afero, kiu multe okupis min lastatempe, estas la t.n. DOMFABRIKO, kiun mi faras kune kun Ada Csiszár kaj ĝi entenas 6000 frazeologiajn esprimojn laŭ la modelo de la ZAMENHOFA PROVERBARO. Nun ĝi jam pretiĝis kaj estas eĉ presata, do mi povas esperi, ke ankoraŭ en tiu ĉi jaro ĝi jam estos aĉetebla.

Nu, poste mi havas ankoraŭ kelkajn projekton, iome duonfaratajn aferojn, sed en la farado de tiuj aferoj iom malhelpas tio, ke ŝajne la eldoneblaĵo en la Esperanta mondo nun stagnas, kaj ni scias, ke por literatura florado necesas krom la aŭtoroj, poetoj, tradukistoj ktp ankaŭ eldonistoj. Kaj kiam venis en Esperantujon elstaraj eldonistoj, tiam grandioze leviĝis ankaŭ la literatura florado en Esperanto. Ni memoru nur pri Vilmos Bleier, eldonisto de "Literatura Mondo", kaj Juan Régulo-Pérez, kiu en La Laguna de Tenerife faris admirindan eldonan laboron. Mi volas kun respekto memori ankaŭ pri Stefano La Colla, kiu volis eldoni PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO, sed bedaŭrinde nur du trionoj pretiĝis, ĉar la pluan eldonon malhelpis lia bedaŭrata morto. Nun neniom oni aŭdas pri Régulo-Pérez. Eble en la Nordo, en Finnlando komenciĝos ia eldonado, sed ĝi ankoraŭ ne evoluis je plena aktivado. Nu, tiel do ekzemple mia okupiĝo pri Catullus nun progresas malrapide, ĉar ne urĝas min la eldonanto, ke mi devus jam liveri al li manuskripton.

Krome mi okupiĝas ankaŭ pri la vortkunmeto de Esperanto, ĉar ĝuste tiu unu triono de la PLENA GRAMATIKO, kiun la karmemora Stefano La Colla jam ne povis eldoni, temus ĝuste pri la vortfarado kaj vortkunmeto. Do mi faras nun tiun vortkunmetan parton de la gramatiko por la "Budapeŝta Informilo" kaj eble ankaŭ por aparta eldono. Estus tre bone, se tiu vortkunmeta parto restus eternigita, ĉar mi ne scias, kiu faros ĝin, se mi ne faros la aferon.³⁶⁰

— *Kiel vi prikonsideras la praktikan signifon kaj perspektivon de Esperanto en la nuntempaj cirkonstancoj?*

Kompreneble mi rigardas la perspektivon de Esperanto favora, se mi ne rigardus ĝin favora, tiam mi ne okupiĝus pri la lingvo. Kaj kompreneble ekzistas kelkaj fenomenoj, kiuj ne estas bonvenaj en Esperanto. La esperantistoj inter si kvereladas, eble pli ol tio estus favora por la movado. Sed tio ĉi jam okazis. UEA nun estas ankoraŭ UEA, se ĝi restos en unueco. Okazis jam, ke UEA ne estis UEA, sed estis UEA kaj plus IEL. Kaj tamen la movado transvivis tiun kataklismon aŭ katastrofon, se oni volas uzi grandajn vortojn.

Kompreneble mi, kiel literaturisto rigardas la ĉefan kondiĉon de la florado de Esperanto en la florado de la Esperanto-literaturo. Sed ankaŭ de la organizo kaj en la junulara movado kaj en aliaj terenoj, ekzemple en la instruado, precipe en la deviga instruado en la lernejoj, estas jam tiaj rezultoj, kiuj antaŭigas la aferon de Esperanta-movado. Tamen oni neniam devas tro postuli kaj tro frue postuli ion. Tre ofte junaj aŭ novaj esperantistoj kutimas post kelka tempo malesperi kaj diri: kiel estas eble, ke tiel bona afero, tiel praktika afero — mi povus diri "mondsava afero" — tamen ne venkis, malgraŭ, ke baldaŭ estos jam cent jaroj de tio, ke Esperanto ekzistas? Nu, ĉio en la mondo iras malrapide kaj komforte, kaj oni devas kompreneble per ĉiuj niaj fortoj antaŭenpuŝi la aferojn, sed oni ne postulu tro, oni ne estu volisma, kiel oni diras la volantarismen en Esperanto, ĉar ties rezultoj estas plej ofte malespero kaj forlaso de la movado. Nu, se Cart kaj Boirac kaj la grandaj esperantaj korifeoj antaŭ kvindek jaroj povis labori por la lingvo — kvankam ili sciis, ke tio bezonos ankoraŭ jardekojn — ankaŭ ni povas multe fari. Sed postuli neeblaĵojn ne estas utila, ĉar tio nur malhelpas multajn aferojn.

Nur unu mi volas ĉi tie ankoraŭ diri: ekzemple la afergvidantoj, eĉ se ili konvinkiĝas, ke tia komuna lingvo kiel Esperanto estus bona por la mondo, tamen kiam ili devus oficiale fari ian paŝon je sia propra respondeco, ili timiĝas pri tio: ho ĉu mi ne kompromitos min mem, ĉu mi ne ridindigas min mem, ĉu mi ne estos elmetita al moko ktp, ĉu oni simple ne elpuŝos min el mia ofico? Pro troa agado eble oni identigas min kun la Esperanta movado.

Kiel vi taksas la rilaton de la junularo al la Esperanta movado?

Do, mi estas iom malproksime de la junulara movado, ĉar la junuloj havas alian plezuron kaj alian ĉagrenon ol la maljunuloj. La junuloj havas ekzemple muzikon multe pli laŭta, ol por mi estus agrable. Sed mi povas diri, ke la junulara movado estas tamen la garantio por la prospero de Esperanto-movado. Kaj kiel ni havis en la junula movado elstarajn personojn, kiuj poste avancis ĝis tia alto, ke ili sidas en la estraro de UEA, tiel mi esperas ke ankaŭ la nuna junula movado akiros por si tiujn gvidantojn, kiuj havos tiel vere svarman, vibran, entuziasman junulan vivon. Nuntempe oni vojaĝas multe, oni vojaĝas preskaŭ pasie tra la tuta mondo, kaj ĉe tiaj vojaĝoj Esperanto estas mirinde uzebla ilo. Tion oni devus iel konsciigi al la junularo, ke tiuj migradoj, tiuj vagabondadoj, kiujn ni tiel ŝatas nuntempe, tiuj estas sensalaj sen Esperanto.

— *Kara nia Majstro! Mi dankas viajn respondojn kaj fine mi petas, bonvolu ĝojigi nin per deklamo de iu el viaj ŝatataj poemtradukoj.*

Do, mi elektis por tiu ĉi laŭtleĝo poemon de Angelo Poliziano el du kaŭzoj: unue ĉar ĝuste temas pri la junularo, kaj ĉi tiu poemo estas vere junula poemo, kaj due: ĉar en la nunaj, iom malhelaj cirkonstancoj de la mondo eble ne estos maloportune laŭtleĝi poemon, kiu ŝvelas de renesanca gajo kaj sereno. Do aŭdu:

Angelo Poliziano:

KNABINOJ, MI PROMENIS...

Knabinoj, mi promenis je mateno
de meza Maj' en freŝa florigardeno.

Violoj kaj lilioj ĉiufanke
en verda herb' kun nova brilkoloro
paradis blue, flave, ruĝe, blanke.
Tuj mi kolektis el la belo flora
ornamojn por hararo blonde ora,
ke l' plenajn buklojn kovru floroĉeno.

Knabinoj, mi promenis je mateno
de meza Maj' en freŝa florigardeno.

La man' jam plenis, sed kion mi vidis!
Jen rozoj tie blankis kaj purpuris!
Plenigi mian sinon mi rapidis.
Kia parfumo sorĉa min saturis!
Neniam tiel mia kor' plezuris,
ĝin ravis la volupto de Edeno.

Knabinoj, mi promenis je mateno
de meza Maj' en freŝa florigardeno.

Ho, tiuj rozoj, estas nedireble,
kiel belegaj estis, kiel ĉarmaj!

Unu ĵus sin disvolvis, dua feble
svenemis, pluraj pompis purpurkarnaj.

Amoro diris: "El ĉi dorne armaj
deŝiru la plej belan tuj sen ĝeno".

Knabinoj, mi promenis je mateno
de meza Maj' en freŝa florĝardeno.

Kiam la rozo ĵus ĉiun petalon
disfaldis en la pompo plej impona,
knabinoj, ne atendu ĝian palon,
ĝin pluku, plektu por girland' festona,
deŝiru do por la ornamo krona
la rozon freŝe en la pleja pleno.

Knabinoj, mi promenis je mateno
de meze Maj' en freŝa florĝardeno.

*

Sorĉite mi aŭskultis la respondojn de Kalocsay, la junecan ardon per kiu li laŭtlegis ankaŭ la poemon. En tiu posttagmezo mi ne pensis, ke nia renkontiĝo estas la lasta.

Kálmán Kalocsay mortis baldaŭ post la intervjuo.

Ludoviko KAPITÁNY

Dum la lasta intervjuo
1975 Oktobro

359 La teksto aperis en: Monda Karuselo 1980:16, p. 6-9. Sonbendo en la KAL-ĈI Dokumentaro, kopio ĉe István Ertl.

360 Ĝi aperis en: Budapeŝta Informilo (1975); Sciencaj Komunikaĵoj (1977); DEK PRELEGOJ p. 9-37.

Fundamenta kontribuo

Kun Kolomano Kalocsay mi renkontiĝis persone — la unuan kaj lastan fojon — en majo 1971. Dum dudekminuta konversacio, kiam ĉeestis ankaŭ Ludoviko Kökény, la gastiganto Kalocsay rememoris pri siaj amikoj en Ĉeĥoslovakio kaj menciis ankaŭ siajn traduklaborojn — influatajn tiutempe de la romiaj aŭtoroj.

Multe pri frue antaŭ tiu ĉi renkontiĝo mi havis okazon ekkoni la erudician verkinton de la **PLENA GRAMATIKO, LINGVO, STILO, FORMO kaj PARNASA GVIDLIBRO**, kies renomo kompletigas la grandan heredaĵon de eminenta poeto, tradukisto kaj teoriulo samtempe.

Por mi la nomo de Kalocsay estas ligita kun la **STREĈITA KORDO** kaj la **FLOROJ DE 1' MALBONO**, kiuj impresis min en la komencaj jaroj de mia esperantisteco. Unuflanke la novaj kaj freŝaj tonoj, aliflanke brilaj interpretoj de la klasikulo. El tiu vidpunkto ili estas kvazaŭ antipodoj: la lingvo de l' poeto estas simpla, sen poeziaj artifiko, kiuj ofte obtuzigas la lirion de multaj aliaj kreantoj. Sed tiu sama instrumento ravas per disipaj gejseroj de brilaj interpretoj en liaj tradukoj.

La esperantista publiko kutimis kaj kutimas rigardi Kalocsay unuavice genia tradukisto de Shakespeare, Dante, Petőfi, kvankam ekzemple lia **STREĈITA KORDO** ne malpli pezas en la literaturaj tradicioj de la internacia lingvo. Prave atentigis Lajos Tárkony jam en la jaro 1932 pri tiu ĉi pionira loko de Kalocsay en la originala poezio Esperanta. Oni apenaŭ lernis el lia pritakso kaj post pli ol kvardek kvin jaroj ĝi restas fermita en la kolekto de studoj. Aparte mankas komentoj pri la postaj originalaĵoj de Kalocsay. Endas substreki, ke ne temas pri komprenigo de versfarado, sed pri analizo de tiuj fenomenoj, kiuj destinas la esencon de lia poezia verko. La vivplena patoso de **STREĈITA KORDO** kaj aliaj klare distingas sin disde pluraj efemeraj tonoj samtempaj. Ĉar Kalocsay perceptas la realon kiel pensulo en ĝia kompleto sen kroĉi sin al transcendo aŭ similaj fiktivaĵoj.

Tamen, la fonton, el kiu li ĉerpis por sia lirika triumfo, ankaŭ hodiaŭ ofte preterpasas la pilgrimantoj sur la vojo al poezio. Des pli aktuala kaj atentinda estas la mesaĝo de la **STREĈITA KORDO...**

La larĝskala plumo de Kalocsay instigas fari bilancon ankaŭ pri la kulminaj atingoj de Esperanto rilate al ties pontolingvaj funkcioj. Lia verko proponas sin tia kompleksa sinteza monografio, kiu povas samtempe fariĝi modelo por la kritika apreco de nia literaturo precipe inter la neesperantistaj medioj. Ĝi devus reliefigi spertojn kaj eblecojn de Esperanto sur la literatura tereno kaj en la perado de kulturaj valoroj. La ĝis nun aperintaj artikoloj kaj eseoj havas modestajn pretendojn tiurilate kaj ili estas verkitaj sole por la uzantoj de la lingvo. Ili akcentis ĉefe la lingvajn vidpunktojn ne okupiĝante pri la sociaj kriterioj. Estas perspektiva tasko de niaj literaturistoj kaj literatur-amantoj adekvate apreci la rolon de Esperanto en la internacia kompreniĝo per tradukoj, al kiuj Kalocsay viciĝas per sia fundamenta kontribuo.

Oldrich KNICHAL

Prago, Aŭgusto 1977.

Kvinjara plano
Kalocsay respondis al Ludoviko Kókény

— *Kara Kálmán Kalocsay, jen proksimiĝas jarfino, kiam oni kutimas fari planon por la nova jaro. En la hungara ekonomia mastrumado oni prilaboras ĝenerale t.n. "kvinjarajn planojn". Ĉu vi parolus pri viaj planoj por la sekva kvinjara periodo?*

Ha, ha! Kvinjara plano! Ĉu vi ne pensas, ke en mia aĝo, ĝi estus troa optimismo?

— *Sed ni pensu ekzemple pri Shaw, Picasso... Kaj se mi bone scias ankaŭ via patro vivis 92 jarojn.*

Ne daŭrigu!... Konsidere la taskojn, kiuj eble helpas atingi pliajn sukcesojn en nia movado, bremsas ĝuste la *aĝo*, ĉar en la Hungarlanda Esperanto-movado kaj literaturo antaŭvideble sekvas nun periodo de ondovalo. En la lastaj tempoj oldaj movaduloj retiriĝis pro malbona sanstato, kadukeco. Nuntempe iom stagnas la movado, ĉar mankas tiu generacio — la mezaĝuloj — kiuj transprenus la stafet-bastoneton. Bezonas iom da tempo, kiam la junuloj ŝtopos tiun vakuon. Espereble ĉi tiu tempo ne estos tro longa.

— *Via aŭguro pri la ondovalo koncernas ankaŭ la Esperanto-literaturon. Vi konas la agadon de la pli junaj hungarlandaj Esperanto-aŭtoroj. Certe troviĝas inter ili talentuloj. Ĉu ne?*

Certe... Tamen ni preterlasu la listigon, ĉar se mi forgesus mencii ies nomon, eble ĝuste tiu tondus la flugilojn de kandidato.

— *Ni revenu al la temo pri viaj planoj.*

Do, antaŭ ĉio nun ni devas zorgi pri la DOMFABRIKO, espereble ĉi-jare aperonta. Ni devas kunmeti urĝe specialan indekson, kiu donos helpon al eksterlandanoj kiel manipuli nian kolekton. Ni planas laŭ ties materialo kunmeti frazaron Esperantan, kaj eble eldonigi ĝin ĉe Régulo... Ni devas daŭrigi la komencitan legolibron por ekzamen-kandidatoj. Tia lernolibro vere mankas en Esperantujo. La provizoran strukturon de la libro jam prilaboris Ada.

— *Mi konsentas, ke tiu libro estus tre utila, sed ni esperantistoj dorkotas alian, pli gravan ideon: aŭtobiografio kaj bibliografio de Kálmán Kalocsay. Cetere tiaspecaj verkoj ne abundas en Esperantujo.*

Via propono — pri aŭtobiografio — ne tro entuziasmas min. Kial? Nu, anstataŭ longa klarigado legu mian poemon "Letero al Julio Baghy" en ARGENTA DUOPO.

— *Mi memoras al la verso: "...anstataŭ montri min aŭdace, mi emas kuntiriĝi erinace". Ĉu?*

Jes, sed kion mi diris tiam — antaŭ jardekoj — validas ankaŭ hodiaŭ.

— *Ĉu vi pensas, ke tiun poemon la esperantistoj akceptas kiel argumenton?*

Eble ne. Tamen kiel ni diras Domfabrike: "Domaĝe pri la benzino!" t.e. ne lacigu por konvinki min. Se iam oni bezonas Kalocsay-biografion, verku ĝin — post mia morto — kiu postvivos min. Tiu laboro ŝarĝu la posteulojn...

Estas alia afero la bibliografioj ĝenerale. Se mi bone scias en la "Budapeŝta Esperanto-Arkivo" ĉe HEA oni komencis registri bibliografiajn indikojn de kelkaj verkistoj. Tiaj kunmetaĵoj estas tre utilaj manlibroj, kiel vojmontriloj en la ĝangalo de dise — en revuoj, gazetoj — aperintaj verkoj.

Cetere Ada Csiszár insistis pri ĉi tiu laboro. Do ĉi-jare ni komencis listigi miajn dissemitajn verkojn. Ĝi estas ege laciga laboro, kaj postulas formikan diligentecon. Se mi ne konus la persistan karakteron de Ada, certe mi ne apogus tiun temporaban entreprenon.

Nuntempe kaŭzas al mi zorgon mia TUTMONDA SONORO. Amaso de poemoj latinaj, helenaj, orientaj, francaj, italaj, anglaj, katalunaj, kimraj ktp plenigus multajn volumojn. La materialo estas jam en ordo, sed ĝi ne konvenas por presado. Mi devas retajpi la manuskriptojn, sed mi observis, ke renhemoragio kaptas min laŭperiode. Pli frue dumonate, nuntempe monate. Tiuj periodoj koincidas kun la redaktado de *Hungara Vivo*. Mi konkludas, ke la tajpado influas mian sanstaton. Sekve mi devas laŭeble eviti la skuiĝadon. Afliktas min la penso: kio okazos pri la manuskripto, se trafos min ia nedezirindaĵo? Mi timas transdoni ĝin al kiu ajn, ĉar mi ne havas kopiaĵon pri la poemoj. La tajpado ne urĝas min, ĉar en Esperantujo ne ŝvarmas eldonistoj...

— *Mi dankas vian respondon kaj deziras, ke via bibliografia kunmeto prosperu, sed la Kalocsay-biografion la posteuloj faru kiel eble en la fora estonto.*

Ludoviko KÖKÉNY

Budapest, 1975.09.30.

"... Sed la printempo floras ..."

Amo al Belo, al Poezio — mirinda sento de la homo. Karmemora Kolomano trovis ĝojon en la belo de la vivo. Lin plezurigis la belarto. Li ŝatis poetojn, kaj li ame kolektis iliajn verkojn por brilaj paĝoj de la legenda *Literatura Mondo*.

Marie Hankel pravas: "Lingvo kun poezio estas senmorta." Tiom bonege pruvis Kolomano Kalocsay. Lia kreado prilumigis, riĉigis nian literaturon. Liaj vortoj radias, kantas, ĝojigas. Elstara majstro ĝuis en laboro, en poezio. Dum la tuta longa vivo Kalocsay okupis sin pri la poezio.

Granda animo de la poeto aspiras al komunikiĝo kun la homoj de aliaj landoj. Por tio Kalocsay trovis mirindan helpon en Esperanto. Kiel fervora adepto de la Internacia Lingvo, li pli kaj pli alvenis al la konvinko, ke Esperanto estas trezoro de la homaro, kaj kultura faktoro, kiu havas realan rolon en la sociaj evoluprocezoj. Samtempe li konkludis: "Oni povas diri, ke la tuta Esperanto estas poezia lingvo." Kaj li sindone, fidele, ĝis la lasta spiro donis sian talenton al la nobla ideo de la Internacia Lingvo kaj al la amata poezio. Li ne ŝvebis super realeco. Li iris en ritmo de la kuranta vivo, dediĉante sian plumon al vero, justo, paco.

Dankon meritas nia karmemora poeto, kiu simile al entuziasmaj antaŭuloj, kuraĝe kaj persiste daŭrigis pluporti la stafeton de Esperanto.

Kvankam ni esperantistoj estas malmultaj kaj malriĉaj, tamen tiaj homoj, kiel Kolomano Kalocsay, tenas, portas kaj elradias la esperon, ke la printempa verdaĵo nepre venkos la dezerton!

Fasko da leteroj — kiujn mi ricevis dum 12 jaroj de Kolomano — gardas liajn vortojn. Mi relegas ilin kaj ŝajnas, ke mi aŭdas la vivan voĉon de mia kara instruisto kaj amiko. Jen kelkaj citaĵoj el la leteroj de Kalocsay:

*

Budapest, 16.X. 1964.

Tre Kara Saŝa! (Mi kredas, tiel oni nomas ĉe vi karese Aleksandron).

*Kore mi dankas vin por la bela poemo, dediĉita al mi.*³⁵⁹

Mi ĵus tradukis Reĝon Lear en Esperanton kaj oni jam kompostas ĝin en Rotterdamo.

Eble Szilágyi jam raportis al vi pri la aventuroj de via volumo... Nu mi venigis ĝin al Régulo... eble, oni jam kompostas la libron.

Kun multaj gratuloj pri la volumo, kun mil salutoj kaj abundaj bondeziroj precipe pri via sano. Via kore kaj sincere

K. Kalocsay.

*

Budapest, 12.IV.65.

Kara Amiko, ĵus mi ricevis de Régulo vian volumon "Sur la vivovojo" kaj mi volas vin kore gratuli: la libreto aspektas bele.

Via kore K. Kalocsay.

*

Budapest, 8.VI.1967.

Tre Kara Saŝa!

Korege mi dankas vin pro viaj ekmemoroj, je kiuj mi ne respondis lastatempe, ne tiom pro mia pigreco, kiom pro mia malsano. Kun granda ĝojo mi vidis la sesan kajeron de "Por la Paco", enhavanta ankaŭ vian kontribuadon.

Ĉu vi legas la numerojn de la "Hungara Vivo"? Se ne, kaj se vi deziras, mi tre volonte abonos por vi la revuon.

Resanĝinte kaj aranĝinte mian korespondadon, mi nun revizias miajn du Shakespeare-tradukojn: "Somermeznokta Sonĝo" kaj "La Tempesto". Mi esperas, iom dube, ke mi ĝisvivos ilian aperon. La samon mi ne esperas pri la "Parnasa Gvidlibro", kiu jam unu kaj duono da jaroj estas kompostita en Varsovio...

Amike via K. Kalocsay.

*

Budapest, 2.II.1970.

Tre Kara Amiko!

Ĝus mi skribis al la simpatia konatino Nadia Andrianova, ke ŝi transdonu al vi materialon de "Domfabriko". Tie en la aldonajaj vi trovos ĉion sciindan. Mi esperas, ke vi akceptos la taskon esti kunlaboranto.

Dankon por viaj sendaĵoj, tre bonvenintaj.

Kun bondeziroj

via K. Kalocsay.

*

Kompreneble mi volonte akceptis la inviton kaj partoprenis en tiu honoriga laboro. Kiam mi ricevis la honorekzempleron kun aŭtografoj, responde mi sendis al la aŭtoroj mian rimitan opinion pri ĝi.³⁶⁰

La lastan mesaĝon de Kalocsay interpretis al mi s-rino Ada Csiszár la 10-an de februaro 1976. Jen:

"... Maĝoje mi sciigas vin, ke nia kara Kolomano Kalocsay estas en hospitalo. Atakis lin vivdanĝera renhemoragio. De tago al tago malboniĝas lia sanstato. Lin savus nur mirakloj — sed tiuj hodiaŭ jam ne ekzistas.

Kolomano kun ĝojo montris al mi vian leteron ene la poemeton per kiu vi salutas la aŭtorojn de DOMFABRIKO. Ankaŭ en lia nomo elkoran dankon, saluton."

Tio estis la lasta saluto de Kalocsay al mi. Post kelkaj tagoj la poeto kaj bona homo forpasis... Sed lia nomo kaj verkaro vivos longe kaj tutmonde.

Mi piatate citas lian filozofe ĝustan kaj vivkonfirman versokvaron el "Cinikaj Sonetoj":

Ĝismorte ja doloras
Mizero, krimo, frosto,
Sed la printempo floras
Sur via polva osto!

Aleksandr LOGVIN

Lubni (Ukrainio), 14.06.1976.

359 La dediĉita poemo: *La Konsolo*.

360 Vd en: OMAĜE 5-a vol. p. 80.

Sonorilludo

1919. Antaŭ miaj animaj okuloj staras la belstatura, nobla figuro de Kolomano Kalocsay deklamanta sian ĵus verkitan *Sonorilludon* en la kunveno de *Hungara Esperanto-Societo*. En mia nuntempa surdiĝintaj oreloj, ĝismorte sonos la bronza voĉo de la poeto, kiu verŝis sian animon en la ritmojn, kiuj admirinde imitas la sonorilan sonon. Meze de la aŭskultantaro sidis mi, sensignifa mezlernejano en kurtaj pantalonoj, novbakita esperantisto, kiu ankoraŭ neniam aŭdis poemon en nia lingvo, al kiu la deklamo ŝajnis esti nepriskribebla bela sonĝo. Poste mi lernis la *Sonorilludon* parkere kaj ofte recitis ĝin en esperantistaj rondoj dum miaj mondvojaĝoj. Kvankam mi neniam sukcesis egali la inspiron de Kalocsay, laŭ mia modesta maniero mi certe interpretis la spiriton de ĉi tiu majstroverko, per kiu mi ĉiam rikoltis tondran aplaŭdon.

1969. *Ho, mia kor', ne batu maltrankvile...*

Mi pilgrimis post duonjarcento al tiu grandulo... Mi supreniris ŝtupojn, kiuj ankoraŭ portis la vundojn de sieĝo kaj revolucio. La pordo malfermiĝis kaj Kalocsay varme premis mian manon. Ni eniris lian laborĉambron plenan de libroj kaj E-revuoj. Li parolis al mi pri siaj verkoj kaj ni amike diskutis la staton de esperantologio. Mi esprimis mian timon pri la lavange kreskanta vortprovizo, sed li diris, ke mi troigas la danĝeron. Temas nur pri kelkcentaj neologismoj, kiuj grandparte restos teknikaj terminoj de poezio. Li parolis tiel milde kaj konvinke, ke mia maltrankvilo pri la "neologisma manio" subite forvaporigis kiel kamforo.³⁶¹

1973. Jam kun pli facila koro mi trovis eniron en la ermitaĵon de Kalocsay. Ĉi-okaze li jam trabrakumis min. Parolante pri esperantologio, li min denove trankviligis. La sistema forigo de la mal- vortoj ne okazos, kaj nia lingvo ne alprenos ĉiujn verajn kaj imagitajn bonajn punktojn de la nacilingvoj, simple, ĉar la homa cerbo ne povas ilin enteni. Tiu ĉi parolo efikis kiel kvietigilo el kalia bromido, injektaĵo donita al mi de la doktoro.

Kun intereso li aŭskultis mian rakonton pri la gaja vojaĝo, kiun mi faris post la kongreso de Varsovio al Brno, kie ni kune rolis en Esperanta literatura prezentado kun Tárkony kaj kun aliaj Budapeŝtanoj.³⁶²

Mi vidis lian skribmaŝinon, kiu estis vera veterano kiel li, kaj kiu ankoraŭ mirakle laboras, laboras eĉ dum nokto. Kiam Kalocsay laciĝas de Ŝekspiro, li prenas Heine aŭ alian. Parolanta pri Heine, li laŭtlegis sian tradukon *Doña Klara*. Mi memorigis lin al la unua prezentado de la *Sonorilludo*. Li emociiĝis kaj, jen subite, li ekstaris kaj deklamis tiun poemon. Kvazaŭ hipnotigite mi rememoris la oran junecon, sed mia koro doloris, ĉar la voĉo de la olda poeto estis nur pala reflekto tiu de la bronza sono de antaŭ pli ol duonjarcento.

Kiam Ada Csiszár en 1991 fondis la *Amikan Societon de D-ro Kálmán Kalocsay* kaj invitis min kiel kunfondanton, mi konsederis tiun inviton kiel grandan honoron kaj rapidis aliĝi al la rondo de la admirantoj de la majstro ĉe kies piedoj mi sidis en mia juna aĝo.

Jozefo MAJOR

Wellington (Nov-Zelando) Januaro 1992.

361 Pri lia partopreno en la neolog-milito vd. en: OMAĜE 5-a vol. p. 11-12.

362 Vd p.76.

K. Kalocsay kaj mi — karmemore

Kálmán Kalocsay konigis kun Esperanto en la somero 1911, kiam mi naskiĝis. Li edziĝis en 1929, kiam mi esperantiĝis. Senplua estas tia koincido aŭ io simila de la sorto kaj de la kariero inter li multflanka geniulo kaj mi sengeniulo.

Sed tamen en 1961 la sorto lasis, ke ni renkontiĝu en nia Simpozio: "La Zamenhofa Esperanto". Poste mi ricevis de li afablan leteron, kaj ni interŝanĝis kelkajn leterojn, tiam, kiel "kolegoj" en la *Akademio de Esperanto*. En 1969 mi la unuan fojon aŭskultis lian tre junecan voĉon el la sonbendo, kiun T. Huĝimoto kun speciala peto al li pretigis kaj reportis hejmen: en ĝi li salutas la japanan samideanaron (citante la nomojn de Nakamura, Miyamoto, Kawasaki, Ossaka) kaj finas ĝin per deklamado al ni kelkajn el sia poemaro.³⁶³

En tiu sama jaro komenciĝis mia modesta kunlaboro super la centoj da frazoj, kiujn li tajpis el la frazeologia-manuskripto "Domfabriko". Retrorigardante, mi nun sentas tion mia granda honoro kaj plezuro, ke mi tiel povis iom kunlabori en lia plej lasta verko, ellaborita kun Ada Csiszár: 6000 Frazeologiaj Esprimoj Hungaraj-Esperantaj.³⁶⁴

Inter la dek kunlaborantoj nomitaj en ĝia Antaŭparolo estas du neeŭropanoj: krom mi, ankaŭ Probal Daŝgupto, Kalikato. Kalocsay siatempe skribis al mi, ke mi "pliigu la ekstereŭropecon de la domfabrikaĵoj", t.e. ne nur rimarkigi (kion mi faris per komentoj kaj sugestoj) la por mi dubsencajn aŭ ne kompreneblajn el ĉiuj numeritaj frazoj, sed ankaŭ aldoni, kie eblas, japanajn similaĵojn; sed en ĉi-lastata rilato mi ne povis multe kontribui, kiom mi volis, ĉar mankis al mi tempo kaj kapablo tuj eljapanigi laŭmende kaj belforme niajn idiotismojn parencajn al la tradukitaj el la hungara.

Ĉiuokaze, mi nun lasas min kredi kaj gratuli, ke li supervivis la eldonfeston de sia verko, celebre kun la kunaŭtorino kaj multaj aliaj.

Oni scias, ke Kalocsay ĉiam vidis en Esperanto la plej junan lingvon de la hindoeŭropa familio. Nun, kiam li jam forpasis, mi tre bedaŭras, ke mi perdis por ĉiam la ŝancon demandi lin, kial li ne bonvolis dediĉi iom de sia genio, por pli internaciigi ol eŭropigi nian lingvon, tiom pli, ĉar ne hindoeŭropa estis lia gepatra lingvo, samkiel la mia. Lia emo identigi Esperanton kun la hindoeŭropa familio kelkfoje ĝisiris tian ekstremon, ke li kondamnis ekz. la prefiksitan formon fin- (ĉar, laŭ li, ĝi ne estas hindoeŭropa) kaj verve proponis anstataŭgi ĝin samsence per ĝis- (ĉar, laŭ li, ĉi tiu estas hindoeŭropa). (Vojaĝo inter la tempoj, p.139-). Mi do verkis artikolon "Pledo por la prefikso fin- — el vidpunkto de ekstereŭropanoj" kaj publikigis ĝin en "Oomoto" (1968, p. 144-). Al tio li ne reagis speciale, sed en unu sia letero li kribis al mi, ke li kun granda intereso legis mian (aliteman!) artikolon, kiu aparigis kelkajn numerojn poste, kaj aldonis en bonhumora kunteksto: tiu alia artikolo pri fin- "ne ĝojigis min".

Monumenta estas la Esperanta-verkaro, kiun Kalocsay postlasis, kaj el kiu la plej multajn, ekde "Mondo kaj koro", mi — feliĉe — posedas. Por tributi al li karmemora mian respekton, mi de nun relegos kaj -studos ilin kaj prunte ankaŭ la kelke mankantajn en mia biblioteko.

T. NAKAMURA

Laŭ lia afabla permeso repr. el

Oomoto 1976:Januaro-Junio, p. 45-46.)

363 En 1973 aperigita sur disko en la serio: "La Voĉalbumo de Esperanto". Vd en: OMAĜE 1-a vol., p. 52.

364 Vd en: OMAĜE 6-a vol. p. 78-82.

Kolomano Kalocsay

Kiam ĉe la pordo aperis ridetanta vizaĝo kun vigla rigardo, mi iomete hezitis. Ĉu tiu estas la sepdekjarulo, al kiu min direktis la redakcio de "Nuntempa Bulgario" por preni intervjuon? Kaj mi iom necerte demandis:

— *Samideano Kalocsay?*

— Jen li mem antaŭ vi! — li gastame etendis la manon kaj min invitis internen.

Tiu renkontiĝo neelviŝeble engravuriĝis en mian memoron. De tiam pasis 14 jaroj, sed mi klare vidas en la imago lian enpensiĝintan mienon, liajn mimikojn kaj viglajn gestojn, mi sentas ankoraŭ la fajrerojn en liaj okuloj, la nefrakaseblan de la vivoŝtormoj entuziasmon kun radikoj de la fora pasinteco de la Esperanto-movado kaj strebanta al la estonteco. Mi sidis ĉe la tablo, sed li preskaŭ ne sidiĝis. Kaj nun mi ne povas imagi lin en trankvila pozo. Li promenis tra la ĉambro, li gestis, ĉe iuj miaj demandoj enprofundiĝis por momento, iris al la biblioteko, eliris libron, rapide trafolumis kaj montris al mi. Mi meroras, ke tiam, observante lin, mi rezonis kio estas li: kuracisto, lingvisto, aŭ poeto? Ĉar en ĉiu el tiuj tri sferoj li estis entuziasmulo kaj talentulo, al ĉiu li rilatis kun amo kaj sindonemo. Li plendis tiam antaŭ mi pro la granda laboro en la malsanulejo, kiu ne ebligis al li sin dediĉi tute al Esperanta literatura laboro. Mi konstatis, ke la plej grandan parton de lia vivo kaj lia konscio tamen okupas la belarta literaturo, la poezio.

Kiel unua hirundo aperis en 1921 la originalaj poemoj "Mondo kaj Koro". Poste venis la versa traduko de "Tragedio de l' Homo" de la hungara klasika poeto Madách (1924), en 1931 — nova kolekto de originalaj versaĵoj "Streĉita Kordo". La posta "Eterna Bukedo" entenas poemojn tradukitajn el 22 lingvoj.

Per la verko "Lingvo, Stilo, Formo" aperas jam la lingvisto Kalocsay. Sekvas la grandega laboro de la traduko de "Infero" de Dante. La plejparto de la versaĵoj de "Hungara Antologio" estas tradukitaj de li. Konsiderinda estas lia laboro ankaŭ en "Bulgara Antologio", kompilita de Ivan H. Krestanov. Sekvas "Ezopa Saĝo" kaj "Floroj de l' Malbono" de Baŭdelaire. Li tradukis Heine kaj multajn mondajn poetojn. En la momento de nia renkontiĝo li preparis volumon de verkoj presitaj en revuoj "Nica Literatura Revuo" kaj "Norda Prismo".

Li flamis en sia Esperanta laboro. Lia penso estis en konstanta movado. Kaj li ne intencis ĉesigi ĝin. Al mia demando pri liaj planoj li tuj respondis:

— *Al mi estas necesa tempo, multe da tempo. Mi pliriĉigos la "Eterman Bukedon" nomante ĝin "Tutmonda Sonoro". Tio estos antologio de la antikva tempo ĝis la hodiaŭo. Mi planis unue tri volumojn, sed akumuliĝis multe da materialo kaj mi ne scias ĉu jam sufiĉas tri volumoj...*

Tiam Kalocsay esprimis antaŭ mi miron kial oni kreas versaĵojn, kiujn neniu komprenas pro manko de klara subjekto kaj ideo, pro tro peza lingvaĵo.

— *Verki en Esperanto tiajn poemojn estas granda fuŝado* — konkludis li. — *Tio kompromitas Esperanton. Ĉar ja ĝi estas kreita, por ke la popoloj interkompreniĝu.*

Li konsilis ĉiun poeton, kiu verkas originale en Esperanto, ankaŭ traduki. La tradukado ĉiam postulas pli grandan streĉon. Ĝi helpas al la poeto plibonigi sian versfaran teknikon.

Kalocsay estis koloso de la Esperanta literaturo. Torĉo kies flamo konstante kreskis kaj hele brilis sur la Esperanta firmamento. Li forbrulis vigle kaj sen fumo. Sed restis kiel monumento lia granda faro,

Violin OLJANOV

Laŭ afabla permeso de s-ano Oljanov

repr. el NB 1963:2, (Aldono), kaj el Paco 1976:4, p. 4.

Lingva artisto de Esperanto

Mi renkontis Kolomanon Kalocsay la unuan fojon en la unua postmilita Berna Universala Kongreso en 1947.

Mi konjektis, ke nia poezia giganto venos. Kiam ni paŝis tra la bierkelo dum la *Interkonatiĝo*, mi subite haltis ekvidinte lian altan figuron ne miskoneblan pro viditaj fotoj. Al mia edzino mi raŭkis: "Vidu — jen Kalocsay!". "Do iru al li!", ŝi diris. "Ne", mi diris, "mi ne volas". "Do mi iros", ŝi diris, kaj alpaŝis. "Pardonu, ĉu vi estas doktoro Kalocsay?". La vive afablaj okuloj ŝin rigardis. "Jes". "Do mia edzo volas renkonti vin, sed li timas." "Kiu estas via edzo?". "Reto Rossetti". "Kie li estas?". Li malfermis vaste al mi la brakojn, mi rapidis al la invito kaj li min ĉirkaŭvolvis.

Plej impresis min lia malorgojlo, lia simpla bonhomeco, lia ĝentila pacienco kun ĉiu, kiu volis alparoli lin. Se iu havis ion por diri, sed balbutis, fuŝparolis, Kalocsay aŭskultis afable kaj paciencie, lia luma inteligento kaptis la esencon de la proponata ideo, ignorante la densan vepron de fuŝa esprimado, kiu ĝin ĉirkaŭvolvis, kaj li vigle diskutis la temon.

Kiam iuvespere ni forlasis lin, ĉar mia edzino havis kapdoloron, li poste venis al nia hotelo — kvankam li mem estis tre laca, apenaŭ dorminta la antaŭan nokton — kun piloloj por mia edzino "por la kapdoloro". Tiom ĝentila li estis.

La okazo de la nedormo estis jena. La antaŭan vesperon ni sidis kun li kaj Béla Berceli (Bleier) en kafejo. Berceli memorigis lin, ke li devos verki kongresan vers-saluton por la morgaŭo. "Nu", diris Kalocsay, "ni povos sidi ĉi tie ĝis noktomezo, kaj poste mi verkos ĝin." "Sed," diris Berceli "ni devas ĉi-nokte diskuti dum almenaŭ tri horoj." "Nu bone," diris Kalocsay "post la diskuto mi verkos la saluton!" Kaj la bonegan Kongresan Saluton (La Kapitan' el Berno), li efektive verkis en la profunda nokto kaj prezentis akurate kaj plenverve la proksiman matenon al la Kongreso!

Due mi lin vidis dum vizito al Budapeŝto en 1949.³⁶⁵ Lia poezia entuziasmo estis ankoraŭ en apogeo, kaj li volonte demonstris, deklamis (impete, torente) kaj argumentis pri poeziaj formoj. Voĉo: ĉiam hela, velura, sonora, animita de trasento, kun fajra elano. Li diris, entute, ke plej prefere li redaktus gazeton nur poezian, sed kie preni la subtenon por tia eldonaĵo?

Sed li ankaŭ volonte diskutis lingvajn temojn, kaj ni longe boksis pri la eterna PO-demando. Al li malplaĉas la elizio de dusilabaj radikoj finiĝantaj per -i. La unusilabaj (kri', sci') kaj la trisilabaj (anemi', parodi') estas laŭ li pli bonaj.

Lia stifilino Mária diris ke li havas grandan konon pri la epidemiaj malsanoj, kaj devus verki pri ili tian libron, por kiu li mem estas unike kompetenta, sed li konstante prokrastas, kaj anstataŭ — "skribas poemojn".

Béla Berceli rakontis, ke Tárkony havas foje flamiĝeman temperamenton, kaj iam dum disputo kun Kalocsay li disŝiris sian poemon kaj kolere foriris. Poste Berceli vidis, kiel Kalocsay genuas sur la planko kaj paciencie kolektas kaj kunmetas la disŝutitajn paperpecetojn de la Tárkony-poemo.

En 1948 li fariĝis grave malsana. En 14. II. 48 li skribis: "Mi estis proksime al tio, ke (kiel hungare oni diras) mi flaru la violojn de-sube. Nu, lerta operacio tamen min restigis ĉi-supre."

Dum la ribelo en 1956 lia domo en Mária u. 34 IV. 2 estis grave bombdifektita kaj li dum kelka tempo devis loĝi en la hospitalo kaj frue en 1958 li transloĝiĝis al Nyúl u. 4. Budapest. En letero de 2. V. 58. li skribis: "Mi transloĝiĝis, kaj tion oni povas nomi transpereiĝo, transruiniĝo, transplagiĝo, transtertremiĝo ktp."

Jen ĉio, kion mi povas kontribui.

Reto ROSSETTI

Bristol, 1985.

Reto kaj Kálmán aranĝas la paĝojn
de Izolo

Máriabesnyő (somerdomo), 1949.

365 Ĉi-okaze li kolektis oktavojn el Izolo (disŝutitajn en kaduka barakto), kiu pro la dua mondmilito ne povis aperi. Ĝin eldonis UEA en 1977. Vd en: OMAĜE 2-a vol. p. 23-24.

Vid-al-vide kun Kolomano

Julion 1955 — dek jarojn post la militfino — nordlanda esperantisto ankoraŭ povis sin senti kiel iaspeca kurioza animalo en Budapeŝto, la renoma nesto de trifoje fenikse renaskita *Literatura Mondo*. Multloke en la movado ŝvebadis neklara idearo pri la fakta rolo de nia lingvo en kelkaj t.n. orientaj landoj: ĉu situacio de libera evoluo, bonvolema rekono, nura tolero aŭ ĉu de fatala nedezirinda? Memkompreneble la scivolemo de tia nordlanda vizitanto sin insiste direktis ĝuste al tiuj kaj parencaj tiklaj punktoj. Ĉu veras, ke iuj ne bone informitaj komisaraj subkomprenigadis kvazaŭan anatemon kontraŭ rilatoj kun okcidentaj eksterlandanoj? Ĉu pravas onidiroj, ke Kalocsay kabeiĝis, t.e. kiel alia fama verkisto Kabe (K. Bein) dizertis el niaj vicoj?

Per multaj verbaj ekspedicietoj tra la tiutempa *terra incognita* de l' hungara ĉefurbo mi tiam skoltis la terenon kontraŭpesante konfirmojn kaj korektigojn por ekhavi pli kaj pli nuancitan bildon. Tute sendube kaj aktuale je ekzistas nepra esperantista aktivado. Propraokule mi spertis ties lokan floradon tagon post tago, eĉ nokton post nokto. Oni klare kromprenigis, ke jam dum multaj jaroj de ŝajna silento, grupoj senĉese aplikas Esperanton, Baghy, Kalocsay, Tárkony eĉ ĉiutage per kaj por poezio, dum la pli profana ekstera aktiveco iom lamis. Laŭ kelkiuj limigis la publikan agadon hezita atendado por signaloj aŭ rektaj impulsoj el aliaj orientlandoj. Pli kaj pli vitale sentiĝis neevitebla neceso fidindigi sin antaŭ la reĝimo, ekz. per rekonita porpaca iniciato.

Du noktaj simpozietoj

Tiun someron fluadis apudborde de Danubo alia rivero, tiu de glaci-kafo! Karakteriza kaj longtradicie kulminis la kunvenado en artisma medio, prefere nokte. Tute nature do ekzistis deziro kaj klopodo aranĝi en kafejo de artistoj (Varsányi, Barta)³⁶⁶ rendezuon kun Kalocsay. Tia evento pli elokventus ol multaj dubaj klarigoj, deklaroj aŭ demandoj.

Kaj vere, Kalocsay venis. Iomete malfrue — aŭ tarde kiel li diris — sed rekompence li aperis dum du sinsekvaj vesperoj aŭ noktoj. Sub ikonsimila pentraĵo de la naci-heroa poeto Sándor Petőfi evoluis preskaŭ simpozieto poezia kun dekkelk-persona streĉa atento, ŝajne necesa por plene varmigi, pluasociigi la inspiron de la pseŭdonimo *Kopar* = kalva en la hungara, kaj tia li fakte aperis kun sia karakteriza cezara profilo, cetere gradon pli eleganta ol ni ceteruloj. Leono inter pudeloj.

Niaj unuaj konversaciaj rimarkoj konsistis en speco de humora skermeto celante konon pri reciproka verkado kun iu-alia korektigo: Ne, ne, mi *ne* estas Peter Peneter nek fabrikis *Sekretajn Sonetojn!* — Tamen sammomente legeblis ĉirkaŭ la ironietaj, aristokrataj lipoj, ke granda bubo, eĉ koboldo, ankoraŭ loĝis en la 63-jarulo. Kontribuis al la amuzo lia foja preteksto (?) ne tute bona aŭdi. — Li petis al Tárkony kaj mi voĉlegi. Tárkony el siaj TRIRIMOJ, mi de GRUK, ambaŭ ankoraŭ neeldonitaj. Ni hilarie ridis pri la Tárkonya ŝatesprimo *hantas* kaj mia prefero al *geopoezio*.

Intermite, epizode reveliĝis la sorto de Kalocsay kaj aliaj ĉeestantoj dummilite. Ekz. ĉe Kalocsay private dum la lastaj apokalipsaj monatoj sin kaŝis judoj, mortdanĝero por ambaŭ partoj. Klare, ke la militjaroj fandis novan personecon kun fortaj konvinkoj: kontraŭ falsa neŭtralismo, kontraŭ falsa burĝemo, idealismo kaj naiva humanismo. Ne plu sibaritaj fajnaĵoj, sed pozitivo por nova rekonstruo.

Evidenta afero estis, ke nature Kalocsay neniam ĉesis verki, eĉ ne dum plej malluma 1944, kiam "propraj"

Soldatoj marŝas kante tra la stratoj,
batali ili marŝas tiacele,
ke la liber' pereu, ke kruise
plu tenu ilin en servuta stato
orgojla bankiero kaj magnato,
- - -
kaj mi deziri devas, ve horore,
malvenkon sangan al ĉi voj-erara
hungara greg' — *nessun maggior dolore...***

Tiel el siaj tirkestaj kolektoj *Tra la ŝtormo* kaj *Notlibro de poeto* deklamis kun rapida artikulacio la nebridebla bardo. La soneto estis lia preferita formo. "Soneto taŭgas por ĉio", li diris, "ĉu amoro, ĉu Hitler-parolaĉo". La strangeta mes-tono de lia velura voĉo kanteme, karese emfazis la ritmon. Ĉiam lastverse li triumfridete levis la manon vivigante la Mao-poemon aŭ figurojn de babilonaj kaj egiptaj reverkaĵoj: *Estu skriboscia* ankoraŭ neforgeseble martelas en la oreloj. *Doña Klara* de Heinrich Heine plenvivante vagis tra la ĝarden' vespera (kaj kelkfoje daŭre fantomas) ... Tiel pasis plena horo de aktorado kun forte sentebla engaĝo, ne nur en la temoj kaj la vortoj, sed preskaŭ trance en la lingva muziko kaj ties sorĉaj sonorilfrapoj: la rimoj ...

Kuriero kun Ezopa Saĝo

La duan vesperon Kalocsay alportis du grandajn manuskriptfaskojn. Baudelaire: *La Floroj de l' Malbono* kaj *Ezopa Saĝo*. La unua estis por pluekspedo al Régulo Pérez, Stafeto, Kanariaj Insuloj, la dua kun destino Kopenhago, kie ĝuste dum 1954 ekagis la Eldonejo KOKO, kaj kies gvidanto mi estis. La transdono okazis kun la vortoj:

"Mi tradukis 77 fablojn el Ezopo; mi kredas, ke aperintaj en libro ili farus kelkan ĝojon al niaj infanoj grandaj kaj malgrandaj; vere estas apenaŭ kompreneble, ke Ezopo ĝis nun mankis en Esperanto. — Multmilsalute, milbondezire!"

Kiel konate ambaŭ verkoj sinsekve aperis, gravaj eventoj, ĉar fakte dum 8 jaroj nenio aperis de la Kaloĉaja plumo. EZOPA SAĜO vendiĝis en rapida ritmo, tiel, ke dua eldono necesis (Saarbrücken, 1978), tria en Pekino 1980, — spite al unu harstariga recenzo de la aŭstro Adolf Halbedl en la revuo *Paco* (1956:34-35, Ĉeĥoslovaka eldono, p. 17-18). Tiu apenaŭ traktis la verkon, nur bedaŭris, ke Kalocsay revenis al la Esperanto-movado, ĉar li ĉiam uzis tro la neologismojn! La recenzinto "priplendas la eldonon de tiaj verkaĵoj, firme konvinkita, ke la ĉefa tasko de Esperanto ne estas literaturo."

Direndas, ke la Ezop-manuskripto estis en terura malbone tajpita formo kun tro densaj linioj, neklaraj litertipoj kaj korektaĵoj, kio kaŭzis al la presisto multajn sulketojn kaj grizajn harojn. Domaĝe, ke mankis taŭga tajpisto kaj eĉ taŭga skribmaŝino kaj kolorrubando ĉe nia ĉefa bardo. Ni bezonis 4 plenajn presprovojn, kaj tamen — mirige — post ĉiuj pluaj mistraktoj flanke de eldonisto kaj kompostistoj la plene nedeĉifrebla manuskripto estis aŭkciita de la eldonejo KOKO profite al plua eldona-agado!

Sed ankaŭ direndas, ke dum la longa teknika kunlaboro Kalocsay montriĝis ege pacienca, preskaŭ aminda. Bonfide li rezignis pri lego de la presprovoj. Tolereme li rilatadis al ĉiaj ŝanĝoj (ekz. forlaso de l' balasta majusklo-komenco de ĉiu linio). Neniam plej eta kririko aŭ

malapropa vorto. Male. Li tuj akklamis la altnivelecon de la 29 ilustraĵoj de Břrge Hamberg, kaj krom bezonataj ĉapitroj kun Rimarkoj, Notoj kaj Glosaro, tre zorge ellaboritaj, Kalocsay aldonis rimarkindan enkondukon sur 15 paĝoj en facilfluaj, senrimaj versoj. Kiel 24-karata miniatura disertacio tiu verketo meritis apartan publikigon. Por nur citi:

*Ezopo! Ĉu li estis, aŭ ne estis?
Oni rakontas ... oni ... svaga oni ...
Li, tamen, eĉ se li ne vivis, vivas.
Se Hellas lin ne naskis, ĝi lin kreis.
Oni rakontas, ke li, Friga sklavo,
estis platnaza, nanstatura, lama,
ŝvelventra knabo, kaj krom tio, muta.*

La sola honorari-peto konsistis en *unu* ekzemplero. Ĝin ricevinta K. K. skribis "*Ree mi dankas vin por via granda komplezo kaj multa laboro por tiu libro.*" Kaj li aldonis jenan dediĉon, kiu kredeble neniam aperis:

*Kara Thorsen, kiu paŝtis mian bestkolekton Ezopan,
ĉiuj bestoj prizorgitaj dankas vin kun granda salut'!
Beu ŝafo, bleku bovo, boju hundo, hurlu leono,
sin enmiksi la azeno entuziasme per ia!
Kaj mi mem, la orkestestro (primus inter pares), *** omaĝas
al vi per unua mia originala distiĥon!
Kaj se en daktiloj puraj vi la pulson elenan ĝuas,
sentu, ke en ili saltas mia danke batanta kor'.*

La metodo Kaloĉaja

La aludita versformo *distiĥono*, aŭ laŭ PIV distiko, rilatas al letera diskuto pri ruza modifeblo de la klasika heksametro, kiu ja efikas tre longlinia. Antaŭ ol definitive praktiki sian modifitan metrikon, multe pli taŭgan por Esperanto, i.a. ĉar enkondukante tre plaĉan cezuron (= paŭzon), Kalocsay prezentis provstrofojn al plurlandaj poeto-kolegoj kaj serioze traktis ĉian kritikon kaj proponon.**** La 3-an de aprilo 1956 li skribis:

"Mi ĝojas, ke vi trovas kontentiga la artan efekton de mia heksametro-surogato. Vi estas la tria aprobanto ĝis nun ... Mi tradukis en tiu skemo preskaŭ mil versojn, kaj post tiom da trejnado mi laboris per ĝi tute senpene."

Tiu sistema diligento, zorgemo kaj toleremo estas pruvebla per pluraj ekzemploj.

Dum 1956 Kalocsay laboris super *Monda Antologio*, sed eĉ se li estis altgrade lingvoscia, li tamen ne estis la suverena poligloto, kiel multaj supozis juĝante lian buntan verkaron tradukitan. Por sia reverkado el multaj lingvoj li apogis sin literaturemaj samideanoj en la koncernaj landoj. Kiam li intencis peri esperantigon ankaŭ de la karakteriza dana balado, li turnis sin al mi. Li evidente sciis, ke ĝuste la antikvaj danaj baladoj konsistigas tre ampleksan trezoron, ne nur kvante sed plie kvalite — inter la plej riĉaj en la mondo.

Verdire jam ekzistis hungara traduko, Attila József, de unu balado, Sinjoro Tidmand, aĝa ĉ. de la 1500-jaro, sed iaj lokaj aludoj kaŭzis enbarasojn. Do, karakterize, Kalocsay petis plenan laŭvortan tradukon el la dana kaj poste skribis:

"Mi tre dankas vin por la alsendo de la Tidmand-balado. Sed mi petas vin, bonvolu min sciigi ankaŭ pri la formo. En la hungara traduko la unua strofo ne havas rimojn. Poste, en ĉiu strofo la unua verso estas ripetita ... ĉu la refreno ripetĝas post ĉiu strofo aŭ nur post la unua kaj la lasta?"

Cetere la fina, artforma versio de la balado aperis en *Norda Prismo* 1/67 kun kaloĉajaj komentoj kaj modesta enkonduko pri nia dan-hungara kunlaboro.

Kiam miavice mi sendis al Kalocsay provon pri mia originala balado *Annika*, bazita sur antikva dramo en Feroa Insularo, li forte interesiĝis kaj uzis plenajn leterpaĝojn por pozitive prijuĝi ties formon farante multajn sagacajn, precizigajn ŝanĝetojn. Li skribis:

"Unue pri via Annika. Ĝi faris al mi fortan impreson: la morna atmosfero, kun la refreno, kaj kun la meza ekkrio "Annika!" estas tre lerta kaj elvokiva. Tio, ke ĉi tiu artospeco, la norda balado, estas nun reprezentata en Esperanto per originala poemo, estas grava gajno por nia literaturo. — Sed ĝuste pro tio, ke mi tiel alte taksas vian sukcesan provon, mi volus ĝin vidi tute perfekta. Tiel ne koleru, se mi faras al vi kelkajn rimarkojn ..." (Kiu deziras studi la finan formon de tiu balado, tiu povas ĝin trovi en *Sen Paraŝuto*, Stafeto 1963).

Tiel Kolomano Kalocsay estis kaj restis atenta, nobla kolego en la arto poetika. Senlace li observadis la evoluon sur nia tutmonda esperanta parnaso (por eksteruloj nekredebla unikaĵo!) instigante kaj kuraĝigante novulojn.

Kun sia supermezura radikaleco rilate al la formo Kalocsay laboris pli frue pri la eldono de la norvega traduko *Brand*, la versigita dramo de Henrik Ibsen. Verkante sian 19-paĝan postparolon, sufiĉe karakterize li havigis al si norvegan originalon, vortaron norvegan/esperantan, plenan germanan tradukon krom disertacioj pri Ibsen en pluraj lingvoj. — Tiel povis okazi, ke sagaca hungaro tra siaj analizoj de norvega verko revelaciis al dano per la internacia lingvo kion fakte celis ties samlingvano Søren Kierkegaard...³⁶⁷

Poul THORSEN

Kjøbenhavn, 1982.

* Estas kurioze, ke la tiel "suspektita" Kalocsay mem en sia artikolo pri Kabe en *Enciklopedio de Esperanto*, 1933/34, skribas: Lia nomo fariĝis la simbolo de apostateco, aŭdante pri "kabeoj", la E-istoj scias, pri kiu temas ... En 1911 li forlasis la movadon, kaj de tiam tute ne okupiĝis plu pri E. La motivoj de tiu decido estas ankoraŭ ne klaraj, verŝajne kontribuis en tio ankaŭ personaj kaŭzoj (malpaciĝo kun Grabowski, Zakrzewski kaj aliaj), sed *aliparte estas memkompreneble, ke lokaj kaŭzoj difinu ies sintenon al tia vasta internacia afero, kia estas Esperanto*".

** Itale: neniuj doloroj (povas esti) pli granda ...

*** Latine: Unua inter egaluloj.

**** Pri tio cetere legu en *Tutmonda Sonoro*, p. 580.

366 Pentristoj, kunlaborantoj de la iama Literatura Mondo kaj Hungara Vivo.

367 Laŭ afabla permeso de s-ro Thorsen, represo el: Literatura Foiro (1982:74, p. 7-10.) kaj P. Thorsen: BABILE KUN MI MEM. Brabrand, 1996. 105 p. (p. 83-87).

Ni estu dankaj, ke Kalocsay vivis

La 5-an de marto 1976 la prezidanto de UEA prelegis pri Kalocsay en la Londona Esperanto Klubo. Jen parto de lia omaĝa parolado.

... Mi konis lin nur malfrue en lia vivo. En 1963, junulo, ekipita per magnetofono kaj impertinenta aplombo, mi vizitis lin en Budapeŝto. Ni parolis pri poezio, Esperanta kaj monda, pri tradukado, pri la Esperanto-movado, la lingvo, la historio. Kun tiu eksterordinara energio, laŭ kiu li estis ĉiam konata, li engaĝis sian tutan personon, sian tutan korpon, en nia konversacio. Dum unu tuta tago, dum la tramoj ruliĝis ekster la fenestro kaj la familio alportis bonvenigojn kaj manĝaĵojn, la sonbendo turniĝis kaj Kalocsay parolis. La moviĝemaj manoj, la fluida vizaĝo — samtempe ironia kaj sincera, la frape kalva kapo, la varioplena voĉo: ĉio kombiniĝis por stimuli kaj iasence humiligi min. Poste li legis sian poezion, kaj la grinca magnetofono faris sian eblon kapti ĝin, kaj apenaŭ sukcesis, redonante hodiaŭ palan proksimaĵon de tiu riĉa kaj vivoplena voĉo. Tárkony venis viziti. Ankaŭ li legis. La magnetofono servile sekvis dum la junulo gapis.

Kalocsay estis unu el tiuj malmultaj homoj ĉe kiuj la mito egalas la realon. Mi sentas min ne nur honorita, ke mi konis ne nur homon sed ankaŭ historian fenomenon, ne nur amikon sed enkarniĝon de la esperantismo en la plej bona, plej nobla senco. Lia spirito ĉiam restos. Ni estu profunde dankaj, ke Kalocsay vivis, kaj semis, kaj iagrade rikoltis...

Laŭ la afabla permeso de s-ro H. Tonkin
represita el Esperanto 1976/42-43.

Kelkaj pensoj pri Kalocsay

La problemo estas, kie komenci? Tiel vasta estas la kampo, sur kiu jam laboris Kalocsay, kaj tiel malmulton oni ĝis nun esploris kritike, ke ia limigo necesas, se oni intencas fari detalan studon. Mi intencas limigi min precipe al la originala poezio kaj nur sugesti kelkajn utilajn kritikajn vojojn esplorindajn estonte.

La kontribuo de Kalocsay baziĝas egale sur lingvo kaj literaturo, kaj unu ne facile izoliĝas de la alia. Kiam li eklernis la lingvon, jam antaŭ la unua Mondmilito, la unua vere grava traduka antologio — "El parnaso de popoloj" — ankoraŭ ne aperis, nek la influa "Sinjoro Tadeo", kaj originala literaturo egalmerita el tiu de naciaj lingvoj simple ne ekzistis. Frontante tiun situacion, Kalocsay tuj komprenis, ke lia unua tasko — kaj eble unusola tasko — estas riĉigi la lingvon:

"Sed mi neniam volis esti bardo,
Kaj se en mia koro estis ardo,
Ĝi estis por la lingvo: mi ĝin volis
Prepari, perfektigi por genio
Post mi venonta."

(Letero al Julio Baghy)

Li trovis sin en pozicio simila al tiu de hungaroj en la 18-a jarcento: literatura talento, kaj lingvo virga, preta por evoluigo. Ĝis kia grado Kalocsay influigis de siaj samlandanoj de tiu epoko: Bessenyei, kiu donis al la hungara firman bazon; Dugonics, kiu prilaboris neologismojn kaj la esprimovon de sia lingvo; Kármán, kiu kreis novan, kosmopolitan stilon; precipe Kazinczy, kies tradukoj kaj ties neologismoj kaŭzis tiom da literatura disputado — tio povus formi interesan studon. La paraleloj estas tiel frapaj, ke la rezulto estus certe interesa.

La fruaj poemoj montras la fortan penon de la verkisto muldi sian lingvon, kaj ili pli similas ekzercojn ol verajn poemojn. Des pli mirige, do, ke ekde la apero de la libreto "Mondo kaj Koro" je 1921, Kalocsay jam ĝuis la reputacion de poeto. Kiel Brüggemann rimarkigis en "Tra la Literaturo", Kalocsay uzis diversajn versformojn (laŭ li) plensukcese. Tio ja montras, ke li estas lerta versfaristo, sed ne necese poeto.

Eĉ en "Streĉita Kordo" relative malofte okazas kunfandiĝo de potencaj ideoj kaj potenca lingvo. Ĉiam oni povas konstati pliboniĝon de tekniko, sed ofte ŝajnas, ke la poeto staras **ekster** la verko, ke li faras poezian ekzercon. Ĉu tiu manko ne estas la rezulto de nesufiĉa polurado; ekzistas abundaj pruvoj pri la malo (vidu la eseon de Vatré en "Arĝenta Duopo"). Oni do **devas** supozi, ke ofte mankas vera inspiro; ke li ne havas multon por diri. Tamen, la reputacio de Kalocsay baziĝas ĉe la ĝenerala publiko sur "Streĉita Kordo". Kia tragedio, ke ĝi ne havas "Izolo" antaŭ si!

"Izolo" montras pli fortajn talenton kaj esprimkapablon. Ĉiuj ĝiaj poemoj atingis la nivelon de la plej bonaj de "Streĉita Kordo", kaj vere malsukcesaj t u t e mankas. Ŝajnas nun, ke Kalocsay ne nur **kapablas** diri ion, sed ja **deziras** diri ion. El la du — kapablo kaj deziro — kreiĝas poeto.

La poemoj de "Izolo" montras tri karakterizojn, kiuj apartigas ilin de la fruaj poemoj; unue, kompleta lingvorego kaj la malapero de tiu sento estetike ruiniga ĉe la leganto — de konstanta strebo flanke de la poeto sin esprimi per esence malamika lingvorimedo; due, pli riĉa lingvo; trie, emocia unueco, kaj la teno de la poemo en la manoj de la poeto ĝis la lasta plejpotenca verso. Legante strofon el "Iras Abiturient", frua poemo, oni vidas simplajn vortojn relative senasociaciajn:

"Senpena sort' kaj plena fort',
Amika rondo varma!
Kortuŝa fid', plenbuŝa rid'
Pri la farso ĉarma."

Se oni komparas tion kun "Sur la Monto Nebo", oni vidas grandajn ŝanĝojn:

"Atendus prete nin la Kanaano,
Sed ni, en lupa lukto por la pano,
Mizere mortas sur la monto Nebo".

Nu, la esenca afero ĉi tie estas ne, ke oni **komprenu** la poemon, sed ke oni **konsciu** ĉiujn ĝiajn signifojn. Unue, kompreneble, "Readmono", kaj la historio de Moseo — kaj ekde la komenco de la soneto aperas bibliaj figuroj:

"La gren' inundas. Riĉon vome ĵetes
Maŝinoj. Fluas kun *miel* kaj mosto
La akvoj. Flugas *por la Pentekosto*
Elektraj langoj. *Paradizo pretas.*"

Ni, la Izraelidoj, atingis la sojlon de Kanaano, sed, pro "blinda kaj malica strebo" ni ne povas vidi, ke la promesita lando nin atendas ...

"Falinta al profundo,
Ni luktas kun sovaĝo
En ega troabundo
Por eta avantaĝo.
Kain-sigel' sur frunto
Por — marko de malsaĝo."

(Cinikaj sonetoj)

Jen la "izolo" de la poeto. Li povas vidi la sorton de la homaro, sed ne povas savi ĝin.

Sed ĉu "Sur la Monto Nebo" estas tute sen espero? Ĉu eble la generacio de Kalocsay ankaŭ estas sia propra Moseo:

"Surtere ni aspiras
Edenon, kaj aranĝi
Ni scius ..."

(Cinikaj sonetoj)

Moseo, la servanto de Dio, gvidis sian popolon al Kanaano, sed ne rajtis mem eniri. Eble la venonta generacio...

Sed nun ne estas tempo difini la filozofion de Kalocsay. Por fari tion necesus studo precipe de "Ebria Ekvatoro", de "Ahasvero de Amo" kaj de "Izolo". Kalocsay estas samtempe elitulo kaj humanisto, ne voĉo (parto) de popolo, sed poeto parolanta **al** popolo.

Mi menciis, ke la poemoj de "Izolo" estas lingve pli riĉaj. Estas unu afero utiligi la lingvon por fari versojn, kaj tute alia manipuli ĝin poezie. Kiam "Izolo" pretis, Kalocsay estis jam preskaŭ 50-jara. Jam en 1936 li diris: "Ne forgesu, ke mi havas malantaŭ mi 36000 versojn de tradukita poezio." Kompreneble, tiu poezio donis al li ne nur teknikan sperton, sed ankaŭ vastan trezorejon de utilaj ideoj. En "Streĉita Kordo" ŝajnas, ke ĉi tiuj ideoj estas ofte simple transprenitaj (subkonscie) sen signifaj ŝanĝoj. Ekzemple la influo de Baudelaire estas klare videbla, precipe en "Ahasvero de Amo", kaj ŝajne "Ebria Ekvatoro" kaj la aliaj liberversaĵoj multon ŝuldas al Nietzsche.

Sed nun en "Izolo", kaj supozeble en "Tra la Ŝtormo" (kies manuskripton mi ankoraŭ ne vidis), Kalocsay jam plene ensorbis la ideojn el la verkoj de li tradukitaj, kaj ili adaptiĝis por esprimi liajn proprajn emociojn kaj pensojn. Ĉi tiu estas ĉiama procedo de la literaturo:

"La tradukoj kvazaŭ perforte trudas al la lingvo konstantan penon, esprimi la ĝis tiam neesprimeblan. Kvazaŭ transfluigata sango en anemiulon, fluas per ili en ĝin novaj esprimformoj, novaj nuancoj, novaj asociacioj. Originalaj poetoj kantas kaj iliaj versoj stampas vortojn per neeviteble reaperantaj memoroj."

(Lingvo, Stilo, Formo)

Rigardante malfruan poemon — "Somernokto", ekzemple (laŭ mi la plej perfekta Kalocsay-a liriko) — oni povas vidi la plenan rezulton de ti ĉiu ensorbiĝo.

"Somernokto" estas la propra inspiro de la poeta menso. Ĝi estas ampoemo — kaj por Kalocsay la amo estas la sola rifuĝo de la ordinara vivo ("En nia griza tago lumas/M i n u t o j ruĝliteraj"). Ĝia efekto rezultas el la kreo de atmosfero — la uzado de mistikaj religiaj metaforoj, de listo da floroj, de elvokaj figuroj. Per sia amo, la geamantoj ne fariĝas la centro de la universo, sed kreas por si sian propran universon. La ekstera mondo daŭrigas sian ordinaran vivon:

"Inter la herboj la lampiroj
diskrete, sole por si, lumas."

sed samtempe ludas frandan rolon en la aminterŝanĝo de la paro:

"La nokt' incensas nin per mento,
rezedo, malvo kaj narciso."

La fina klimakso reprezentas ne la adaptiĝon de la konkreta mondo al la mondo de la geamantoj, sed grandegan harmonion inter la du:

"Kiel grandega strasa tulo
nin kovras la ĉiela arko,
kaj lante kun ni la insulo
Eknaĝas kiel nupta barko."

Ni memoras "Ekstaze":

"mi kune kliniĝas kun arboj en vento
frapetas kun pluvogutoj en polvo
kuregas kun sovaĝcikorio ridegas kun rozo vipera
sur kampoj —
kun sireno mi veas en matenoj nebulgravedaj."

Jen la kulmino de la poeta vizio.

Sed kiu konas "Izolo" aŭ "Tra la Ŝtormo"? Kiu, inter la juna generacio vere konas "Streĉita Kordo"? La Esperanta literaturo estas juna, kaj literaturo bezonas tradicion. Estas nia devo konservi kaj varti tiun tradicion, kiun ni jam havas. Mi jam citis el "Lingvo, Stilo, Formo" — "iliaj versoj stampas vortojn per neeviteble reaperantaj memoroj..." — sed tiuj memoroj fakte fariĝos memoroj nur, se oni legas la poemojn. La solaj personoj, kiuj bone konas la originalajn verkojn de Kalocsay, estas la poetoj mem. De la ordinara publiko ĝi estas nehavebla. Kaj se la poetoj utiligas tiujn "reaperintajn memorojn", nur la poetoj ilin komprenos. Rezulte, ekzistas danĝero, ke kreiĝos literatura elito, ke la literaturo perdos kontakton kun la publiko. Ne temas pri relativa "malfacileco": oni ne povas verki bonajn poemojn por duoninteligentuloj. Sed nur, se oni donas la krudan **scian** materialon al la

publiko, oni rajtas atendi la ĝustan efikon. Ekzemple, se oni neniam legis la verkojn de Miĥalski, kiel kompreni la aludojn al "Ajno" en "La Infana Raso"?

Nuntempe, preskaŭ mankas utila kritikado krom inter la poetoj mem. Sed la rolo de la neverkista kritikisto estas en iu ajn literaturo tre grava — precipe kiel kontaktilo kun la publiko. Por eviti la vere gravan danĝeron de aparta literatura elito, kaj por montri finfine al la publiko la staturon de nia poeto Kálmán Kalocsay, ni absolute bezonas represon de liaj ĉefaj poemoj. Tio estu nia donaco al li je ĉi tiu festa tempo. Ni memoru liajn proprajn vortojn...

"Poeto sen popolo ho animprema scio,
Ke surdas la oreloj por ĉiu mia voko...
Forsonas senresone la plora melodio,
Kiel ŝirita kordo en forlasita loko."

Humphrey TONKIN

(Laŭ la afabla permeso de Prof. Tonkin

repr. el: NLR Sepa jaro:38, p. 58-63.)

Mozaikoj pri Kolomano Kalocsay

En la printempo 1934, Vilmos Bleier, kiu jam dungis du oficistojn kaj bezonis trian, min venigis al Budapeŝto por labori ĉe la eldonejo de *Literatura Mondo*. Tiu grava eldonejo okupis, en lia triĉambra hejmo, spacon de entute ses kvadrataj metroj kune kun la ĝisplafonaj libro-staploj. Tie laboris kutime kvar personoj kaj kelkfoje eĉ pli...

Kalocsay, kiel ĉefredaktoro de la revuo kaj lingva kontrolanto de ĉiuj aperontaj libroj, venis regule al Bleier por pridiskuti kurantajn aferojn, kaj plej ofte dum la preparado de la duvoluma ENCIKLOPEDIA de ESPERANTO. Kio min eble plej frapis ĉe Kalocsay estis lia admirinda simpla kaj profunda modesto karakterizaj de *vere* granda homo, kapabla meti amon en la plej etajn aferojn.³⁶⁸

*

Al la nomo de Kalocsay estas tiel ĝenerale ligita la demando pri la neologismoj, ke la plej granda parto de la publiko tute ne konjektas pri lia vera personeco. Oni volonte lin imagas ĉiam febre okupata en la fabrikado de novaj vortoj. La fumo de la batalo, kiun kun subite profeta konvinko kelkaj kritikistoj direktis kontraŭ lia vortokrea agado, momente kaŝis lian figuron, kaj la bruoj de l' anatemoj preskaŭ kovris lian voĉon. Do ni ne miru, ke multaj samideanoj, kiuj eĉ neniam malfermis libron de Kalocsay, jam eldiris pri li definitivan verdikton.

Por mi, la legado de STREĈITA KORDO kaj ETERNA BUKEDO prenis la karakteron de la profunda malkovro kaj de kulmina revelacio. Kompreneble, kiel ĉiu versamanto, mi iam eksentis la deziron persone konatiĝi kun la amata poeto. Lin oni ja ne bezonas prezenti, sed mi tamen notos la impresojn de tiu unua kontaktiĝo.

Li lasas la impreson de delikata voluptulo vibranta kun ĉio ĝuodona; de artisto, kiu plene perceptas la liniojn, la sonojn, la potencajn ritmojn, la pulson de l' propraj emocioj kaj kreas la belon; de spirito pozitiva, konscia pri la materio kaj la realeco, kun supera inteligento je la servo de l' koro kaj de l' volo; de animo plena de impulsoj kaj entuziasmoj, por kiu la vivo estas riĉa kaj ĝiaj ebloj senfinaj; de viro suferstampita, tenera, milda kaj ofte trista sub la demonia rido kaj vigla ironio; unuvorte, de homo, por kiu "nenio homa estas fremda".

Kion celas lia artismo? La arton por la ĝojo krei, elĉerpi la emocijn kaj ĝin konkretigi. Senti el si flui la vivon kaj ĝin ŝpruci en kantojn kaj bildojn por la ĝojo de tiuj, kiuj pensas kaj sentas, por la admiro de tiuj, kiuj amas kaj suferas, jen la kriterio de tiu arto nuancita kaj subtila.

Kiu ne vidis Kalocsay ĉe la skribotablo, tiu povas apenaŭ imagi lian gigantan laboron, lian senripozan aktivecon, lian kompletan sindonon al nia movado. En lia mano la lingvo fariĝis ne nur ĉiopova esprimilo, sed mondampleksa agrimedo. Per sia altnivela verkaro Kalocsay donis la plenan mezuron de sia genio.

Sed ne sole pro la verkista majstreco li estas kaj estos ĉiam pli granda figuro de nia literaturo. Per sia senlaca kaj fervora vartado al ĉiu burĝonanta talento, Kalocsay sin montras ankaŭ la plej eminenta edukisto de l' nova generacio.³⁶⁹

*

Inter la fruaj admirantoj de Kalocsay staris la poetoj. Sur la stupo malpli alta, sed ne malpli fervore, lin admiris homoj el la popolo, tuj konsciaj pri lia grandeco, kvankam al ili mankis kapablo kaj okazo tion esprimi efike. Aliaj pli kleraj homoj ne komprenis la urĝecon de lia grandioza entrepreno kaj provis vanan reziston kontraŭ la nova skolo. Miopa rigardo al la spuro de la tradicio malhelpis vidi la torĉon iom blindigan, kiu prilumis novajn perspektivojn.

Nun D-ro Kalocsay estas ĉie rekonata valoro. Sian batalon li venke elskermis. La nova generacio lin agnoskas ne sole granda poeto, sed ankaŭ granda humanisto. Pli kompleta, pli pura estas hodiaŭ nia ĝojo, se la konscienco ne riproĉus nian timemon, nian avaron tra la jaroj en la konkreta monstro de nia simpatio; el tio pliiĝas ankoraŭ nia ŝuldo.

Ni havas poeton, kiun ni ne sciis meriti. Kaj ni esprimas malmulte, se ni konfesas, ke en la drama nuntempo, li helpas al ni pli kuraĝe elteni kontraŭ la terura subpremo de la mondo, kiun la homoj mem al si preparis.³⁷⁰

Henri VATRÉ

Le Lignon, Svislando.

368. En: Du jarojn ĉe Literatura Mondo. IF 3. 1991:3, p. 84, 86.

369. En: Kion mi lernis de Kalocsay? AD p. 110-112.

370. En: Kolomano Kalocsay kaj ni. NLR sesa jaro. 1961:36, p. 221-222.

Vizito al Kalocsay

La 29-an de julio (1970) mi vizitis ĉe Kalocsay. Li akceptis min tre afable, sed kompreneble li parolis pli ol mi. Li havas ne tre bonan sanstaton kaj pasis la periodon de sia plej granda kreativeco, sed estas ankoraŭ vigla kaj aktiva. Nun li laboras super Esperanta frazeologio, kiun li transdonis al mi por kontrolo pri komprenebleco por Nederlandanoj.

Ni parolis ĉefe pri literaturo kaj lingvistiko. Li konfirmis la teorion de s-rino Burgler, ke la hungara lingvo estas kelkrilate strukture tre simila al Esperanto, i.a. en la regula uzado de la akuzativo kaj aspektindikaj afiksoj, ke tial la hungaroj havas pri naturan senton pri la stilaj ebloj de Esperanto, ekz. de la inversio danke al la akuzativo, kaj tial havas tiom da grandaj Esperantaj literaturistoj. Al la rimarkoj de Edwin de Kock li respondis, ke ĝuste per la tradukado li tiom enmergiĝis en la sfero de majstroverkoj de la monda literaturo, kiom neniel alie estus eble.

D-ro W. A. VERLOREN van THEMAAT

(Laŭ la permeso de s-ro Verloren van Themaat
repr. el Komuna Esperanto-Gazeto 1970:10, p. 127.)

Rememoroj

Post la finiĝo de la jubilea Universala Kongreso en Varsovio (1937) la esperantistoj en Brno vivis en ĝoja kaj streĉa atentado pro la alvenontaj ŝatataj gastoj el Budapeŝto, kaj inter ili al ni la plej karaj: Dro Kolomano Kalocsay kun sia stiftilino, Julio Baghy, Ludoviko Totsche. Tiuj gastoj venis viziti al ni kun tutvespera artisma, literatura programo.

Por tiu solena vespero estis luita la tuta etaĝo de la tiama plej granda kaj luksa kafejo en Brno, *Kafejo Passage*. Memkompreneble estis avizitaj esperantistoj ne nur en Brno, sed ankaŭ el la vasta cirkaŭaĵo. En la difinita tago aro de gesamideanoj bonvenigis la gastojn ĉe la stacidomo. Sincere oni bedaŭris ke Julio Baghy devis lastmomente ŝanĝi la planon kaj veturis el Varsovio rekte hejmen, same la filino de Dro Kalocsay.

Tre solena, tamen en intime amika etoso okazis la *Arta Vespero*. Vilmos Bleier, eldonisto de *Literatura Mondo*, enkondukis la programerojn verve kaj elokvente. El la riĉa programo restis nur la memoro kun la perfekta arto, parkere prezentitaj poemoj kaj brila, gaja rakonto de Raymond Schwartz, kies komikajn figurojn prezentis en nesuperebla maniero Dro Kalocsay. L. Totsche rakontis — deklamis kvazaŭ himnan alegoron de Ferenc Móra: "Kontraŭ la Aŭroron". La prezentadon parte disaŭdigis la Radio Brno.

La *Vespero*fariĝis neforgesebla por la partoprenantoj, kiuj ĉiam fieros pri la renkontiĝo kun la plej grandaj poetoj de nia movado.

Mi havis la neordinaran honoron gastigi dum la sekvintaj kvar tagoj Dron K. Kalocsay kaj L. Totsche en mia hejmo. Kiaj ĝojaj kaj edifaj tagoj! Longajn horojn ni pasigis en gaja kaj amika rondo interparolante pri la Esperanta literaturo, gazetaro kaj ĝenerale pri la esperantista vivo kaj ĝiaj multaj aspektoj. Profunde impresis la afableco, delikateco kaj amikeco de Kolomano Kalocsay.

Ankoraŭ mi rememoras ĝojigan kaj ankaŭ edifan renkontiĝon kun tiu eminentulo.

En majo 1974 entreprenis 16-membra grupo de nia klubo (Esperantista Klubo de Brno) kvartagan ekskurson al Budapeŝto kaj Balatono. La duan postagmezon mi apartiĝis de nia grupo kaj helpe de afabla samideano Roza (nur ŝian antaŭnomon mi rememoras), mi anonciĝis ĉe Kalocsay kaj jam post duonhoru estis kore kaj afable akceptita. Ĝojigis min lia bona aspekto, movigeco kaj entuta elano (antaŭ jaroj ja li estis grave malsana). Post reciprokaj rememoroj kaj interŝanĝo de novaĵoj, li parolis pri lingvo kaj gramatiko ĝenerale. Li citis plurajn ekzemplojn, kiel en diversaj lingvoj (en la hungara kaj same en la ĉeĥa), elementoj kontraŭ logiko akceptiĝas kaj bone, nature servas, dume raciaj elementoj, fakte ĝustaj, estas pretervidataj.

Dum la interparolo mi admiris lian kolosan memoron en la plej etaj detaloj. Post duhora vizito ni kore adiaŭis, kaj hejme en nia klubo mi povis raporti pri la admirindia spirita freŝeco kaj energio de la genia homo, kara valoro al la tuta esperantistaro.

Josef VONDROUŠEK

Brno, 1978.

"Falis la gracia branĉo de l' violo..."

Antaŭ 36 jaroj...

Por la loko de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto en 1966 estis elektita la hungara ĉefurbo Budapeŝto. Prepare al la kongreso oni aranĝis specialan Esperanto-kurson por ĵurnalistoj, kiun mi diligente vizitis. Tuj kaptis mian atenton la logiko de la lingvo, ĝiaj vortoj al mi konataj el la latina kaj germana lingvoj. Tamen mi estis tute ravita, kaj nedisigeble ligita al Esperanto, kiam aŭdis ĝian sonan belecon parolata en alta nivelo la tiama prezidanto de UEA, Ivo Lapenna. Antaŭ la kongreso li vizitis Budapeŝton kaj prelegis, eĉ oratoris antaŭ grandnombra publiko.

Revenante al la kurso. Nia kursgvidantino Emilia Radvánszky konsilis parkere lerni almenaŭ unu versaĵon, ĉar la poemrecito tiutempe estis postulata en la ekzameno. El la poemoj de mia lernolibro (J. Baghy: ESPERANTO) pleje plaĉis al mi tradukita poemo de Sándor Petőfi: *Fine de Septembro*. Tamen, mi parkerigis alian — por komencanto pli konvenan pecon, mallongan hungaran kanton tradukitan de iu K. Kalocsay. En la ekzameno mi perfekte recitis:

Falis la gracia
Branĉo de l' violo.
Kor' malĝoja mia
Estas sen konsolo.
Muĝas vento veokria
Ho, adiaŭ, kara mia!³⁷¹

Kompreneble en kelkmonataj kursoj oni povas akiri nur magrajn informojn pri la Esperanto-movado kaj literaturo. Kelkfoje mi aŭdis respektplene menciadi la nomon de Kalocsay, pri kiu mi sciis preskaŭ nenion. Unuafoje mi vidis lin sur la kongresa podio. Tiam mi eĉ ne konjektis, ke Kalocsay kaj la apude sidanta alia oldulo (G. Waringhien) estas fenomenoj de la Esperanta kulturo.

Mia unua persona renkontiĝo kun Kalocsay

Por firmigi nian lingvoscion, mi ekkolektis ĉ. 500 parolturnojn. Amiko Ludoviko Kökény proponis montri al Kalocsay mian frazeologian kolekton kaj la *Literaturan Terminaron* kompilitan kiel ekzamen-kandidato. (Tiam mi ne konis la verkojn LINGVO, STILO FORMO, nek PARNASA GVIDLIBRO). Do en la poŝo de la E-diplomo "A" kaj kun granda memfido la 3-an de aŭgusto 1968 mi vizitis ĉe Kalocsay en la strato Nyúl (kuniklo) n-ro 4. Tiu malnova burĝa domo ankoraŭ portis la kuglovundojn mondmilitajn kaj la revoluciajn en 1956.

En la hejmo de Kalocsay (dua etaĝo n-ro 7) dikaj traboj retenis la plafonojn de kolapso. En lia laborĉambro libroj kuŝis dise sur la planko, apud la forno, sub divano, sur seĝoj. Malnovaj jarkolektoj ŝnurligitaj kovriĝis de polvo en la anguloj. Kia deprima kaoso — mi pensis. (Poste, mi komprenis, ke ekzistas du specoj de laborĉambroj: en la unua regas perfekta ordo, en la dua malordo: en ĉi tiu oni senĉese laboras). Mi ekvidis iom morozan oldulon sidantan apud la skribotablo inter papermontoj. Ĉu li estas tiu grandulo, pri kiu oni parolas en superlativo?

Li bonvenigis min ĝentile. Liaj penetraj okuloj brilis akre, kaj — kiel ofte la bluaj — pli fride ol karese.³⁷² Li rimarkigis, ke li konas min laŭnome el *Hungara Esperantisto* kaj legis mian librokonigon pri VESPERKANTO, kiun li redaktis. Li ĵetis supraĵan rigardon sur la transdonitajn foliojn de mia frazeologia kolekto kaj ŝovis ĝin al la papermontoj. Ŝajnis, ke mi estas por li indiferenta persono.

Kiam en akompano de Ludoviko Kökény mi alvenis al Kalocsay, ĉeestis jam Lajos Tárkony kaj Paŭlo Balkányi. En la konversacio temis pri movadaj aferoj, kaj ankaŭ iom pri gramatikaj demandoj. Mi tuj konstatis, ke la "konversacio" vere estis monologo de Kalocsay. La ĉeestantoj nur jese balancis la kapon. Mi eĉ nun hontas ke dum tiu unua vizito mi kondukis malmodeste, ofte kontraŭdiris al li kaj arogis diskuti eĉ pri gramatiko. Ho mi stultulo! Tiam mi ne konjektis ke Kolomano Kalocsay estas la "vivanta klasikulo de la Esperanto-kulturo".

Kiel reagis Kalocsay?

Post iom da surpriziĝo fakte, li ĝojis klarigi al sensciulo diskutatajn temojn kiel la demando pri -ata/-ita, vortfarado ktp. Jes ja: liaj maloftaj vizitantoj pro la granda respekto ĝenerale ne estis parolemaj, ĉefe ne diskutemaj.

Harmonia kunlaboro

Pasis kelkaj semajnoj. Amiko Kökény alportis mesaĝon: Kalocsay opinias ke frazeologia kompilaĵo kiel la mia helpas interpreti parolturnojn de la propra lingvo. Li atendas min la sekvan sabaton posttagmeze.

En tiu tempo Kalocsay ne havis "urĝan laboron". Jam mildiĝis la polemiko pri la uzado de la pasivaj participoj. Li apenaŭ partoprenis en la diskuto. Certe li tiris la konkludon, ke el atistoj fari itistojn estas preskaŭ neeble. En 1968 estis pretaj la tradukitaj Shakespearaj-verkoj: SOMERMEZKOKTA SONGŔO kaj LA TEMPESTO. Verŝajne ankaŭ pro la "libera tempo" li proponis komune daŭrigi la kolektadon.

Kalocsay kun plena elano sin ĵetis al la plukonstruo de DOMFABRIKO. La kerno de la kolektaĵo estis la zamenhofa PROVERBARO ESPERANTA, kies esprimojn mi parigis kun la hungaraj ekvivalentoj. Se mankis adekvataj esprimoj mi tajloris al ili veston konvenan al la hungara pensmaniero. La gramatikajn variantojn prilaboris Kalocsay, krome li kolektis parolfigurojn el la Esperanta literaturo. Lia poezia kreado esprimiĝas ankaŭ en multaj parolturnaj. Ankaŭ mia tasko estis listigi la esprimojn antaŭe surslipigitajn. Tio ebligis, ke mi ellasu specialajn hungarajn diraĵojn (certe ne kompreneblajn por alilingvanoj) kolektitajn kaj surslipigitajn de Kalocsay. (Li ne rimarkis, ke mankas paneloj). Konsente kun Kalocsay ni ellasis parolturnojn, inter ili la esprimon: "Diri ion zanze". La vorto "zanzo" estas la origino indiana. Temas pri ŝrumpigita kapo de la mortigita malamiko. Je nia granda miro kaj bedaŭro neniu el niaj kontrolantoj eksterlandanoj komprenis tion, do la zanzaĵojn ni forstrekis el la kolekto.

La "sabataj gastoj"

Nia intima amika rondo formiĝis dum la laborado de DOMFABRIKO.

En nia societo la plej malnova amiko (aŭ satelito) de Kalocsay estis Lajos Tárkony, vera edukato de la *Budapeŝta Skolo*.

Li estis kvazaŭ familiano. Iom da tempo li trovis azilon en la hejmo de Kalocsay, ĉar dum la dua mondmilito lia loĝejo kune kun ĉiuj havaĵoj tute neniĝis. Inter la ĉiusabataj gastoj la plej modesta kaj silentema estis Lajor (laŭ la propono de Kalocsay ni nomis lin tiel, ĉar en la amika rondo estis ankaŭ alia Lajos — Kőkény). Kalocsay ŝerce nomis lin "olda kapon". Por konsoli la karan Lajor mi nomis lin laŭ la ĉarma fabel-titolo "Tündér Lala" (t. e. Lala la feo), kaj mi fabrikis versojn por lia naskiĝtago:

La grizan kapon, kara Lali Blond
Dece girlandas al vi laŭra frond'.

Kelkfoje li fariĝis parolema, tiam kun brilantaj okuloj li rakontis pri ĵus legita romano, aŭ vidita filmo, aŭ pri siaj aventuroj en la oficejo, inter junaj kaj maljunaj knabinoj lin ĉirkaŭantaj kun malespera afableco. Tie li kolektis ankaŭ anekdotojn (sed pri tiuj mi prefere silentas). Lia milda voĉo fariĝis akra, kiam lin indignis diversaj okazaĵoj. En la verkista agado Lajor apogis sin al Kalocsay, plej ofte li petis konsilojn en poeziaj problemoj. (Bedaŭrinde post la forpaso de Kalocsy li demetis la krajonon).

Malnova amiko, pli ĝuste "adoranto" de Kalocsay estis Lajos Kőkény, tiama ĉefredaktoro de *Hungara Vivo*, kaj kunlaboranta redaktoro de *Hungara Esperantisto*. Malgraŭ sia aĝo (li naskiĝis en 1897) li vigle agadis en la Esperanto-movado. Ĝenerale ankaŭ li estis silentema kaj volonte aŭskultis ĉion, kion la ceteraj ĉeestantoj parolis. Tamen, foje-foje li ekflamiĝis, ruĝvizaĝe kun forta voĉo li parolis, se temis pri io ne justa aŭ neĝusta afero en la Esperanta movado aŭ en la politiko. Feliĉe lia flamo baldaŭ forflagris.

Kion diri pri la kara Mérike, la dua edzino de Lajos Kőkény? Ĉarma grizharulino, kiu gardis multon el sia iama beleco. Ŝi ĝenerale sidis modeste flanken kaj ekparolis nur se temis pri ia "klačo" aŭ pri ia skandaletto en la movado. Ĝenerale ni konversaciis hungare.

Mi estis la kvara kortegano de Kalocsay. Baldaŭ mi sentis min hejmece, ĉar ne nur Kalocsay, sed iom poste ankaŭ lia edzino Margit kaj la duonfilino Mária (karesnome: Maki, t. e. simio) ekŝatis min. Ĝenerale ili ne favoris Esperanton kaj esperantistojn, ĉar laŭ ili Kálmán malŝparas la tempon por malutila hobia anstataŭ verkado de medicinaj fakartikoloj, kiuj alportus financan utilon. Ilia malafabla konduto kontraŭ la sabataj gastoj ŝanĝiĝis favore, kiam ili spertis, ke Kalocsay en tiu tempo estis malpli grumblema eĉ bonhumora. Probable kaj feliĉe en tiu tempo li bonfartis malgraŭ lia grava reno-malsano. Foje ni faris eĉ kelkajn gimnastikojn de jogo. Mi klopodis, ke tiuj posttagmezoj estu gajaj. Se okaze mi ne povis partopreni en la sabata kunveno, Kalocsay vokis min pertelefone kaj nomis min "Malfidela hundo". Cetere li karesnomis min "Aranybogár" (Orskarabo). Laŭ lia deziro la sabataj gastoj vizitis lin en Pünkösdfürdő (antaŭurbo de Budapeŝto) kiam li somerumis en la somerdomo de lia stifilino. "Ada venu, kiam ŝi povas ankaŭ eĉ dimanĉe" — diris li foje. Li ofte amuzis nin: deklamis, kantis, kelkfoje prezentis la plej novajn Budapeŝtajn ĵargonajn, tiel disvastiĝintajn, ke ilin uzas ne nur gejunuloj, sed kiel li diris "ankaŭ la Vater kaj la Mutter" kaj ŝerce nomis nin "konservativuloj". Ho, tiuj gajaj horoj... Per aktora lerteco li imitis ironie kelkajn strangajn figurojn de la movado. Volonte li faris ŝercon. Foje okazis ke iun sabaton estis invititaj al li kelkaj kunlaborantoj de *Hungara Vivo*. Mi alvenis iom malfruiĝante. Kalocsay ekstaris kaj etendis la manon: "Mi estas Kálmán Kalocsay". "Mi estas Ada Csiszár" — mi diris. Tiam unu, malpli informita kolego volis min rekomendi al Kalocsay: "Samideano Csiszár laboras super kunmeto de hungara-Esperanta frazeologio, kaj..." Li longe konigis miajn "meritojn". Kalocsay ŝajniĝante interesiĝon ne interrompis la parolanton. Mia "protektanto" ne komprenis, kial ridetas la ĉeestantoj. Pleje ĝuis la situacion Kalocsay.

Por li ne estis temo bagatela. Krom la literaturo kaj medicino li komprenis al multaj sciencoj. Ekzemple en la hungara lingvo li montriĝis vera scienculo. Kuraĝe oni povas aserti, ke la plimulto de la samfakaj mezlernejaj pedagogoj ne komprenis sian fakon tiel profunde kiel Kalocsay. Ĉu la atomproblemo? Ĉu la kolektiva mastrumado? Ĉu la kalkul tekniko? Ĉu la problemoj kaj praktiko de la socialismo? Kalocsay montriĝis ĉie fakulo. Kaj li ĝojis se ni interdemandis. Li aŭskultis pacience eĉ vortlavangojn, kaj poste li diris klare kaj koncize sian opinion pri la temo. En nia amika rondo neniam okazis tia ĝena situacio, ke la ĉeestantoj samtempe ĉesas paroli kaj subite fariĝas embarasa silento. Ĉiokaze diras la zamenhofa proverbo: *Traflugis anĝelo preter la orelo*. La tri-kvar horoj pasigitajn ĉe Kalocsay plej ofte pruviĝis malmultaj. Post la adiaŭo ni babiladis longe en la antaŭĉambro.

Krom la sabataj gastoj Kalocsay havis ankaŭ aliajn vizitantojn. Funkciuloj de la movado regule vizitis kaj informis lin pri la aferoj. Malgraŭ sia "retiriĝo" Kalocsay neniam disiĝis de la movado. Se hazarde en sabata posttagmezo alvenis iu vizitanto (L.Győry-Nagy, A. Pechán, P. Balkányi, Bercei, Mátéffy, ktp) la etoso fariĝis malpli intima.

Mi vizitis ĉe Kalocsay ne nur sabate por preparoli la intertempe kolektitajn panelojn, kaj ni konsideris alvenintajn rimarkojn pri la internacia komprenebleco de la esprimoj kolektitaj de Kalocsay el la Esperanta literaturo. Plej ofte mi trovis lin sidante apud la skribmaŝino. Ho kia kaduka estis tiu Olympia: unu el la klavoj estis fiksita per plastro. Li tajpis la ĉapelitajn literojn per citilo. Feliĉe la "invalida" tajpilo, ĉifona rubando, tro eluzita karbonpapero — kvankam malfaciligis — tamen ne baris la kreadon. Kiajn belajn versojn, profundajn pensojn surpaperigis kune la du olduloj. Granda damaĝo, ke en Hungario tiutempe mankis la nuna furora komputil- kaj kopitekniko.

Tri lecionoj

Je la propono de d-ro József Mátéffy, tiama prezidanto de HEA, unu el la kontrolantoj de DOMFABRIKO, mi konsentis fari ŝtatan ekzamenon pri Esperanto. Kalocsay afable entreprenis mian instruadon kaj por la unua lernohoro li pretigis tabelon de la E-konjugacio. Tiam venis la ideo pri kunmeto de legolibro, kiu per prilaboritaj temoj helpus la ekzamen-kandidatojn. Mi kunmetis provizoran sinoptikon de la planita broŝuro: NE TIMU DE EKZAMENO! Pro la forpaso de Kalocsay nur kelkaj eroj (Vetero; Sano; Poŝto, ktp) gardas la memoron de nia plano. Revenante al la ŝtata ekzameno. Dum la instruhoroj tre enuis Mérike, ŝi apenaŭ sciis Esperanton, kaj ofte oscedis ankaŭ la du Lajos. La sabataj kunvenoj ne estis tiel gajaj ol antaŭe. La lecionoj lacigis ne nur min, sed probable ankaŭ la instruanton, ĉar post tri instruhoroj li ekspikis: "Se vi ne volas instrui Esperanton (mi volis neniam) estos superflua en via poŝto la diplomo. En Hungara Vivo kaj Hungara Esperantisto vi lerte artikolas, do faru ĝin plu diligente, ĉar se iam el miaj manoj defalos la skribmaŝino, vi devos ĉe HV daŭrigi la redaktadon". Kompreneble Kalocsay tro taksis miajn kapablojn, tamen mi konsentis lian opinion kaj rezignis pri la ŝtata ekzameno, kion mi ne bedaŭras.

"Zeŭso sur la placo Zsigmond..."

Tiun diris ŝerce Tárkony, kiam en lia akompano unuafoje vizitis ĉe mi Kalocsay. (Feliĉe amiko Kökény notis la daton: 1970.08.16. Dimanĉe). Mi ne konsciis pri ĉi tiu granda honorigo, ĉar tiutempe mi ne estis lia admiranto: komence pro mia sencio, poste pro la intimaj amikaj interrilatoj. Cetere ekde jaroj Kalocsay vizitis neniun kaj apenaŭ forlasis sian hejmon. En tiuj jaroj amikiĝis ankaŭ niaj familianoj. Kelkfoje ankaŭ Margit estis mia gasto, kaj mi vespermanĝis ĉe ilia tablo kune kun mia karmemora edzo Gyula Csiszár.

Foje mi kolerigis lin

Temas pri tio, ke li volis solvi ĝis nun ne kontentige solvitan problemon, kiel esprimi en Esperanto la nomon de edzinoj. El diversaj formoj uzante la plenan nomon de la edzo oni signas iel, ke temas pri edzino. Ekzemple Mrs en la angla, Mme en la franca, Frau en la germana, la sufikso **-né** en la hungara. Li proponis uzi **-edza** por signi sufikse post la edza nomo la edzinon: Do: Kovács János**né** aŭ Kovács**né** = Johan**edza** Kovács aŭ Kovács**edza**. Tiu **-edza** estas bona helpilo, kiam oni scias nur, ke temas pri Kovács**né**, kies alian nomon oni ne konas. **Sinjorino** en Esperanto havas malavantaĝojn: estas strange — opiniis Kalocsay — kiam iu skribas pri si mem, ke ŝi estas Sinjorino, krome Sinjorino estas ĝentila alparolo, tial estus komike paroli jene: "Sinjorino Kiss estas malpura porko, malnobla hirudo, ne fidu tiun sinjorinon Kiss, tiun skorpion". Kalocsay memorigis, ke "edzo" origine estis sufikso, tiel same, kiel ilo, eco. Ĝi servis por formi la vortojn: princedzino, ŝuistedzino, reĝinedzo, prezidentinedzo ktp. Do tiu formo ne estas kontraŭ zamenhofa.

Reveninte pri la "kolerigo" de Kalocsay. Por *Hungara Vivo* mi tradukis la novelon de E. Galgóczy: *Minokampo*, en kiu ŝvarmas la nomo Török Jánosné, en mia traduko: "Edzino de Johano Török". Nu Kalocsay volis kapti la okazon pere de la novelo prezenti la formon **-edza**.

Mi protestis kontraŭ la ŝanĝo. Kalocsay ne diris eĉ unu vorton, sed lia vizaĝo nubiĝis, kaj la etoso fariĝis iom frosta.³⁷³ Hodiaŭ mi trovas lian proponon akceptebla. Sed pento malfrua estas vana. Feliĉe Kalocsay ne portis longe la kolereton. En la sekva sabato ni pasigis la tempon denove bonhumore.

Bibliotek-ordigo³⁷⁴

Pro mia insisto en 1973 Kalocsay konsentis ordigi la Esperanto-parton de lia libraro, en kiu havis valorajn pecojn el la fruaj jaroj de Esperanto, malgraŭ ke dum la revolucio (1956) lia loĝejo (en la strato Maria n-ro 34) grave difektiĝis kaj multaj libroj kaj aliaj valorajĵoj neniigis. Ankaŭ la restaĵoj estis en mizera stato, ĉifonitaj pro la kunpremigo sur la bretaro, elŝirataj paĝoj ktp. Kiam mi transprenis la hereditajn librojn kun multaj klopodoj sukcesis "resanigi" la invalidojn.

Dum la ordigo venis sunlumon jam de longe forgesitaj gazetoj, manuskriptoj, diversaj frandaĵoj, inter ili koloraj bildkartoj, kiuj prezentis scenojn kaj strofojn hungarajn-Esperantajn el la poemfabelo de Sándor Petőfi: JOHANO LA BRAVA,³⁷⁵ tradukita de Kalocsay. Tiam koncipiĝis la ideo: kunmeti ilustritan albumon. Sed ni devis rezigni pri la plano, ĉar la bildserio (12 pecoj) ne estis kompleta. La mankantaj bildoj post multjara serĉado venis en la KAL-ĈI Dokumentaro kaj la ideo realiĝis preskaŭ post tri jardekoj, en 2001.

180 Slipoj

Pro mia persvado Kalocsay en 1975 konsentis listigi siajn verkojn aperintajn en diversaj revuoj. Li trafolumis multajn gazetojn kaj ĉe la propraj verkoj faris ruĝkrajonajn signojn. Mia tasko estis la surslipigo. Kalocsay propramane plenigis 180 slipojn. Tiam malkaŝiĝis, ke krom la konataj plumnomoj — Kopar, C. E. R. Bumy, M. Alice Pik, Alex Kay, Peter Peneter (malgraŭ lia obstina neado), la postmortaj Ista Makler kaj Emiano Imby — li uzis ankaŭ pliajn. La zorge kaŝitaj pseŭdonimoj kaj kelkaj "enigmaj" literaj signoj konvenus por eterna kamuflado. Feliĉe, ke Kalocsay malkaŝis ilin antaŭ mi, kio ebligis la senmankan listigon de lia giganta verkaro. La "sepsigele sekretaj" plumnomoj de Kalocsay dum pli ol du jardekoj estis "severe enŝlositaj" en mia arkivo.³⁷⁶

Granda honorigo

Kiam en mezo de decembro 1975 aperis la DOMFABRIKO kaj ni intertintigis glasojn, Kalocsay proponis al mi ci-umon. La honorigon ne longe mi ĝuis. La 28-an de decembro li kuŝis jam en hospitalo.

Neniam mi pardonos al mi, ke en la antaŭa semajno (la 21-an de decembro) mi mankis el la sabataj gastoj. Vana estis la persvada pertelefona invito de Kalocsay. Mi estis tre laca kaj deprimita pro la samtaga vizito ĉe la grave malsana Paŭlo Balkányi. Ho se mi estus sciinta, ke li lastfoje bonvenigas la "sabatajn gastojn"!

*

Pasis jam pli ol kvaronjarcento, ke li translokiĝis en la Panteono de Zamenhof kaj mi restis orfa. Tamen mi estas feliĉa kaj iom fiera, ke mi apartenas al la malmultaj privilegiuloj, kiujn Kalocsay rigardis kiel amikojn. Li preteratentis la mult-lumjaran distancon inter ni kaj traktis min kiel egalrangulon. Mi estis kortegano de la vivanta, kaj admiranto de la mortanta Kalocsay, de kiam mi funde ekkonis kaj registris lian gigantan verkaron.

Kaj nun mi timeme demandas min: Kion dirus Kalocsay, se li legus la serion de OMAĜE? Ĉu li plibonigus la stilajn mallertaĵojn, aŭ li ŝerce ekkrius "**genia!!!**", kiel ĉiam, se iun verkon li taksis kontentiga.

Por la sekvaj generacioj, kiuj persone ne renkontis lin, aŭ kiuj ne legis almenaŭ liajn ĉefajn verkojn, Kalocsay fariĝos kvazaŭ rigida statuo. Mi estas feliĉa, ke mi ekkonis la multflankan geniulon ankaŭ kiel homon ĉiutagan, kaj per animaj okuloj mi povas revoki la vivantan, por mi ĉiam vivantan figuron de Kálmán Kalocsay.

Ada CSISZÁR

- 371 Post longa tempo mi eksciis, ke la aŭtoro de la orekkaresa kanto estis renoma hungara poeto Sándor Endrődi (1850-1920), kies monumenton kreis mia karmemora edzo Gyula Csiszár (1903-1986).
- 372 G. Waringhien en EdE (p. 276) erare skribis pri la "profundaj brunaj okuloj" de Kalocsay. Ĉu eble kulpis la preseja koboldo? Bedaŭrinde tiu ĉi eraro poste re- kaj represiĝis.
- 373 Pro mia rifuzo Kalocsay uzis la **edza**-formon en lia traduko: *Mono* de L. Galambos (HV 1971:4, p. 4-6). Alvenis nenia indigno. Poste li artikolis pri la edzinnomoj en: HE 1972:3, p. 3-4; 1972:12, p. 12.
- 374 Vd en: OMAĜE 1-a vol. p. 39-40.
- 375 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 37-42; ĉi-libre p. 126.
- 376 Plumnomoj kaj literaj signoj de Kalocsay kun aŭtentikaj klarigoj aperis en la kajero SENVUALE. Vd ĉi-libre p.125.

INTERVJUOJ, REMEMOROJ

- Halka, L.: **Ĉe Kolomano Kalocsay**. Intervjuo.
AD p. 30-40.
- Balkányi, P.: **Kalocsay respondas**.
REI 1955:Septembro (598), p. 259-261.
- Thorsen, P.: **Intervjuo. Kion faras Kalocsay?**
REI 1955:Novembro (600), p. 328-329.
- Székely, J.: **Egy világhírű magyar költő, akiről itthon kevesebbet tudnak mint külföldön**.
Mondfama hungara poeto — malpli konata en sia patrujo ol eksterlande).
Magyarország (Hungario) 1957.07.24.
- Boulton, M.: **Mi iris pilgrime**.
NAER 1959:5, p. 2-4.
- Boulton, M.: **Malkuraĝa Marjorie inter la Madjaroj**.
LE 1959:7-8-9, p. 66-69.
- Boulton, M.: **Revo pli ol plenumita**.
TBE 1959:Septembro (649), p. 121-124.
- Boulton, M.: **Kiel noktopapilo al la lampo**.
Esperanto 1959/125-127.
- Gnafalio (J. Havas): **Realiginta revo**. Taglibro-fragmentoj.
NLR 1961:36, p. 223-224. (Vd en: OMAĜE 1-a vol. p. 46).
- Boulton, M.: **Fajrujoj de Esperanto. XVI. Ĉe Kolomano Kalocsay**.
TBE 1962:Aprilo (678), p. 238-239.
- Szabó, V.: **Ĉi tie parolas Radio Budapeŝt**. Intervjuo.
Radio-dissendo: 1966.04.23. Presita teksto en: HE 1966:7, p. 8.
- Schelken, P.: **Az orvos, az eszperantó és az írógép**. (La medicinisto, Esperanto kaj la skribmaŝino). Intervjuo.
Gyorsírók és Gépírók Lapja (Gazeto de Stenografistoj kaj tajpistoj) 1970:4-5, p. 122-123.
Esperantigita fragmento en: HE 1970:7. p. 6.
- Silfer, G.: **Parolas Kalocsay**.
LF 1971:Aprilo, p. 9-11; repr. en: derE 1971:Novembro-Decembro, p. 15-16.
- Tárkony, L.: **Intervjuo kun K. Kalocsay**.
HV 1971:3, p. 4-5.
- Tófalvi, É.: **Költészetünk eszperantó tolmácsolója**. Intervjuo.
Magyar Hírlap (Hungara Ĵurnalo) 1971.10.15. Repr. en: Budapeŝta Rundschau.
- Hauptenthal, R.: **"Esperanto estas mia nobla hobia"**. Reinhard Hauptenthal interparolis kun Kálmán Kalocsay.
NP 1972:3, p. 131-140. Repr en: R. Hauptenthal: DU INTERVJUOJ. Saarbrücken: A. E. Iltis, 1979. 28 p.
- G(ergely), M.: **Arcképcsarnokunk**. (Nia Galerio). Intervjuo.
EM 1974:4, p. 6-7.
- Silfer, G.: **Lasta kafo kun Kolomano**. Intervjuo.
LF 1976:36, p. 10-12.
- Waringhien, G.: **Kelkaj memoraĵoj pri li ...**
Horizonto 1. 1976:3, p. 54-55.
- Waringhien, G.: **Kalocsay kaj mi**.
En: KAJ LA CETER' p. 11-32. (Vd p. 97).
- 'Sigmond, J.: **Rememoro pri helpema tradukisto**.
HV 1986:3, p. 95-96.
- Impresoj pri Kalocsay**. El letero de Marjorie Boulton al Henri Vatré.
IF 1991:3, p. 89-91.

DUA PARTO

LA POSTMORTA VIVO DE KÁLMÁN KALOCSAY KRONIKO DE KVARONJARCENTO

1976

La 5-an de marto 1976, en la *Londona Esperanto Klubo* H. Tonkin, prezidanto de UEA prelegis pri Kalocsay. Parton de lia omaĝa parolado publikigis Esperanto 1976/42-43. (Vd p. 69).

*

Post kvar tagoj de la entombigo de Kalocsay, la 29-an de marto en la *Esperanto Klubo* (Szolnok) prelegis A. Csiszár sub titolo: "Vivi plu sen Kalocsay".

*

D-ro I. Szerdahelyi en la *Grupo Konkordo* prelegis pri la "heroa epoko" de *Literatura Mondo*, pri la anoj de *Budapeŝta Skolo* kaj ties du ĉeffiguroj: Kalocsay kaj Baghy.

*

La 30-an de junio en la *Grupo Konkordo* okazis *Literatura Vespere* por memoro de Kolomano Kalocsay. Festparolis L. Kökény. Originalajn kaj tradukitajn poemojn de Kalocsay deklamis Krisztina Nyitray kaj Eta Szász. Dezső Koncz voĉlegis siajn hungarlingvajn tradukojn el la poemoj de Kalocsay.

*

Dum la 61-a UK en Athino okazis speciala memorkunveno omaĝe al Kalocsay. La programon aranĝis W. Auld. (Vd. p. 17).

1977

La 19-an de marto en la *Pedagoga Grupo "Verda Koro"* prelegis F. Jáki sub titolo: "Nia tradukartisto-genio, Kolomano Kalocsay".

*

La 6-an de oktobro okazis malgranda solenaĵo en la vilaĝo Zsombó, okaze de la 86-a naskiĝtago de Kalocsay. Festparolon diris István Polyák. La ĉi-tiea E-grupo portas la nomon de Kalocsay ekde 1976. Ĉi-okaze A. Csiszár donacis al la grupo tabuleton kun fotoj de Kalocsay.

*

Okaze de la 86-a naskiĝtago de Kalocsay, la 6-an de oktobro L. Győry-Nagy kaj István Pál aranĝis en Miskolc memorvesperon. Sub titolo "Ni memoras al Kálmán Kalocsay" parolis A. Csiszár kaj prezentis sonbendigitan deklamon de Kalocsay: *Knabinoj, mi promenis...* de A. Poliziano. L. Győry-Nagy rakontis pri la studentaj jaroj kaj la lerneja kamarado Kalocsay.

*

La 15-an de decembro okaze de la 118-a naskiĝ-datreveno de Zamenhof, d-ro L. Győry-Nagy organizis memor-vesperon en la *Departementa Kulturdomo "Rónai Sándor"*. La solenaĵon malfermis Imre Hegyi parlamentano. Festparolis d-ro Á. Máthé, estrarano de HEA. Lernejanoj el la vilaĝo Szirmabesenyő deklamis poemojn de Kalocsay. La *Esperanta Centra Grupo* ĉi-okaze ŝanĝis sian nomon al *"Ora Duopo" — Kalocsay-Baghy Esperanto-Grupo*.

*

En la VII-a distrikto en Budapeŝt funkcias Esperanto-rondo sub la nomo "Grupo Kalocsay".

1978

La 4-an de januaro en la *Grupo Konkordo* oni rememoris pri la 155-a naskiĝtago de la fama hungara poeto Sándor Petőfi. Ĉi-okaze oni komparis kelkajn poemojn el la poeziaĵo de Petőfi kun la Kalocsay-tradukoj kaj konstatis, ke Kalocsay majstre solvis eĉ la plej malfacilajn taskojn, nome la transplantadon de la hungaraj esprimoj en Esperanton.

*

Laŭ la insistado de A. Csiszár okaze de la dua morto-datreveno de Kalocsay, *Hungara Esperanto-Asocio* lokis granitan memortabulon sur la kriptono, kiu enfermis la cindron de la Esperanta klasikulo.

Familia kriptoj de lia edzino
Máriabesnyő, 1978.06.27.

Foto: Gy. Csiszár.

La 11-an de majo en la *Fervojista Esperanto-Klubo* "Julio Baghy" prelegis A. Csiszár sub titolo *Pacamantoj interbatalas...* (Pri la neologmilito — diskuto inter Baghy kaj Kalocsay).

1979

La *Esperanto-Grupo "Ora Duopo" — Kalocsay-Baghy* aperigis poŝtkalendaran folion kun sia nomo por la jaro 1979.

*

"Kalocsay kaj la Skolo de Literatura Mondo" estas la titolo de la III-a ĉapitro (19 p) en la libro: ENKONDUKO EN LA ORIGINALAN LITERATURON DE ESPERANTO. William Auld. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1879. 101 p. Enkonduka eseo kaj bibliografio de R. Hauptenthal.

1980

La *2-a Konferenco de Medicinistoj — Esperantistoj* en Karl-Marx-Stadt (1980.06.06/09) aperigis porokazan poŝtkarton ilustritan per la portreto de Kalocsay. Pri la eldono multe zorgis G. Brosche.

*

En Nagybakónak (cirkaŭaĵo de la urbo Nagykanizsa), oni rekonstruis du riĉkvajn fontojn, kiuj portas la nomojn de Baghy kaj Kalocsay.

*

La 1-an de junio en Milano okazis premiado de la internacia literatura konkurso "Eŭropo". En la esperantlingva branĉo "Memorialo Kalocsay" la premiojn ricevis: 1. A. Hules, 2. J. H. Rosbach, 3. N. Rossi. Laŭdaj mencioj iris al R. Bernard kaj A. P. Pirandello.

1981
Esperiga estonto en Abaújszántó

En Abaújszántó fondiĝis Esperanto-grupo en la *Kulturdomo Petőfi*— la unua en ĉi tiu urbeto. La fondintoj unuanime konsentis, ke la grupo portu la nomon de la mondfama Esperanto-literaturisto, naskito de Abaújszántó: D-ro Kálmán Kalocsay.

La fonda kunveno okazis la 3-an de oktobro. Malferman parolon diris József Kardos, prezidanto de la *Urbeta Konsilantaro*. Poste Barnabás Batta, vicprezidanto de la *Departementa Komitato de HEA* en Borsod-Abaúj-Zemplén prelegis pri la vivovojo kaj verkaro de Kalocsay, informis la ĉeestantojn ankaŭ pri la esplora laboro, kies celo estas malkovri kaj kolekti novajn dokumentojn pri la granda filo de la urbeto. Al la multnombraj ĉeestantoj — kiuj plenigis la ĉambregon de la kulturdomo — László Molnár helpe de bonaranĝita ekspozicio prezentis la historion de la Internacia Lingvo kaj ties movado. Li respondis al la demandoj de interesiĝantoj.

La estraro de la grupo:

Prezidanto: József Kardos, prezidanto de la loka konsilantaro
Sekretario: László Molnár, ĉeflerneja pedagogo
Kasisto: József Lénárt, entreprenisto
Sekretariino: Katalin Boros, administranto

Samtempe kun la grupfondiĝo komenciĝis Esperanto-kurso, gvidata de L. Molnár. Inter la dudek kursanoj estas ankŭ J. Kardos.

La fonda kunsido
De maldekstre: B. Batta, J. Kardos, L. Molnár, Katalin Boros

Jen en Abaújszántó la grajno estas jam semita.

Barnabás BATTÁ

*

ILEI konferenco estis aranĝita en Gödöllő (1981.07.11/21). La partoprenantoj ekskursis al Máriabesnyő kaj florkronis la kripton de Kalocsay.

*

La iama laborloko de Kalocsay *Hospitalo Szent László* postmorte distingis lin per "Memormedalo Gerlőczy Zsigmond".³⁷⁷

*

La 12-an de oktobro en la klubo de *Asocio de Hungaraj Verkistoj* estis okazigita Kalocsay-memorvespero. Festparolis Sándor Rákos, prezidanto de la *Tradukista Sekcio* de la asocio. V. Benczik, redaktoro de HV prezentis la ĵus aperintan antologion TUTMONDA SONORO. L. Kökény rememoris pri siaj personaj interrilatoj kun Kalocsay. Recitaloj de Kalocsay-poemoj, kantoj kun tekstoj de Kalocsay kaj ekspozicio de K. Fajszki riĉigis la artan nivelon de la solena vespero.

*

Omaĝo al Kalocsay en la *Grupo Konkordo* la 26-an de oktobro — okaze de lia 90-a naskiĝ-datreveno. Post la salutvortoj de Ervin Fenyvesi, Lajos Kapitány prezentis la la voĉon de Kalocsay, kiun li sonbendigis antaŭ nelonge de la morto de la festito. Pri la neologo kaj movadulo de Kalocsay prelegis P. A. Rados. József Megyeri prezentis la kuraciston, É. Farkas-Tatár parolis pri la pacamo de Kalocsay. Éva Gábor kantis popolkantojn tradukitajn de Kalocsay. E. Fenyvesi prezentis la ĵus aperintan antologion TUTMONDA SONORO. Al la solenaĵo kontribuis la ekspozicio aranĝita de K. Fajszki el la verkoj de Kalocsay. La materialoj al la prelegoj estis ĉerpitaj el la KAL-ĈI Dokumentaro.

*

La Kooperativo de *Literatura Foiro* en Chaŭ-de-Fonds aranĝis *Internacian Literaturan Forumon* la 27/29-an de novembro 1981. G. Silfer dediĉis sian prelegon al la hungara tradukarto. Li pritraktis la verkaron de S. Szathmári, poste komparis la verkistan agadon de K. Kalocsay kun la hungara poeto Mihály Babits kaj la gravecon de revuoj "Nyugat" kaj "Literatura Mondo".

*

377 Zs. Gerlőczy (1863-1937) estis fama infektologo, parlamentano, direktoro de la Hospitalo Szent László, ĉefo de Kalocsay.

* * *

1982

Abaújszántó gardas la memoron de la granda filo

La 21-an de marto 1982 verdaj flagoj flagris en la urbeto Abaújszántó, sonis la *Esperanta Himno* okaze de la solena inaŭguro de la memortabulo en la strato, kiu portas la nomon: Dr. Kalocsay Kálmán köz.^{378, 379}

Ĉe la solenaĵo ĉeestis ĉirkaŭ 150 personoj — esperantistoj kaj neesperantistoj. Venis samideanoj ne nur el la proksima urbo Miskolc, sed ankaŭ el foraj urboj: Nyiregyháza, Debrecen, Szolnok, Tata. El Budapeŝto per aparta aŭtobuso alvenis funkciuloj de HEA kaj ankaŭ kelkaj eksterlandanoj. Antaŭ la urbodomo József Kardos urbestro per salutparolo akceptis la gastojn. A. Csiszár transdonis donacojn: gramofon-diskon kaj enkadrigitan portreton de Kalocsay.

En la salono de la urbodomo porokaza ekspozicio donis skizan trarigardon pri la vivo kaj verkado de Kalocsay. Je la tagmezo komenciĝis la solenaĵo. Festparolon diris J. Kardos. Poste parolis L. Molnár, sekretario de la *Dr. Kalocsay Kálmán Eszperantó-Klub* kaj B. Batta, vicprezidanto de la *Departementa Komitato de HEA*. En la nomo de la *Hungara Esperanto-Asocio* parolis A. Csiszár, prezidanto, prizorganto de la spirita heredaĵo de Kalocsay. Anoj de la *Esperanto-klubo* deklamis ĥore poemojn de Kalocsay.

La memortabulon kronis en la nomo de HEA Sándor Jakab kaj Ada Csiszár. Metis florkronon sur la memortabulon: reprezentantoj de la *Urbeta Konsilantaro*, la loka *Esperanto-klubo*, la *Departementa Esperanto-Komitato*, *Budapeŝta Komitato* kaj senditoj de diversaj Esperantaj grupoj.

a 19/26-an de marto 1982 en Budapest okazis *Internacia Renkontiĝo de Esperanto-Teatroj*. La tria tago (samtage kiel la inaŭguro de la memortabulo en Abújszántó) estis dediĉita al Kálmán Kalocsay sub titolo "In memoriam dr. Kálmán Kalocsay". La literatura-muzika programo okazis en la *Sukaraĵejo Korona* (Krono), podio de literaturaj vesperoj. La dommastrino de la vespero estis aktorino Lilla Mikes. Pri Kalocsay prelegis V. Benczik. Hungaraj geaktoroj recitis hungare kaj esperante poemojn kaj poemtradukojn de Kalocsay. Precipe altkvalita estis la muzika programo. Krom la kantoj tradukitaj de Kalocsay estis prezentita lia komponaĵo al la poemo de Tennyson: *Maud*. La program-anoncisto de la vespero estis É. Farkas-Tatár.³⁸⁰

*

Landa Esperantista Renkontiĝo okazis en Miskolc la 23/25-an de julio 1982. Partoprenis pli ol 40 personoj. Dum la rondvojaĝa programo la partoprenantoj vizitis ankaŭ la urbeton Abaújszántó kaj florkronis la memortabulon de Kalocsay, metis bukedon sur la tombon de lia patrino Jolán Panda.

*

Dungintoj de la *Bakista Entrepreno* en Abaújszántó rememore pri la sukcesa inaŭguro de la memortabulo, adoptis la nomon: *"Dr. Kalocsay Kálmán Socialista Brigado"*.

- 378 La stratnomigon iniciatis László Molnár, la starigon de la memortabulo Barnabás Batta.
- 379 Pri la solenaĵo en Abaújszántó raportoj en: BI 1982:5, p. 4-5; HdE 1982:7. p. 2; VNY 1982:4, p. 13.
- 380 Pri la teatra programo raportoj en: VNY 1982:1, p. 1. BI 1982:5, p. 3-4; HV 1982:2. p. 42-48; BrE 1982:julio-aŭgusto (847), p. 148-150; Esperanto 1982/81.

Dr. KALOCSAY KÁLMÁN KÖZ

D-RO KÁLMÁN KALOCSAY
1891-1976

DOKTORO DE MEDICINA SCIENCO
FAMA ESPERANTO-POETO
TRADUKARTISTO KAJ LINGVISTO.

MEMORE AL LA NASKITO DE NIA URBETO
KONSILANTARO DE LA URBETO ABAÚJSZÁNTÓ

1982

ANTAŬ LA MIKROFONO

József KARDOS

László MOLNÁR

Barnabás BATTÁ

Ada CSISZÁR

Ĥoro de la Esperanto-Klubo

1. László Molnár, 2. Barnabás Batta.

Partoprenantoj

De live: S. Jakab, A. Csiszár,
A. Molnár (parenco de Kalocsay),
M. Leveleki.

Grupeto de la partoprenantoj vizitis
la tombon de la patrino de Kalocsay

Dr. Kalocsay Kálmán emlékszoba

Abaújszántó

Parto de la memor-ĉambro

1984

En februara kunsido de la *Urbeta Konsilio de Abaújszántó* decidis pri starigo de Kalocsay-statuo kaj al la elspezoj kontribuos per 20 mil forintoj. Invititaj reprezentantoj de entreprenoj same promesis financan subtenon.

*

La *Estraro de Hungara Esperanto*-Asocio en kunsido (1984.03.09.) konsentis pri la fondo de la *Internacia Komitato por Honoro al K. Kalocsay* (IKpHaK) kaj morale apogas ĝian agadon.

*

La *Budapeŝta Medicina Sekcio* helpe de la *Medicina Fakkomisiono de HEA* la 3-an de marto 1984 aranĝis tuttagan Kalocsay memor-kunsidon en la *Hospitalo László* (iama laborloko de Kalocsay). La solenan prelegon prezentis ĉefkuracisto d-ro Imre Ferenczy, sekretario de UMEA. Pri la medicinista agado de Kalocsay la materialon liveris la KAL-ĈI Dokumentaro.

*

La 23-an de marto en la Kalocsay memorĉambro okazis intima kunveno. *La Urbeta Konsilio de Abaújszántó* kunvokis reprezentantojn de ŝtataj instancoj kaj entreprenoj, esperantistojn kaj ne esperantistojn, kiuj grave kontribuis al la estigo de la memorĉambro kaj ties solena inaŭguro dum la 68-a UK.

*

Kadre de la kunveno la ĉefaj kontribuantoj ricevis donace enkadrigitan portreton de Kalocsay desegnitajn de Gábor Bényei.³⁸³

383 La bildon A. Csiszár donacis al la Fajszki-kolektaĵo.

1985

B. Batta eldonigis tri hungarlingvaj poŝtkartojn pri Abaújszántó. Sur la koloraj bildkartoj oni vidas i.a. la *Lokhistorian Muzeon* ene la memorĉambro, la strateton Kalocsay kun la memortabulo kaj la memorarbeton plantitan en 1983 okaze de la inaŭguro de la memorĉambro. La bildkartoj aperis en 20 mil ekzempleroj.

*

Laŭ la iniciato de la *Departementa Komitato de HEA* en Peŝta la lerneja junulara organizaĵo (KISZ) de la *Industria Faklaborista Instituto Imre Madách* en Gödöllő adoptis la nomon de d-ro Kálmán Kalocsay. En la faklernejo ekde oktobro 1983 funkciis E-fakrondo. La lernejoj rememoris, ke en Máriabesnyő (urboparto de Gödöllő) estas entombigita Kalocsay. Ricevinta oficialan permeson, ili elektis lian nomon.

La nomdona festo okazis la 3-an de aprilo 1985. Ĉeestis ĉ. 250 personoj, plejparte ne esperantistoj (reprezentantoj de la urbaj kaj departementaj junularaj organizaĵoj, gepatroj de la lernantoj ktp.) En la nomo de HEA salutparolis d-ro Á. Máthé. Pri la vivovojo kaj verkaro de la nomdonanto prelegis A. Csizsár kaj ŝi donacis al la lerneja komitato Kalocsay-fotoalbumon.

La junulara E-grupo la 11-an de junio aranĝis "Kalocsay Ĥoro-festivalon". La *Komitato de Kalocsay* reprezentis d-ro Á. Máthé.

Al la prospero de la Esperanto-movado en Gödöllő kaj al la postmorta honorigo de K. Kalocsay multe kontribuis fervojaj gesamideanoj, nome: Károly Bolla, Judit Barabás Nagyné, József Bebesi, Györgyné Kozák, d-ro János Nagy, Zoltán Szentgyörgyi.

*

La 30-an de junio kadre de la *23-a Somera Esperanto-Universitato* (1985 Gyula) sub titolo: "Kalocsay en la Esperanto-literaturo" prelegis A. Csizsár. Ĉeestis 70 personoj, kiuj povis aŭskulti poemon de Kalocsay: *Kanto de vagabondo* kune kun ĝia muziko komponita Kalocsay mem. Grandan aplaŭdon ricevis la sonbendigita deklamo de Kalocsay: *Knabinoj mi promenis...* de A. Poliziano. La ĉeestantoj ricevis donace memorkarton kun portreto de Kalocsay. Menciindas, ke la partoprenantoj de SEU estis 100, do la nombro 70 montras, ke Kalocsay interesas la esperantistojn.³⁸⁴

*

En la *24-aj Internaciaj Floraj Ludoj* Leif Gunnar Nordenstorm meritis premion "Eglanterio" pro la poemo: *Respondo al Kalocsay*.

384 La prelego aperis en: ELEKTITAJ PRELEGOJ DE LA 23-a SEU. Red. Zsolt Gyarmathy. Gyula: Teritoria Komitato, 1985. 75 p. (p. 62-73).

1986

La 26-an de februaro en 1986 okaze de la 10-a morto-datreveno de Kalocsay en la *Grupo Konkordo* okazis Kalocsay-memor-vespero sub titolo: "La aliaj flankoj de Kalocsay". Ervin Fenyvesi prezentis la movadon, d-ro Pál Avar la kuracistan agadon de Kalocsay. D-ro Imre Pethes prelegis pri la pacamanto Kalocsay. A. Csizsár sub titolo "Kanto de vagabondo" prezentis la muzikeman kaj muzikaman Kalocsay. D-ro Á. Máthé donis detalajn informojn pri la postmortaj honorigoj de Kalocsay. Per sonbendoj kontribuis György Simon.

*

La 5-an de marto en organizo de d-ro Imre Ferenczy kaj d-ro Lajos Molnár kadre de la *Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo* okazis scienca memorkunsido honore al K. Kalocsay.

*

La 21-an de marto — kadre de la *Budapeŝta Printempa Festivalo* — en la teatro-kafejo "Korona" (Krono) estis aranĝita literatura programo titolita: "In Memoriam prof. Kálmán Kalocsay". Malferman parolon diris d-ro Á. Máthé. M. Gergely, iama redaktoro de *Hungara Vivo* rememoris pri Kalocsay. A. P. Rados deklamis la poemon de Kalocsay: *En amara ĥoro*. Lilla Mikes, hungara aktorino interpretis poemon de L. Nagy: *Himno*

en ĉiuj tempojen traduko de Kalocsay.

*

La 23-an de marto la *E-grupo Kalocsay de la Industria Faklaborista Instituto* (35 personoj) vizitis al Abaújszántó kaj faris kontrakton kun la tiea junulara grupo pri kunlaborado. Unu el la programpunktoj celas vivigi la memoron de Kalocsay. La junuloj vizitis la memorĉambron, metis florbukedon al la strata memortabulo kaj sur la tombon de la patrino de Kalocsay.

La 24-an de aprilo la E-grupo aranĝis memortagon omaĝe al la nomdonanto. Estis malfermita porokaza E-ekspozicio. La geĵulnoj prezentis en formo de literatura prezentado fragmentojn el la vivo de Kalocsay. La *Prezidon de la Hungara Esperanto-Asocio* kaj la *Komitato de Kalocsay* reprezentis d-ro Á. Máthé.

En la *Industria Faklernejo* per "Kalocsay Kálmán memorfolio", distingas lernantojn pro eminenta agado en la junulara movado.

*

Kvina Internacia Literatura Forumo

La *Kooperativo de Literatura Foiro* — kunlabore kun HEA kaj IKpHaK — okaze de la 95-a naskiĝtago de Kalocsay inter la 7-a kaj 9-a de novembro 1986 aranĝis la *5-an Internacian Literaturan Forumon*. La ĉeftemo de la forumo estis: "Kolomano Kalocsay, ĉu la Danto de Esperanto?" La partoprenantojn (50 personoj) salutis Tibor Sekelj, mondvojaĝanto, prezidanto de la *Esperantlingva Verkista Asocio* (EVA). Dum la unuaj du tagoj okazis prelegserio en la *Kulturdomo de Zugló* (distrikto de Budapeŝto).

La Forumo post dek jaroj de la forpaso de Kalocsay analizis lian rolon en la Esperanta literaturo. G. Silfer prelegis pri la ĉeftemo, G. Mihalkov ekzamenis la rolon de Kalocsay en la disvolviĝo de la moderna Esperanta poezio. M. Fejes komparis tri tradukojn de LA TRAGEDIA DE L' HOMO. P. Martinelli komparis certajn elektitajn trajtojn de la verkaro de Dante kaj Kalocsay. V. Benczik parolis pri la efiko de la hungara kultura modelo al la vivoverko de Kalocsay. D-rino M. Ŝaturova ĉefe substrekis la signifon de la Kaloĉaja verkaro por la esperantistaro en Slovakio. H. Mayer, direktoro de IEMW prelegis sub titolo: "Kalocsay la neologo kaj liaj falsaj disĉiploj". La Forumon partoprenis 40 personoj el ses landoj. La prelegoj poste aperis en Literatura Foiro.

*

**Inaŭguro de la bronza busto de Kálmán Kalocsay
la 9-an de novembro 1986**

(Tria tago de ILF)

La solenaĵo en la naskiĝloko de Kalocsay komenciĝis en la loka *Kulturdomo Sándor Petőfi* per la Esperanta kaj hungara himnoj. La publiko plenigis la salonon. La podion ornamis verda stelo kaj la portreto de Kalocsay desegnita de Gábor Béneyi.

Salutparolis Barnabás Batta, vicprezidanto de la *Departementa Komitato de HEA* kaj Antalné Komjáti, vicurbestro de Abaújszántó. La rolantoj de la programeroj estis la loka blovorkestro kaj koruso de la baza lernejo. Anoj de la loka E-klubo kantis kaj deklamis el la verkoj de Kalocsay.

Post la kulturprogramo en la ĉarma parko d-ro Vilmos Sággy, eksministro, prezidanto de *Hungara Esperanto-Asocio*, Antalné Komjáti kaj Gábor Béneyi, lokaj gvidantoj inaŭguris la bronzan buston, starigitan de la loĝantaro de Abaújszántó omaĝe al sia granda filo. La buston kreis juna skulptisto Zsolt Józsa. Festparolon diris d-ro Vilmos Sággy. En la nomo de *Internacia Komitato por honoro al K. Kalocsay* kaj *Koop. de Literatura Foiro* parolis d-ro Giorgio Silfer. La monumenton florkronis Vilmos Sággy, Oszkár Princz, Mihály Gergely kaj Margit Evva (HEA), Antalné Komjáti kaj Gábor Béneyi (Abaújszántó), Mária Busai kaj László Pásztor (Miskolc).

Sekvis inaŭguro de reliefo pri "La maljuna Kalocsay" lokita sur la muro de *Lokhistoria Muzeo*. La reliefon kreis Gábor Béneyi amatora artisto. Inaŭguran parolon diris Ada Csiszár, sekretario de la *Esperantlingva Verkista Asocio*, afergvidanto de IKpHaKK, prizorganto de la spirita postlasaĵo de Kálmán Kalocsay. Ŝian parolon interpretis al la hungara Barnabás Batta.

La ĉeestantoj vizitis ankaŭ la memorĉambron, poste florkronis la memortabulon en la strateto Kalocsay. Ĉi tie parolis László Molnár.

La ferma kunsido de ILF kaj IKpHaKK okazis en la kulturdomo, kie vigle konversaciis la gastoj kaj gastigantoj. La solenaĵon de Abaújszántó partoprenis c. 100 personoj inter ili Tibor Sekelj, Márton Fejes, d-ro Árpád Máthé kaj Károly Fajsz.

La stratnomigo en 1982, la inaŭguro de la memorĉambro en 1983 kaj la starigo de la publika monumento de Kalocsay faris la urbeton kvazaŭ pilgrimejo. Rajte diris Vilmos Sággy en sia festparolo:

"Por honori al la memoro de Kalocsay, ĉiu esperantisto vizitu almenaŭ unu fojon la urbeton Abaújszántó."

- 385 Raportoj pri ILF kaj la inaŭguro de la bronza busto de Kalocsay en: BI 1986:6, p. 17; 1987:1, p. 4; LF 1986:96, p. 20; 98, p. 29; 1986-1987:100, p. 8-9; VNY 1986:6, p.11; repr. en: Iparkodo (Klopodanto) 1987:7, p. 7; Velo 1986:3-4, p.7; HV 1986:6, p. 219; Esperanto 1986/183; HdE 1987:1 (1772). p. 1; Boletín 1987:marto-aprilo (279), p. 21; HFM 1987:1, p. 9-11; BrE 1987:aprilo-majo (875), p. 232.

La bronza busto de Kalocsay
en bela parko de Abaújszántó

Kalocsay estas la unua, post Zamenhof,
kiu pro Esperanta agado ricevis publikan
monumenton.

Foto: János Patay.

La "Olda Kalocsay"
Inaũguro de la bronz a reliefo

Parolas Ada Csiszár.

1987

La 31-an de marto 1987 en la *Industria Faklernejo* estis aranĝita *Kalocsay-memortago*.

*

Kadre de la 5-a *Internacia Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj* la *Ŝtata Pupteatro*, sub gvido de Robert Bánky, la 22-an de marto prezentis la pupteatraĵon JOHANO LA BRAVA laŭ la traduko de K. Kalocsay.

*

Inaŭguro de Kalocsay-memortabulo en Máriabesnyő³⁸⁶

Kadre de la *Junulara Esperanto Renkontiĝo* (Gödöllő, 1987.04.03/05) la 3-an de aprilo okazis inaŭguro de memortabulo sur la muro de la domo (strato Fenyvesi-Nagy 76) kie inter la jaroj 1928 kaj 1955 pasigis la somerojn Kálmán Kalocsay.

En la *Komitato Kalocsay* kaj la *Esperantlingva Verkista Asocio* diris inaŭgaran parolon A. Csiszár. En hungare interpretis Imre Szabó.

Parto el la solena parolo.

"Emocie staras ni antaŭ la domo, kie somerumis kaj verkis Kálmán Kalocsay, doktoro de medicinaj sciencoj, fama Esperanta poeto, tradukisto kaj lingvisto.

En tiu domo naskiĝis multaj elstaraj verkoj, kiel STREĈITA KORDO, IZOLO, la brila traduko de la INFERO de Dante, la ROMAJ ELEGIOJ de Goethe kaj la verse reverkitaj EZOPA SAĜO. Tie li redaktis kaj plejparte tradukis la poemojn de HUNGARA ANTOLOGIO, kiu prezentis al la Esperanto-mondo la kremon de la hungara liriko. En tiu jaroj li tralaboris kaj preparis por la dua eldono la TRAGEDION de Madách kaj la popolfabelon JOHANO LA BRAVA de Petőfi. En tiuj jaroj, kaj parte en ĉi tiu domo naskiĝis liaj elstaraj lingvistikaj verkoj: LINGVO, STILO, FORMO; PARNASA GVIDLIBRO, PLENA GRAMATIKO de ESPERANTO.

Ĉi tiu domo por Kalocsay estis ne nur oazo kaj verkejo sed dum la dua mondmilito ankaŭ azilo. Kiam en Hungario jam furiozis la faŝisma teroro, Kalocsay ne hezitis riski la propran vivon por savi la vivon de kelkaj persekutitoj — inter ili esperantistoj — kiuj trovis rifuĝejon en la *Hospitalo Szent László* en ties neuzita ŝirmejo aŭ inter la malsanuloj. Poste oni denunciis la d-ron kiel "suspektindan personon". Feliĉe Kalocsay ĝustatempe sciigis, ke la polico ordonis lian arestigon kaj rifuĝis ĉi tiun domon. Gödöllő-Máriabesnyő por la faŝistoj estis danĝera zono, ĉar kvin kilometra distanco estis la batalfronto kaj marŝis antaŭen la soveta armeoj ..."

Reprezentantoj de *Hungara Esperanto-Asocio*, lokaj E-grupoj, kaj tiuj de la mezlerneja organizaĵo — portanta la nomon de Kalocsay florkronis la memortabulon.

Post la solenaĵo 50 partoprenantoj de JER vizitis kaj florkronis la tombokripton de Kalocsay en la loka tombejo.

D-ro János NAGY

***E házban lakott és alkotott
1928-1955 nyarán***

***Dr. Kalocsay Kálmán
eszperantó költő,
műfordító és nyelvész.***

Állította JER 1987

- 386 Pro la starigo de la memortabulo meritas dankon la Departementa Komitato de HEA en Pešt, Elizabeta Ködmön, kiu prizorgis la pretigon de la tabulo kaj János Szilágyi, ĉefa kontribuanto de la sukcesa aranĝaĵo.
- 387 La nova posedanto trakonstruis la domon. El la originalo restis nur la etaĝa parto.

Pro la esplora laboro kaj prizorgado de vivoverko de Kálmán Kalocsay en parlamentejo la 20-an de marto (1987) Ada Csiszár transprenis ministerian distingon: "Pro la Socialisma Kulturo".

*

La 23-an de aprilo 1987 en la *E-grupo* "Ora Duopo"—*Kalocsay-Baghy*(Miskolc) B. Batta prelegis sub titolo "Naskiĝloko, vivo kaj laboro de Kálmán Kalocsay".

*

Federacio de Esperanto-Organizaĵoj(en Nederlando) aranĝis traduk-konkurson en 1987. En la kategorio "Poezio tradukita el Esperanto en la Nederlandan lingvon" gajnis premion s-ro W. A. Verloren van Themaat por la traduko de la poemo de Kalocsay: *Freneze*.

*

La *E-grupo Kálmán Kalocsay*(Gödöllő) la 26-an de novembro solene rememoris al la nomdonanto.

1988

En la *Urbeta Biblioteko de Abújszántó* oni starigis Esperanto-fakon, kies bazo estas 50 libroj el la hejma biblioteko de Kalocsay-Csiszár.

*

La jaro 1988 portis novan postmortan honorigon al K. Kalocsay. La *Urba Konsilio de Miskolc* en sia kunsido la 17-an de marto decidis, ke la strato Kalocsai (Kalocsa estas nomo de urbeto) en la urboparto Hejőcsaba portu la nomon *Dr. Kalocsay Kálmán*. La honorigo estas dankebla al la persistaj klopodoj de István Pál, sekretario de la *Departementa Komitato de HEA* kaj Barnabás Batta.

Tutlanda Esperantista Renkontiĝo estis aranĝita la 18/21-an de aŭgusto 1988 en Miskolc okaze de la 75-a jariĝo de la loka Esperanto-movado. B. Batta eldonis memorkarton kun la portretoj de Kalocsay-Győry-Nagy, rememorante, ke ili en la urbo gvidis la unuan Esperanto-kurson en 1913.³⁸⁸ István Pál aperigis ilustritan kajeron pri la historio de la loka Esperanto-movado. Grupo de partoprenantoj ekskursis al Abaújszántó, vizitis en la memorĉambro kaj florkronis la buston de Kalocsay.

Okaze de la 150-a mortodatreveno de Ferenc Kölcsey (kreinto de la *Hungara Himno*) en lia iama loĝloko Álmosd oni aranĝis memorfeston kaj ekspozicion. En la memordomo oni gardas tekstojn de la *Himno* tradukitajn al diversaj lingvoj. La prizorgantoj afable akceptis kaj ekspoziciis la Esperanto-transplanton de Kalocsay.

388 Vd en: OMAĜE 7-a vol. p. 3-4.

1989

La 20-an de januaro okazis kunsido de HEA. La estraro komisiis d-ro Á. Máthé fondi komisionon por prepari la festojn de la jaro Baghy-Kalocsay en 1991.

*

En la Pentekostaj tagoj la loka radiostacio en la regiono Rotterdam disaŭdigis programon. La tekstoj estis elektitaj el pluraj lingvoj. Esperanton reprezentis poemo de Kalocsay: *Sur la Monto Nebo* voĉlegita de dro W. A. Verloren van Themaat.

*

La 17-an de oktobro 1989 B. Batta, d-ro Á. Máthé kaj L. Molnár, komitatanoj de IkpHaKK renkontiĝis en Szirmabesenyő kaj preparolis antaŭpreparan laboron por la centjariĝo de Kalocsay-Baghy.

1990

Laŭ la iniciato de la *Internacia Komitato por Honoro al K. Kalocsay* la estraro de UEA en sia februara kunsido deklaris la jaron 1991 "Jubilea Jaro de Baghy-Kalocsay".

1991

Kelkaj revuoj memorigis, ke la jaro 1991 estas "Jubilea Jaro de Baghy-Kalocsay", kaj per artikoloj omaĝis al la du jubileantoj.

*

La 10-an de majo la E-fakrondo de bazlernejoj de la vilaĝo Nagykovácsi vizitis la *Esperanto-parkon* en Budapeŝt kaj florkronis la memorŝtonon starigitan dum la 51-a UK en 1966. Rememorante pri la jubilea jaro de la du poetofratoj oni voĉlegis la poemon de Kalocsay: *Zamenhofa balado*.

*

Deka Internacia Literatura Forumo³⁸⁹

La Forumo en organizo de *Kooperativo Literatura Foiro* kaj *Hungara Esperanto-Asocio* estis aranĝita en Budapeŝt (1991.06.15/20)

La ĉeftemon de la Forumo: "Baghy kaj Kalocsay: ĉu (nur) poetofratoj?" prezentis G. Silfer.

Pliaj prelegoj:

G. Silfer: "Julio kaj Kolomano: rivale aŭ rivalte"

A. Csiszár: "Centjara estus jam la koro"³⁹⁰ (Kun sonbendigita voĉo de Kalocsay)

P. Martinelli: "Baghy, la humoristo" (anstataŭ P. M. voĉlegis G. Silfer)

D-ro Á. Máthé: Baghy kaj Kalocsay en la Esperanto-Gazetaro"

I. Ertl: "Amo kaj amoro en la verkoj de Kalocsay kaj Baghy"

La 16-an de junio okazis tuttaga ekskurso per aŭtobuso al Abaújszántó. La partoprenantoj vizitis la memorĉambron, florkronis la Kalocsay-buston. Festparolis G. Silfer. La programon aranĝis B. Batta.

Dum la Forumo kelkaj vizitis ĉe la tombo de J. Baghy.

La filatelistoj (István Fekete kaj János Szilágyi) eldonigis poŝtkarton kaj glumarkon kun la portreto de Kalocsay kaj Baghy. Okazis ankaŭ poŝtostampado.

389 Raportoj pri la Forumo en: Fenomeno 1991:9, p. 10-11; "Unesco Nieuws" 1991:4, p. 10; HI 1991:7 p. 79; Észak-Magyarország 1991.06.29.

390 Aperis en: Literatura Foiro 1991:133, p. 11-16.

*

108

En la Esperanta dissendo de *Hungara Radio* la programo la 7-an de julio 1991 estis dediĉita al la memoro de Kalocsay.

Anna Kiss kantis hungaran florkanton: *Haj, haj, roz', diant'...* tradukitan de Kalocsay.

Sub titolo: "Centjara estus jam la koro" parolis A. Csiszár.

Fine deklamis hungara aktoro Zsigmond Fülöp poemtradukon de Kalocsay: *Al la Espero* de M. Csokonai-Vitéz. La programon aranĝis É. Farkas-Tatár.

*

En la Kultura Esperanto-Domo (Gresillon) de la 9-a ĝis la 22 de Julio okazis prelegoj kaj kursoj omaĝe al Baghy kaj Kalocsay sub titolo: "La historo de Eŭropo tra la verkoj de Baghy kaj Kalocsay". La 13-an prelegis

d-rino M. Boulton sub titolo: "Kiel Kalocsay kaj Baghy progresigis nian literaturon". La sekvan tagon ŝi parolis pri "Personaj memoroj pri Baghy kaj Kalocsay". Dum la aranĝoj oni emfazis la apenaŭ mezureblan valoron de *Literatura Mondo*.

*

En *Litova Stelo* (1991:3 (79), p. 32) oni legas: "Dum Somera Universitato okazis 16 prelegoj. Elstaraj estis prelegoj pri du centjaruloj: "Hendrik Adamson kaj Kolomano Kalocsay" de J. Ojalo.

*

La *1-a Eŭropa Medicina Esperanto-Konferenco* estis aranĝita en Hódmezővásárhely (Hungario) la 21/25-an de aŭgusto 1991. Kadre de la malferma solenaĵo la 22-an d-ro I. Ferenczy, prezidanto de UMEA prelegis pri la vivo kaj agado de Kalocsay.

*

En la *Fervojista E-grupo Julio Baghy* la 2-an de septembro prelegis d-ro I. Bácskai sub titolo: "Karakterizaj epizodoj el la vivo de Baghy kaj Kalocsay".

*

Abaújszántó inde omaĝis al sia fama filo³⁹¹

La 5-an de oktobro 1991 esperantistoj kaj neesperantistoj grandnombre kolektiĝis antaŭ la bele ornamita kulturdomo.

La solenaĵo komenciĝis per la Esperanta kaj hungara himnoj. Festparolis János Kender urbestro. Pri la vivovojo kaj literatura agado de Kalocsay prelegis A. Csiszár. La ĉeestantoj emociiĝante aŭskultis la sonbendigitan deklamon de Kalocsay: *Knabinoj, mi promenis...* de Anĝelo Poliziano. Pri la redaktoro Kalocsay prelegis d-ro Á. Máthé. Batta Barnabás kaj László Molnár detale konigis la multjaran klopodojn, kies rezulto estas, ke Abaújszántó fariĝis kvazaŭ pilgrimejo de esperantistoj.

La programeroj de lernantoj el Abaújszántó kaj el Szirmabesenyő, la rolado de gimnazianoj el Miskolc kaj studentoj de la *Altlernejo Sárospatak* altnivele kontribuis al la omaĝo.

Post la prelegoj la afergvidantoj de IKpHaKK anoncis, ke finiĝante la jubilea jaro, finiĝas ankaŭ la historia rolo de la Komitato, fondita en 1983. Ĝi celis agadi ĝis la centjariĝo de Kalocsay. Anstataŭ ĉi tiu porokaza Komitato amikoj kaj respektuloj de Kalocsay en baldaŭ fondota societo plu flegas lian memoron.

Florkronado de la strata memortabulo kaj la busto de Kalocsay, vizito en la bone zorgita memorĉambro fermis la solenaĵon, kies ĉefaj aranĝantoj estis B. Batta kaj L. Molnár.

391 Raportoj pri la solenaĵo en: ÉM 1991.10.01, 10.15; HFM 1991:4, p.54-55; HI 1991:10, p.115-116.

*

Konata latva skulptisto Janis Strupulis kreis medalojn pri Baghy kaj Kalocsay. S-rino Saulcerita Neilande donacis fotojn de la medaloj por la KAL-ĈI Dokumentaro.

*

En Vjetnamio kadre de la ĉiumonata kunveno en la *Klubo de Fakinstruado* en oktobro oni memoris pri Kalocsay. Pri lia vivo kaj Esperanta agado prelegis profesoro de ekonomio-historio. Ĉeestis pli ol 40 aŭskultantoj.

*

La 7-an de oktobro en la *Fervojista Esperanto-Grupo Julio Baghy*s-ino Ferencné Juhász parolis pri la 2-a volumo de la antologio TUTMONDA SONORO aperigita en 1981 okaze de la 90-a naskiĝdatreveno de Kalocsay.

*

Géza Kurucz pedagogo (Kecskemét) la 15-an de decembro 1991 organizis por lernejanj tutlandan konkurson pri arta traduko, okazigita memore al K. Kalocsay.

*

Krys Ungár en eseo sub titolo "La virinoj de Kalocsay kaj Auld" (LF 1991:129, p. 4-15) esploras la amon kaj amoron en la poeziaĵo de Kalocsay kaj Auld.

*

En la KAL-ĈI Dokumentaro pretiĝis fotoalbumoj (tri volumoj), kiuj en kronologiaj aranĝoj prezentas Kolomanon Kalocsay.

*

En 1983 fondiĝis porokaza *Internacia Komitato* (IKpHaKK) por inde omaĝi al la centjara naskiĝ-datreveno de Kalocsay.³⁹² En la fino de jubilea jaro (1991), la Komitato disiĝis, sed prizorgi la memoron de tiu geniulo ne malaktualiĝas.

Laŭ la iniciato de A. Csiszár

Fondiĝis "Amika Societo de d-ro Kálmán Kalocsay"³⁹³

La Societo (ASdKK) celas pluflegi la memoron de la renoma medicinisto, genia poeto, tradukisto kaj lingvisto Kalocsay; kolektas ĉiujn artikolojn, atentis pri eventoj kiuj koncernas lian nomon, instigas eldonon de liaj verkoj postlasitaj kaj elĉerpitaj. Parte ĝi daŭrigas la agadon de IKpHaKK.

ASdKK estas sendependa kultura societo, ĝi emas kunlabori kun similaj organizaĵoj. Al la Societo povas aniĝi ĉiuj bonintencaj hungara kaj nehungara ŝtatano, esperantistoj kaj neesperantistoj, kiuj aprobas ĝiajn celojn.

La fonda kunsido okazis la 30-an de oktobro 1991. Ĉeestis 21 personoj, kiuj unuanime akceptis la regularon kaj elektis la estraron kaj Kontrolan Komisionon. Nome:

Prezidanto: Ada Csiszár
Sekretario: D-ro Árpád Máthé
Vicprezidantoj: Barnabás Batta, D-ro Imre Ferenczy³⁹⁴
Kasisto: Ferencné Juhász

Anoj de la Kontrola Komisiono:
Pál Kristek (gvidanto), Géza Kurucz, Katalin Balogh³⁹⁵

La Budapeŝta Ĉefurba Juĝistaro — laŭ la leĝo 1989. II. §. 15. (1) — registris la Societon en la kultura agadsfero sub numero 4213.³⁹⁶

La estraro kvaronjare informis la membraron pri sciindaĵoj. Ĝis 1999 estis dissenditaj 26 *Cirkuleroj*, kiuj bone plenumis la taskon de interligilo, tamen oni devis ĝin ĉesigi pro la malfavoraj cirkonstancoj. Pro la disfalo de E-grupoj, ĉeso la Esperanto-dissendo en la Hungara Radio, ktp., la magraj okazintaĵoj apenaŭ plenigis la kvaronjaran cirkuleron. Ekde 2000 nur la *Jarraporto* informas la membraron pri novaĵoj kaj samtempe estis ĉesigita la kotizpago.

La *Cirkuleron* parte anstataŭas la okpaĝa bulteno KAL-ĈI Dokumentaro (redaktita de A. Csiszár), kiu krom la novaĵoj donas mozaikojn el la vivo kaj verkaro de Kalocsay. Por tiuj materialoj, ĉerpitaj el la KAL-ĈI Dokumentaro, ne estus konvena aperloko la *Cirkulero*. La estraro havas kontakton kun la membroj ankaŭ perletere, telefone kaj ret-poŝte.

En la forpasinta pli ol jardeko helpemaj samideanoj kun multaj informoj kaj dokumentoj riĉigis la Kalocsay-kolektaĵon. Ankaŭ la Societo ofte donis informojn al organizaĵoj kaj al ĉiuj interesiĝantoj.

Pere de interreto interesiĝantoj, literatur-amantoj ekkonas mozaikojn el la vivo kaj personeco de Kalocsay, pecojn el lia verkaro.

ASdKK en la fino de 2002 nombras 47 membrojn, el ili 14 personoj estas eksterlandanoj. El la membroj de IKpHaKK aniĝis al ASdKK kiel kunfondaj membroj: Barnabás Batta, Ada Csiszár, Reinhard Hauptenthal, d-ro Árpád Máthé, László Molnár, d-ro Imre Pethes.

Laŭ *Statuto* de la *Societo Kalocsay* la mandato de la estraro validas por kvinjara periodo. La estraro elektita en 1991 jam dufoje estis reelektita.

Fonda kunsido

A. Csiszár, d-ro Á. Rátkai,
d-ro Á. Máthé, d-ro B. Wacha.

1991.11.30.

- 392 La jaro 1991 estas triobla datreveno de Kalocsay. Li naskiĝis antaŭ 100 jaroj, mortis antaŭ 15 jaroj, esperantiĝis antaŭ 80 jaroj.
- 393 Raportoj pri ASdKK en: E-dissendo de la Hungara Radio 1991.08.12; NZE 1991:511, 3; Hirharsona 1991:6, p. 4-5; Eventoj 1992:7, p. 4; Fonto 1992:138, p. 21-23; HdE 1992:8 (1859), p. 2; EVA Bulteno 1992:julio; HFM 1992:1, p. 8-9; Penseo 1992:20, p. 40; Esperanto 1992/120.
- 394 Pliaj vicpezidantoj: D-ro Blazio Wacha 1996), István Mészáros (2001).
- 395 En la Kontrolo Komisiono anstataŭ Pál Kristek kaj Katalin Balogh ekde 1994 Tivadar Kereszthegyi kiel gvidanto kaj József Cziboly.
- 396 En la komunisma reĝimo tiaspecaj grupigoj estis kontraŭleĝaj kaj severe punitaj.

Parto de la kunfondantoj

De live: M. Juhász, T. Kereszthegyí,
D-ro I. Bácskai, P. Kristek.

Kafo-paŭzo

De live: D-ro Á. Máthé, É. Major, M. Juhász
J. Major (Nov-Zelando), P. Kristek.

1992

La 9-an de januaro en la Esperanta dissendo de *Hungara Radio* la redaktorino Éva Farkas-Tatár intervjuis d-ron Á. Máthé pri la celo de la *Amika Societo de K. Kalocsay*.

*

La 3-an de septembro en la E-dissendo oni aŭskultis poemon de Kalocsay: *La grilo kaj la formiko* el EZOPA SAĜO.

*

La *Dekunua Internacia Literatura Forumo* estis aranĝita en Bulgario. Ĝia temo estis "La porinfana literaturo en Esperanto". G. Silfer voĉlegis el la postlasitaj fabelpoemoj de Kalocsay.

*

La *Esperantlingva Verkista Asocio* de la 1-a ĝis la 6-a de oktobro en Poprad (Ĉeĥoslovakio) aranĝis simpozion pri la temo: "Nacilingva traduko de Esperanto". La ĉefaj organizantoj István Ertl kaj W. A. Verloren van Themaat okupiĝis ankaŭ pri la verkoj de Kalocsay, ĉefe pri liaj poemoj tradukitaj al la Nederlanda lingvo.

*

La 12-an de novembro en Esperanta dissendo de la *Hungara Radio* oni aŭskultis la poemon de Verlaine: *Aŭtuna kanto* en traduko de Kalocsay.

1993

La 9-an de februaro en la neesperantista *Amika Rondo de Departemento Borsod-Abaúj-Zemplén* antaŭ pli ol 80 personoj parolis A. Csiszár pri la memoraĵoj de Kalocsay en la departementa urbeto Abaújszántó.

*

Dum la 9-a IMEK (Veszprém <Hungario> 08/11.07.1993.) D-ro Imre Ferenczy, prezidanto de UMEA, vicprezidanto de ASdKK dufoje parolis pri la eminenta fakulo de infektaj malsanoj Kálmán Kalocsay kaj pri la Amika Societo.

*

Okaze de la *Skolta Memortendaro* aranĝita en Gödöllő-Máriabesnyő, la 2-an de aŭgusto d-ro I. Bácskai akompanis grupeton al la kriptoj de Kalocsay. Li rakontis pri la ĵamboreo aranĝita en 1933, kion partoprenis ankaŭ Kalocsay. Tiam P. Balkányi verkis *Esperantistan Skolthimnon* kaj Kalocsay komponis ĝian melodion.³⁹⁷

*

En Alsóórs (somerumejo apud Balatono) oni restaŭris monumenton de hungara poeto S. Endrődi, kies poemon tradukis Kalocsay.³⁹⁸

*

En la aŭkcio dum la 78-a UK en Valencio, la plej altan prezon (8 000 pts) atingis la ETERNA BUKEDO de Kalocsay.

*

Dum la 78-a UK aranĝita jarkunveno de UMEA, d-ro I. Ferenczy parolis pri Kálmán Kalocsay.

*

Géza Kurucz, redaktoro de *Juna Amiko* (Kecskemét) ankaŭ ĉi-jare anoncis landan literaturan konkurson por lernejoj, rememore al Kálmán Kalocsay.

*

En 1993 ni aŭskultis poemtradukojn de Kalocsay en la Esperanta dissendo de la Hungara Radio:

En januaro: F. Kölcsey: *Hungara Himno*; J. Pannonius: *Pri transdanuba migdalarbo*; B. Balassi: *In laudem confiniorum* (Por laŭdo de la landlimoj); S. Petőfi: *Alaŭdon aŭdas mi denove*.

La 15-an de aprilo: A. József: *Ĉe Danubo*; M. Babits: *Vespera demando*

La 26-an de aprilo: E. Ady: *Batalo kun la grandsinjoro*

La 24-an de majo: *Vespera kanto* (popolkanto)

La 14-an de junio: M. Csokonai-Vitéz: *Al la rozburĝono*

La 5-an de julio: O. Roquette: *Lude, petole gajas la kor'* (Fragmento el "La legendo de Sankta Elizabeto"); *Fraŭlmokado* (hungara popolkanto)

La 13-an de septembro: S. Petőfi: *Fino de septembro*

397 Vd en: OMAĜE 1-a vol. p. 68; 6-a vol. p. 46; 7-a vol. p. 44-45.
398 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 32; ĉi libre p.78, 83.

1994

La 27-an de februaro (mortotago de Kalocsay) en Miskolc okazis inaŭguro de memortabulo de Kalocsay en Miskolc, en la strato, kiu portas lian nomon de 1988. Inaŭguran parolon diris d-ro Árpád Máthé, sekretario de la *Amika Societo de K. Kalocsay*. La starigo de memortabulo estas dankebla al *Nord-Hungarlanda Esperanto-Asocio* kaj al la klopodo de István Szörényi kaj Gusztáv Lukács.

Inaŭguro de la memortabulo

De live: G. Lukács, d-ro Á. Máthé,
I. Szörényi.

*

En 1994 oni aŭskultis poemtradukojn de Kalocsay en la E-dissendo de *Hungara Radio*:

La 19-an de aprilo: A. József: *Ĉe Danubo*

La 2-an de majo: O. Gellért: *Sankta malbela*
La 20-an de junio: *Epigramoj* de Kallimachos
La 20-an de septembro: S. Petőfi: *Fino de septembro*

La 3-an de majo disaŭdigis la Radio originalan poemon de Kalocsay: *Nia kor'* muzikigita kaj kantita de V. Danjanov.

1995

En la Pola-hungara Konferenco la 22-23-an de februaro en la *Hungara Kultur-Instituto* Wojciech Usakiewicz prelegis pri Kalocsay kaj *Literatura Mondo*.

*

El historia vidpunkto altvaloran dokumenton de la familio Panda (patrina branĉo de Kalocsay) A. Csiszár donacis al la *Hungara Landa Arkivo*,³⁹⁹ kie oni kun ĝojo akceptis la nobeligan dokumenton (datumitan en 1580) kaj sub n-ro 6214 registris ĝin.

*

En la E-dissendo de *Hungara Radio* la 9-an de aprilo É. Farkas-Tatár prezentis du poemtradukojn de Kalocsay. Nome: A. S. Puŝkin: *La eĥo* kaj de A. József: *Ĉe Danubo*.

*

G. Kurucz la kvinan fojon okazigis tutlandan Esperantan konkurson pri arta traduko honore al K. Kalocsay.

1996

La 27-an de februaro en la E-klubo *Fenikso* (Riga) s-ino Genoveva Tamane prelegis pri Kalocsay okaze de lia morto-datreveno.

*

Vandaloj penetris en la *Lokhistoria Muzeo* en Abaújszántó kaj frakasis historiajn artobjektojn. En la Kalocsay memorĉambro la vitroplato de skribotabla kaj kelkaj dokumentoj fariĝis viktimo.

*

La 23-an de aprilo en la *Centra Esperanto-Klubo* (Budapest) T. Kereszthegyi prelegis pri ASdKK kaj la libro IN MEMORIAM Dr. Kalocsay Kálmán.

*

En la Hungara Radio oni ĉesigis la Esperanto-elsendojn. El la etero ni ne aŭdos pri Kalocsay, liajn poemojn kaj poemtradukojn ne plu ĝuos en la belvoĉa prezento de Éva Farkas-Tatár. La lasta dissendo okazis la 3-an de marto, kiam d-ro Á. Máthé diris adiaŭon al la aŭskultantaro.

*

La 4-an de majo en la Fiŝ-klubo (Budapest) Mária Rados deklamis poemon de Miklós Radnóti: *Sepa Eklogo* en traduko de Kalocsay.

*

En la aranĝo de *Nord-Hungaria Esperanto-Asocio* la 15-an de oktobro en Miskolc okazis florkronado en la strato Dr. Kalocsay Kálmán. Post rememoraj vortoj Barnabás Batta voĉlegis poemojn de Kalocsay.

399 Indikojn de la dokumento gardas genealogia tabuleto kunmetita de Gy. Csiszár en 1977. Vd en LF 1979:58, p. 12-13; IN MEMORIAM p. 5-7; OMAGE 1-a vol. p. 3-3.

1997

Herbert Mayer, direktoro de la *Internacia Esperanto Muzeo* en Wien, en aŭgusto vizitis la KAL-ĈI Dokumentaron. Li konstatis, ke la bone ordigita kolekto kune kun la biblioteko indas je transpreno por IEMW kiel heredaĵo. A. Csiszár pri la konsento pretigis oficialan dokumenton.

1998

La 6-an de aprilo en la *Centra Esperanto-Klubo* (Budapest) kadre de la "Verda Lundo" d-ro Á. Máthé prelegis sub titolo: "Societo Kalocsay kaj la heredaĵo".

*

Omaĝe al Kalocsay eltirkeŝtiĝu! István Ertl konversaciis kun A.Csiszár pri la "Esperanta heredaĵo" de Kolomano Kalocsay. (Esperanto 1998:5, p. 86)

*

Ĝojiga sciigo el Abaújszántó. Oni renovigas la *Lokhistorian Muzeon*, ene la Kalocsay memorĉambron, kies materialon reordigos amiko Barnabás Batta.

*

Erling Windeballe (Danio) sciigis, ke la manuskripton de EZOPA SAĜO li aĉetis en aŭkcio aranĝita por helpi al hungaraj esperantistoj, kiuj suferis perdojn dum la revolucio en 1956.

*

Okaze de la 83-a UK en Montpellier EVA metis antaŭ siajn membrojn la demandon: "Kiu originalaj Esperanto-libroj laŭ vi estas la plej legindaj?" Inter la "legindaj" estas listigitaj ankaŭ la STREĈITA KORDO de Kalocsay.

1999

En la aŭkcio aranĝita dum la 84-a UK la antologio ETERNA BUKEDO (1931) de Kalocsay vendiĝis por 105 DEM.

2000

Ekde tiu jaro nova periodaĵo, la KAL-ĈI Dokumentaro informas la membrojn de *Amika Societo*.⁴⁰⁰

*

La Libroservo de UEA sciigis ke la PLENA ANALIZA GRAMATIKO (feliĉe aŭ bedaŭrinde?) elĉerpiĝis. La 559 p. libro estis la 5-a eldono de PLENA GRAMATIKO de ESPERANTO ampleksigita kaj tralaborita de G. Waringhien.

*

En Barlastono (Britio) en aŭgusto oni festis la 40-jariĝon de la somerlernejo. Inter aliaj prelegis Tim Carr sub titolo "Tra la ŝtormo de Kalocsay".⁴⁰¹

*

László Molnár, ĉeflerneja docento en Sárospatak instruas Esperanton. Liaj lernantoj skribis faklekcionojn sub titoloj: "Abaújszántó kaj Esperanto"; "Literatura agado de la Esperanto- verkisto Kálmán Kalocsay".

2001

**Omaĝoj de la Amika Societo de d-ro Kálmán Kalocsay.
sen la jaro de triobla datreveno**

Antaŭ 110 jaroj la 6-an de oktobro 1891 naskiĝis Kálmán Kalocsay.

Antaŭ 90 jaroj li dediĉis sian talenton al la nobla ideo de la zamenhofa lingvo kaj ĝismorte estis ĝia senlaca kultivanto.

Antaŭ 25 jaroj la 27-an de februaro finiĝis lia surtera vivo.

*

La KAL-ĈI Dokumentaro aperigis du librojn: JOHANO LA BRAVA en formo de bildrakonto.⁴⁰² Alia unikaĵo: bukedo de 87 poemdediĉoj al Kalocsay sub titolo EN SUPERLATIVO.⁴⁰³

La 25-an de septembro en la **Centra E-Klubo** (Budapest) d-ro Á. Máthé prelegis pri la "Triobla datreveno de Kálmán Kalocsay".

Enkadrumita estas la blazono de nobeliga dokumento de la familio Panda (patrina branĉo de Kalocsay).⁴⁰⁴

Sur la muro de sidloko de ASdKK (placo Zsigmond) estas lokita nomtabulo.

En la kunveno de IMEK (13/17.07.2001) d-ro I. Ferenczy prelegis pri la 110-jara Kalocsay.⁴⁰⁵

I. Ertl: *"Ni naskiĝis en transira epoko"*.⁴⁰⁶

A. Csiszár: *Kálmán Kalocsay — Lia memoro en la jaro 2001*.⁴⁰⁷

*

En la **Naŭa Internacia Esperanta Semajno de Kulturo kaj Turismo** (2001.09.29/10.06) oni rememoris pri la 110-jara Kalocsay.

*

La 15-an de decembro en la Zamenhofa festo, Sándor Jakab, vicprezidanto de HEA kaj membro de ASdKK en sia festparolo rememoris ankaŭ pri J. Baghy kaj K. Kalocsay okaze de ilia 110-jara naskiĝdatreveno. HEA farigis porokazan stampilon kun iliaj portretoj. Renoma hungara aktoro, Zoltán Sellei recitis poemojn hungare kaj en Esperanto. Tri poemojn en la traduko de Kalocsay: *Fino de septembro, Ho teda pens'...* de Sándor Petőfi; *Kia estis...* de Gyula Juhász.

*

*

En Esperanto-grupo en Miskolc la 20-an de decembro oni rememoris pri Zamenhof kaj Kalocsay. La kunvenon aranĝis János Orosz.

*

En la jarfina kunveno de ASdKK (2001.12.01) la ĉeestantoj rememorante pri Kalocsay oni aŭskultis lian sonbendigitan voĉon. La Amika Societo ĉi-okaze festis ankaŭ la datrevenon de sia fondiĝo. Sur la naskiĝtaga torto dek rozkoloraj kandletoj lumis. La **Hungara Esperanto-Asocio** per donaco gratulis kaj deziris longan vivon kaj pliajn sukcesojn al la Societo Kalocsay.

- 400 Vd p. 111.
 401 La prelego aperis en: RUBENAJ REFRENOJ. Eseoj. Red. Paul Gubbins. Berkley: Bero, 2001. 53 p. (p. 29-34).
 402 Vd p. 82, 126.
 403 Vd p. 127-128.
 404 Vd en: OMAÛE 1-a vol. p. 1-3.
 405 MIR (2001:4, p. 151-153) publikis la prelegon sub titolo "Kolomano Kalocsay, medicinisto, verkisto, lingvisto".
 406 Vd p. 121-122.
 407 Vd en: HFM 2002:2, p. 21-22.

"NI NASKĜIS EN TRANSIRA EPOKO"

Ĉe UEA kuŝas deponita la preskaŭ kompleta korespondajaro inter Gaston Waringhien kaj Kálmán Kalocsay. Kiel alirebligi tiun valoran materialon?

Kion skribis en sia unua letero Kálmán Kalocsay (1891-1976) al sia spirita frato Gaston Waringhien (1901-1991), kies naskiĝan kaj mortan datrevenon ni ĉi-jare rememoras?

Budapeŝto, la 24-an de septembro 1927.

Kara Kolego!

Kun sincera ĝojo mi legis el via letero, ke vi okupas vin pri la Esperanta versfarado kaj vi intencas resumi la rezultojn de viaj studoj en libro. Tia libro vere estus necesa.(...)

Eble ni ankoraŭ interrilatos, mi lasas iom ankaŭ por venontaj okazoj.

Ili efektive plu interrilatis, interŝanĝante pli ol 300 leterojn ĝis 1975, praktike ĝis la morto de Kalocsay. La amplekso de tiu korespondado igus malfacila kompletan libran eldonon de ĉiuj leteroj, kaj tia eldonaĵo kredeble ne evitus merkatan fiaskon.

Feliĉe, la nunaj ebloj de Interreta tekniko proponas alternativon. Tajplertaj entuziasmoj kaj TTT-spertulo prof. Marc van Oostendorp (marc@vanoostendorp.nl) jam ekkonstruis senpage alireblan kaj traserĉeblan TTT-ejon, en kiu fine ĉiuj dokumentoj estos troveblaj. Laŭ Van Oostendorp, la celo estas eĉ krei modelon de elektronika redaktado por ajnalingva filologio. La entajpaĵoj sciencnivele, kiom eble plej fidele reprezentas ĉiun aspekton de la originaloj, kiel mistajpoj, forigoj, manskribaj aldonoj k.s. Post tia prilaboro, la leteraro povos esti fonto ne nur por literaturistoj kaj historiistoj, sed eĉ por tiuj, ekz., kiuj volas funde studi la lingvouzon de la du granduloj.

Sur la bretoj de Biblioteko Hodler kuŝas kvin dikaj dosieroj, el kiuj tri enhavas kronologie la korespondajojn Kalocsay-Waringhien (1927-75: 303 leteroj, entute 665 paĝoj), kvara, laŭ tema apartigo, 99 paĝojn da leteroj pri ilia komuna tradukentrepreno *Flojoj de l' malbono*, kaj kvina 67 leterojn (88 paĝoj) inter Waringhien kaj la eldonisto Vilmos Bleier. Entute, ĉirkaŭ du milionoj da literoj...

Atende al la kompletiĝo de la projekto, eblas vidi etan specimenon ĉe <http://www.vanoostendorp.nl/interlinguist/kalocsay.kaj.waringhien/> — kaj legi ĉi-sube kelkajn ekstraktojn el la nun prilaborata periodo 1930-33.

Waringhien, 9 dec. 1930.

Vi petas pri mi kelkajn informojn: nu, mi estas nun preskaŭ 30-jara, agregaciulo pri lingvistiko kaj profesoro en la Liceo de Lille; mi estas ankaŭ edzo kaj plie, patro: mia knabo estas tri-jara, kaj ni atendas tiun-ĉi monaton alian filon (aŭ filinon). Ĉu vi kontentiĝas?

Waringhien, 10 jul. 1932.

Mi firme esperas vidi vin en Parizo: estus tro stulta, tia eterna disigo! Cetere pri la nun ruiniganta kapitalismo mi plene konsentas kun vi; sed la hodiaŭan "nazi'an" febron en Germanujo mi bedaŭras k tiamas.

Kalocsay, 20 nov. 1932.

Ŝajne la mondo tute ne povas plu iri sur la malnovaj reloj, ĝi haltis neekirigeble. Transformiĝo estas nepre necesa kaj ĝi povas okazi nur laŭ la kolektiva direkto. Ĉu la transformiĝo venos baldaŭ aŭ nur post jaroj aŭ jardekoj, tra teruraj mizeroj, katastrofoj, militoj, detruoj, tion malfacile estas antaŭdiri, bedaŭrinde al mi ŝajnas pli verŝajna la dua eblaĵo. (...) Por ni, kiuj vidas la stulton tie kaj la senpovon tie ĉi, restas nur lamentado pri tio, ke ni naskiĝis en tia danĝere interesa, transira epoko.

Waringhien, 7 feb. 1933.

Ne sen miro mi legis la lastan numeron de L (literatura) Mondo, kun la poemo kaj kritiko de Baghy. Mi ne konas la kialojn de lia ekŝiĝo el la redaktoreco, sed lia ago estas malplaĉa kaj perfida. Estas ĉiam facile ridindigi per groteska akumulado de novaj vortoj, sed ĉu estus malpli ridinde, se oni komponus poemon nur per arkaĵintaj kunmetaĵoj: ŝanceliĝi, elaspekti, tibiviano, vastiganto, tagnoktegalco, egal-pezo ktp...? Vi respondis al li tute ĝuste kaj sprite: sed mi kredas, ke ĉiaj prudentaj paroloj malmulte utilos, se oni direktas ilin al memvolaj surduloj.

Kalocsay, iam en 1933.

Via politika revuo estas vera trezorejo. (...) se mi ne estus ekstreme skeptika pri la nivelo de la verda popolo, mi aŭgurus al ĝi brilan futuron.

Waringhien, 7 aŭg. 1933.

Mi aldonas tri poemojn, kiujn mi ricevis de franca samideano el Parizo, kun iom emfaza letero; ĉar li ne aldonas sian adreson, kaj mi neniam aŭdis pri lia nomo (E. Maura?), mi kredas, ke ĝi estas pseŭdonimo.

István ERTL
Represo el Esperanto 2001/207.
Laŭ la afabla permeso de s-ro Ertl.

GRAVA VERKO PRI KÁLMÁN KALOCSAY

Ada Csiszár: **IN MEMORIAM — Dr. Kalocsay Kálmán (1891-1976)**

Abújszántótól az Eszperantó Parnasszusig.

Dr. Kalocsay Kálmán Baráti Társaság. Respondeca eldonanto D-ro Á. Máthé.

Budapest, 1994. 100 p. Kun bildoj. 20x14 cm, plastumita.⁴⁰⁸

La unua libro pri Kálmán Kalocsay.

En la Postparolo al esperantistoj oni legas:

"Enmanĝante tiun ĉi libreton, probable ne unu el vi bedaŭros, ke ĝi ne estas verkita en la internacia lingvo, en Esperanto

Ne bedaŭru! Pripensu: ĝis nun hungarlingve — escepte kelkajn artikolojn aperis nenio pri Kalocsay, kaj ankaŭ ties sekvo, ke li estas multe pli konata kaj honorata eksterlande ol en la patrujo.

La libro IN MEMORIAM — laŭ strukturo estas kvazaŭ skeleto de la presopreta, 800 paĝa OMAĜE, kiu enhavas 3200 bibliografiajn indikojn, 240 fotojn, rememorojn, intervjuojn, plumnomojn, poemojn ktp..."

Kvankam en 100-paĝa libro estas eblo nur skizi la riĉan vivovoĵon kaj verkaron de Kalocsay, tamen la aŭtoro sukcesis — kiel ankaŭ ĝia subtitolo montras — el la naskiĝloko ĝis la E- Parnaso trarigardi ĉi tiun itineron en la subaj ĉapitroj:

Kiu estis Kálmán Kalocsay? (Antaŭparolo).

1. La deveno de Kálmán Kalocsay (Genealogia tabuleto; Nacia deveno).
2. La infanaj jaroj (Duonorfe).
3. La studentaj jaroj (Gimnaziano en la urbo Miskolc; Medicinstudento en soldata uniformo).
4. D-ro Kalocsay, la medicinisto (Inter infektaj malsanuloj; Scienca agado en la medicino).
5. Li montriĝis kiel hungarlingva poeto (Kelkaj el liaj hungarlingvaj poemoj).
6. Poeto de la Internacia Lingvo (Bibliografio).⁴⁰⁹
7. Kalocsay Kálmán, la tradukisto (Listo de liaj tradukoj el la hungara kaj mondliteraturo).
8. La proza verkisto (La severa recenzanto; Poet-portretoj; Eseoj).
9. La lingvisto, gramatikisto Kalocsay (Listo de liaj lingvistikaj verkoj).
10. La redaktoro Kalocsay (Literatura Mondo; Budapeŝta Skolo).
11. En la Esperanta movado (Li instruis, prelegis, organizis).
12. Kalocsay kaj la politiko (Homeco en la malhomeco).
13. Li vivis 84 jarojn.
14. Poetoj ne mortas. (Pri liaj honorigoj postmortaj: Fondo de internacia societo por gardi lian memoron, starigo de kvar memortabuloj, du stratnomigoj, instalado de Kalocsay memorĉambro kaj publika bronza busto en la naskiĝloko, ktp.).

Esperantlingva postparolo, proponitaj artikoloj, kiuj donas pliajn informojn pri Kalocsay, listo de liaj postlasitaj verkoj kompletigas la volumon.

Ada Csiszár — kiel iom da tempo kunlaboranto de Kalocsay, kaj poste heredanto de lia arkivo kaj biblioteko — kolektis, elminis kaj sukcese publikigis multajn faktojn kaj indikojn — inter ili ĝis nun nekonatajn — pri la vivovoĵo de unu el la ĉefaj figuroj de la Esperanto-kulturo. Mi dubas, ke iu sciis ekzemple, ke en Kalocsay fluis sango: 9/16 hungara, 4/16 germana, 2/16 slovak, 1/16 pola.

Kelkaj hungarlingvaj amaj poemoj de Kalocsay, mozaikoj el lia familia vivo kaj bonkvalitaj fotoj sukcese prezentas la ĉiutagan homon. Ankaŭ mi mem, kiu havis feliĉon plurfoje viziti lin kaj peti konsilon por mia jurscienca kompilaĵo, trovis multon en la libro kiu kompletigas mian scion pri la figuro kaj riĉa verkaro de la vivanta kaj jam mortanta klasikulo de Esperanto.

La verko IN MEMORIAM estas utiligebla kiel manlibro ankaŭ por ne hungarlingvanoj, ĉar la bibliografioj kaj aliaj indikoj estas dulingvaj.

En la unika libro de Ada Csiszár plej impresis min du eroj: "Nyolvannégy évet élt..." (Li vivis 84 jarojn) kaj "A költők nem halnak meg" (Poetoj ne mortas). Tiuj eroj elradias ne nur ŝian plenan respekton al la geniulo, sed multe pli la senfinan amon de la disĉiplino.

Menciindas la bonproportia ekspliko de la multflanka agado de Kalocsay. La redakto kaj la lingvaĵo de la libro, krom la plena kono de la temo, montras ankaŭ la ĵurnalistan rutinon de la aŭtoro.

Blukolora kovrilo, bela preso, bonkvalita papero kaj bindo, apenaŭ troveblaj sensignifaj preseraroj — jen eksteraĵo de la libro.

Estas malmultaj pri kiuj pro Esperanto-agado aperis libro nacilingve. D-ro Kalocsay apartenas al tiuj

BIBLIOGRAFIO

- Farkas-Tatár, É.: Libro pri Kálmán Kalocsay.
E-dissendo en la Hungara Radio 1994.10.15.
Szörényi, I.: La Esperanto-kuracisto.
Észak-Magyarország 1994.11.04.
Szigeti Kardos, E.: In Memoriam...
Fonto 1995:175, p. 32-33.
Neilande, S.: Hungarlingva libro pri Doktoro K. Kalocsay.
Latvia Esperantisto 1996:26, p. 3.
Wacha, B.: In Memoriam Dr. Kalocsay Kálmán.
Hungaraj Paĝoj 1997:14 (2/nov.), p. 2.
Papp, T.: In Memoriam...
Debrecena Bulteno 2000:118, p. 24-25; 2000:119, p. 10-11.

- 408 La estraro de la II-a distrikto (Budapest) anoncis konkurson por gardi la memoron de eminentuloj, kiuj vivis en ĉi tiu kvartalo. A. Csiszár proponis d-ron Kalocsay, kiu dum 20 jaroj vivis en ĉi tiu urboparto. La ĵurio akceptis la proponon kaj per modesta sumo apogis aperigon de la libro redaktotan laŭ la prezentita sinoptika tabelo.
- 409 Laŭ iniciato de István Ertl, Henri Masson, redaktanto de la Gazeta Servo de SAT-Amikaro enretigis el la libro ĉi tiun parton en la franca traduko de I. Ertl kaj en la esperantigita teksto de A. Csiszár.

NE PLU NECESAS C.E.R.BUMY

Ada Csiszár: **SENVUALE**. Pri la pseŭdonimoj de Kálmán Kalocsay.
Budapest: KAL-ĈI Dokumentaro, 1999. 25 p.

Ada Csiszár estas vera fondintino de scienca kaloĉajologio, t.e. de sistema esploro kaj priskribo de la vivo kaj verkaro de Kálmán Kalocsay (1891-1976). Sen ŝia intima scio kaj kono de ĉio rilata al Kalocsay, antaŭ ĉio sen ordigo kaj dispono de lia vasta arkivo, nia informiteco pri la hungara majstro multe pli modestus. Ni eĉ ne scius, kion li verkis, ĉar la verkaro de Kalocsay estas multege pli vasta kaj ampleksa ol liaj konataj monografioj, liaj lingvaj studoj kaj tradukoj. Eĉ se ni libroforme disponus ĉiun verkitan sub lia nomo, ni ne konus ĉion. (La subskribinto preparas tri novajn librojn de Kalocsay: la kolekton de liaj recenzoj, la kolekton de liaj esperantologiaj studoj kaj la kolekton de liaj literatur-sciencaj artikoloj). Ĉar ni ne scius, kion Kalocsay verkis pseŭdonime kaj anonime nek sub monogramoj kaj inicialoj.

En la recenzata broŝuro Ada Csiszár rivelas al ni ĉion ĉi: la verko do estas kompleta registro de la vualito Kalocsay kaj tiele prezentas nemalhaveblan bazon kaj kondiĉon por ellaborata kompleta bibliografio de la budapeŝtano.

Csiszár donas ankaŭ la motivojn kaj kialojn pro kiuj Kalocsay sin kaŝis kaj kamuflis aŭ eĉ malaperis en plenan anonimecon. Oni jam sciis pli frue, ke C.E.R.Bumy, Kopar kaj Peneter estas nul alia ol Kalocsay. Sed mi dubas, ĉu eĉ literaturaj fakuloj sciis, ke Kalocsay sin nomis ankaŭ Ócsay Kálmán, V. Panda, Vince, Alex Kay, K. Stelov, Phil O' Gyn kaj Ista Makler, pseŭdonimoj reaperantaj eĉ sub diversaj monogramoj.

Verkoj ĉi-specaj ŝajnas malgravaj pro sia malamplekso kaj modesta ekstero, sed efektive ili estas gravegaj kaj necesaj kaj meritas la atenton ne nur specialisto, sed de ĉiuj literatur-amantoj. Kiam Esperantujo rekonos la formikan diligenton, la sindediĉan amon kaj la abnegacian laboron de la vera disĉiplino de Kalocsay kaj distingos ŝian laboron per adekvata premio?

Reinhard HAUPENTHAL

Laŭ la afabla permeso de s-ro Hauptenthal
represo el Fonto 1999:228, p. 26.

BIBLIOGRAFIO

Luko, J.: *Senvuale*

La Gazeto 15:89, p. 33.
Szilvási, L. *Nomoj de Kalocsay*
Eventoj 1999:0159, p. 6.
Szilvási, L.: *Pseŭdonimoj de Kalocsay*
Eventoj 2000:177, p. 7.
Hirundo 200:011, p. 11.
Ret-Eventoj 177 13/1 2000.

KARIERO DE POEMFABELO

JOHANO LA BRAVA. Bildrakonto. Adaptaĵo de la samtitola poemfabelo de Sándor Petőfi. (1823-1849). Bildoj laŭ la freskoj de Béla Sándor (1872-1949). El la hungara tradukis Kálmán Kalocsay (1923). Kunliga proza teksto, antaŭ- kaj postparolo de Ada Csiszár.
Budapest: KAL-ĈI Dokumentaro, 2001. 37 p. 25x12 cm. 30 numeritaj ekzempleroj.
Kolora reprodukto de 12-peca arta poŝtkart-serio resumanta poemfabelon.

Aperigita okaze de la 25-a mort-datreveno de Kálmán Kalocsay.

Antaŭ la leganta esperantistaro certe estas konata la ĉarma epopeeto, kiun esperantigis Kalocsay en 1923. La tradukon tiutempe premiis la *Akademio de Esperanto*. Ĝia reviziita traduko aperis en 1948, kaj represiĝis triafoje en la kolekto de elektitaj poemoj de Petőfi: LIBERO KAJ AMO (1970). La kvara eldono aperis en 1948. La ĉarma popolfabelo en 1931 aperis en ĉina vesto. Laŭ la traduko de Kalocsay ĉinigis ĝin Sun Yong. Li Naixi reĉinigis la poemfabelon laŭ la reviziita traduko de Kalocsay kaj aperigis ĝin en paralelaj Esperanta kaj ĉina tekstoj en 1997.

